HUNGARA VIVO

1968

4

HUNGARA VIVO

Kvaronjara revuo de Hungara
Esperanto-Asocio
Budapest VIII., Kenyérmező utca 6.

☆

1968. VIII-a jaro 4-a n-ro

Sur la frontpaĝo:
Du knabinoj en popolkostumo (Decs, dep. Tolna)

K. Kalocsay: Vilmos Bleier 1
L. Kökény: Karlo Marx 3
D-ro István Szerdahelyi: Reveninte 4
Eva Farkas: Momentfotoj pri la 53-a UK 6
El nia vivo kaj kulturo *(L. K.)* 8
Imre Botos: Pri nia lingvouzo 11
Tibor Ujlaky-Nagy: Jókai — nuntempe 12
Józsi Jenő Tersánszky: Novelo pri novelo. Trad. *Ladislao Halka* 16
Du poemoj el Vjetnamio. Trad. *K. Kalocsay kaj L. Tárkony* 17
Lingvaj problemoj en la Hungara Radio 17
Eĥo — reeho 18
Recenzo 19
D-ro Jozefo Mátéffy: Rememoro pri la 6-a Somera Esperanto-Universitato en Gyula 20
Marjorie Boulton: Lasta letero 21
Mozaiko pri la vivo de Julio Baghy — III. .. 21
Damjan Vahen-Svetinov: Urbo Szeged sunbrila 23
Marianna Kertész: La 5-a Internacia Pedagoga Esperanto-Seminario en Szeged 23
Sándor Szathmári: Kain kaj Abel..... 24
Ferenc Móra: Tiu malbona infano Nikolao. Trad. *Sándor Szalay*..... 26
István Fekete: Julio. Trad. *Lenke Kun* 28
L. Kafanova: La renkontiĝo estis neatendita ! Trad. *Petro Polišĉuk* (Taŝkent) 29

JUNULARO

Humurajoj *(L. K.)* 30
Miklós Lett: Filatelio. Trad. *P. Balkányi* 31
Marta Nádasdi: La naskiĝo de la nova terpomo 32

Ĉefredaktoro: Ludoviko Kökény
Responda redaktoro: d-ro Jozefo Mátéffy
Redakta Komitato:
Szilárd Bálint, Imre Botos, Lajos Lesznai,
Andreo Szabó kaj Tibor Ujlaky-Nagy
Ĉefkunlaborantoj:
Paŭlo Balkányi, Kolomano Kalocsay
Sándor Szathmári kaj Lajos Tárkony
Arta ĉefkunlaboranto: Ágnes Lukács
Eldonas: „Népszava" Gazeteldona Entrepreno,
Budapest, VII., Rákóczi út 54.
Telefono: 224—819
Responda eldonisto: Márton Gábor direktoro
Disvastigas la Hungara Poŝto. Abonebla en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj en la Centra Gazetoficejo de la Poŝto)K. H. I., Budapest, V. József nádor tér 1.) senpere, aŭ per ĉekenpagilo, por individuaj abonantoj la ĉeknumero estas 61 280, por neindividuaj 61 066.
La jara abono estas por jaro Ft 32.-, al eksterlando krome Ft 6.-40 poŝtelspezo.

68.66390 Akadémiai Nyomda, Budapest
Responda gvidanto: György Bernát
Indexszám: 25377

Hotelo „Budapest

Gvidlibro por Supera Ekzameno

Hungara Esperanto-Asocio plenumis gravan servon por la kulturo de Esperanto, eldoninte tiun ĉi skizon de Historio kaj literaturo de Esperanto. Apartaj ĉapitroj enhavas la vivon de Zamenhof, la unuan jardekon de Esperanto, la evoluon ĝis la unua mondmilito, la novan epokon post la dua mondmilito ktp. Sur 21 paĝoj ni povas studi la historion de la E-movado en Hungario. La plej grandan interesiĝon povas veki la Skizo de Esperanta Literaturhistorio — el plumo de K. Kalocsay, sur 77 paĝoj. Detalaj indeksoj, suplemento kaj bibliografio faciligas la uzeblon de la libro. La redaktoro de la Gvidlibro por Superaj Ekzamenoj prof. Alfonso Pechan — ankaŭ verkinto de pluraj ĉapitroj — faris tre bonan laboron. Kunlaboris ankoraŭ: P. Balkányi, L. Kökény, d-ro S. Szerdahelyi kaj H. Vatré. Lektoris Emilia Radvánszky. Ĉar tiu ĉi ekzamena materialo, resp. „baza kono por estontaj kaj praktikantaj lingvoinstruistoj" estas la unua en sia speco, ĝi povas esperi ankaŭ eksterlandan sukceson. Amplekso: 190 paĝoj, prezo: 20 forintoj. Mendebla ĉe Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, VIII. Kenyérmező utca 2.

VILMOS BLEIER

Ekzistas enigmaj homoj, kies animstrukturo neniel konformas al ilia vivkonduko. Vilmos Bleier estas unu el tiuj, eĉ elstare. Li estis komercista talento de pleja grado kaj siajn kapablojn tamen li dediĉis al tia idealisma afero kiel Esperanto kaj eĉ speciale al la literaturo de Esperanto. Ĉu li volis riĉiĝi per tio. Ne, li estis multe pli klarvida ol tion esperi. Ferenc Szilágyi klarigas jene: ,,Li estis proletido el iu periferia antaŭurbo Budapeŝta, ne apartenanta al la turismaj vidindaĵoj de la fabele bela hungara ĉefurbo ... Mi povas imagi al mi la iom maldikan, vervmovan, inteligentan kaj scivolan rondkapulon, kies okulvitraj okuloj fulmrapide magazenis ĉion viditan en la kapo knaba ... Poste lin kaptis la socia laboro, la fakorganizaĵoj, la kulturo, kies donacojn li ne ricevis pretaj, sed mirinde rapide kolektis ilin aŭtodidakte ... En 1930 li estis 27-jara, bonega esperantisto, geniulo de la komerco kaj entreprenemo kaj ĉefe platona amanto de la literaturo ... En ĉiuj liaj agoj oni sentis la soifon de aŭtodidakto, kiu pensas pri la elimineblo de la sociaj handikapoj. Tiu penso gvidis lin al Esperanto kaj en ĝi li trovis la eliksiron de la vivo."

Do, laŭ tio, li estis platona amanto de la literaturo. Sed estas interese, ke li tamen, sciante la lingvon pli ol kelkaj kunlaborantoj de la revuo, neniam volis altrudi ion sian sur ties paĝojn, kvankam, kiel li montris en ,,Arĝenta Duopo", por kiu li verkis kelkajn anekdotojn pri Baghy kaj mi, li havis surprize bonan stilon kaj ankaŭ senton de humuro. Mi ne scias, ĉu li legis kaj ĝuis la literaturon, la librojn de li eldonitajn, aŭ dank' al ia neklarigebla instinkto li elektis ĝuste tiujn el la proponitaj. Se li elektis instinkte, lia instinkto funkciis

preskaŭ senerare: inter liaj eldonaĵoj nur escepte troviĝas pecoj sub respektinda nivelo.

Li naskiĝis la 14-an de majo 1903 en Ujpeŝt, tiam aparta urbeto apud Budapeŝto, sed de tiam englutita de la kreskanta ĉefurbo. Li studis teknikan altlernejon, poste praktikis diversajn okupojn, estis seruristo, foira vendisto, ĝis li, esperantisto ekde 1922, ankris en 1924 ĉe HESL (Hungara E-a Societo Laborista), kiel ties salajrata oficisto: administranto de propagando, libroeldono kaj librovendado. Szilágyi skribas, ke tie li estis ,,memvola sklavo kaj masohisto" kaj klarigas tion per la nervozeco kaj suspektemo, kiun la drakonaj subprem-ediktoj de la hungara feŭdala kapitalismo estigis kaj kreskigis en la tiama laborista movado. Ankaŭ V. B. ,,sidis" en prizono kelkajn monatojn pro eldono de la kantaro ,,Ni kantu", kvankam ĝi enhavis tradukon nur de tiaj kantotekstoj movadaj, kiujn hungare oni rajtis disvastigi. Sed HESL estis speciale kontrolata kiel kovrejo de komunistoj: en 1934 la registaro ĝin likvidis definitive.

V. B. rimarkis dum sia esperantista oficado, ke en Hungario ekzistas literatura stabo, per kiu oni povas fari ion grandan, sed tio ne estas ebla en la kadroj de la minacata HESL. Tial, iel mirakle, li stariĝis sur la proprajn piedojn.

En la unua kunsido, kien li kunvokis la ,,stabon" (Baghy, Bodó, Halka, Kalocsay, Kökény, Somlai, Szilágyi, Totsche-Tárkony) li eksplikis siajn planojn: ne nur eldoni L. M., sed ankaŭ fondi eldonejon, kiu ĵetos Esperantajn librojn amase en la merkaton, superante la iaman eldonaktivecon de la franca firmo Hachette. La ,,stabo" komence aŭskultis lin skeptike pro la spertoj akiritaj en la unua periodo de L. M., kiam ili uzis sian talenton precipe por verki varbajn, entuziasmigajn, kortuŝajn kaj helpkriajn alvokojn por abono sur la interno de la titolpaĝo. Sed la memfide brilantaj okuloj post la okulvitroj de V. B. radiis tian optimismon, ke ni forgesis tiujn spertojn kaj sentis la impeton de la Schulhofaj versoj: Blovas freŝa, juna vento, en la mondon ... marŝas V. B.

Neniu el ni demandis pri kapitalo. Laŭ lia frato Béla Berceli, li komencis preskaŭ tute sen mono per ŝuldofaro. Poste li ricevis pruntojn aŭ monsubtenojn de esperantistoj.

Nu, L. M. fakte renaskiĝis en 1931. Ekde la sama jaro komenciĝis ankaŭ la libroeldonado en tre esperiga kvanto. Kiel Szilágyi skribas: V. B. volis cementi la fundamenton sub la Esperanta kulturo per komerca genio.

La $2 \times 2 = 4$ de tiu genio estis tiel evidenta, ke ĝi jam ŝajnas banala: ne sufiĉas eldoni librojn, sed oni devas tiujn ankaŭ vendi. Kaj jen kion oni ofte riproĉis al la eldonejo de L. M. Vendi, komerci, fi, neinde al samideano. Jen skribas ekz-e G. J. Degenkamp en sia ,,Esperanto 60-jara" (1947): ,,La komerca karaktero de L. M. ofte superombris ĝian literaturan valoron". G. J. Degenkamp estas fervora ano de la tiel nomebla ,,skolo de lingva logi

Sur la balkono de la Mester-strata loĝejo. Maldekstre Vilmos Bleier, apud li Tibor Réthelyi, inter la starantoj la dua virino: Helmi Dresen, inter la sidantoj dekstre: Hilda Dresen; staras Lajos Tárkony. (1933)

kismo", tial mi metas al li logikrilatan demandon: Ĉu la literatura valoro de la Dante-a Infero aŭ la tri Antologioj (hungara, ĉeĥoslovaka, svisa) povis iom malpliiĝi per tio, ke la eldonisto faris ĉiujn eblajn klopodojn por ilin vendi?

Fakte, V. B. faris ĉiujn eblajn klopodojn. Dufoje li faris propagandvojaĝon en pluraj landoj kaj kiel preta oratoro, pledante per seriozo kaj ŝerco li varbis librоaĉetantojn, membrojn de AELA. Tiu ĉi Asocio de Esperantistaj Libro-Amantoj rajte uzis la sloganon: Librovendo fabela: ne legendo, AELA.

La penso de V. B. estis, ke la esperantistoj amas la literaturon, do volonte aĉetas, se malmultekoste. Tial li faris AELA-n, kies membroj por kotizo de 10 sv. frankoj ricevis pli ol 1300 paĝojn en pluraj libroj ĉiujare; tio apenaŭ estis la triono de la kutimaj libroprezoj. Por ne trudi al la membroj librojn eble nedeziratajn, li ĉiujare voĉdonigis ilin pri multaj proponitaj libroj, kaj poste eldonis la plej deziratajn. Krome, en 1934 li komencis la eldonon de la trimonata gazeto „Lingvo Libro" por artikoloj pri gramatiko kaj pri librorecenzoj; ĉi tiun la LM-abonantoj kaj la AELA-membroj ricevis senpage.

Kompreneble, ĉio ĉi ne iris tute glate. Kiel se ĵonglisto aperigas el sia cilindroĉapelo senfinajn kolorajn paperrubandojn, poste kuniklojn, fine ankoraŭ kelkajn kolombojn, tiel aperigis librojn, librojn, librojn V. B., kie kutime mankis nur la kontanto. Li certe havis grandajn financajn zorgojn, sed tion neniu povis rimarki: li ĉiam gaje ridetis el post siaj okulvitroj. Li faris ĵonglan moncirkuladon, ĉiam ŝtopante la plej minacajn breĉojn de la ŝipo LM, kaj — kiel Szilágyi skribas: „la kunlaborantoj ofte restis ekster la moncirkulo"; kompreneble, la malplej minacaj breĉoj troviĝis aŭ ŝajnis troviĝi ĉe ili, la honorario ja tute ne estis firmradika tradicio en Esperantujo. Sed pro tio tamen eksplodis ribeletoj kaj ribelegoj, kaj unu tia ribelo fariĝis tamen danĝera: Baghy eksiĝis el la redakcio.

Cetere, pri la „komerca spirito" de V. B. mi menciu du aferojn:

Pro la t. n. neologismoj, kiel ajn ŝparaj ili estis en LM, komenciĝis siatempe vera kampanjo kontraŭ la revuo, tiel ke ni perdis pro tio abonantojn. Tamen, V. B. neniam protestis kontraŭ la uzado de poeziaj vortoj.

La Plena Gramatiko estis de li eldonita nur en relative malmultaj ekzempleroj, kaj la libron li sendis al ĉiuj akademianoj, por ke dua eldono povu baldaŭ pretiĝi tralaborita baze de la konsiloj kaj kritiko de la akademianoj. Tio, cetere, estis malŝparita mono: ni ricevis tre malmulte da konsiloj kaj profitis el tiuj ankoraŭ pli malmulte. Tio estis ankoraŭ Akademio konservativega: en la okuloj de pluraj el ili jam la amplekso de la libro estis skandalo.

Nu, oni povas ja diri, ke ĉio ĉi sekvis el la „komerca spirito". La bona komercisto ja volas vendi varon bonan por gardi sian reputacion.

La plej kritikata ago de V. B. estis, ke la Hungaran Antologion — imponan volumon — li dissendis al multaj esperantistoj kun la peto, ke ili gustumu ĝin, kaj se ĝi plaĉas, ili sendu ĝĭan prezon; se ĝi ne plaĉas, ili resendu ĝin, aŭ sciigu poŝtkarte la rifuzon, ĉar tiam la eldonejo sendos al ili la sendkostojn. Nu, multaj nenion respondis. Post la *oka* poŝtkarta atentigo, kaj precipe, ĉar troviĝis unu, kiu sendis la rifuzkarton kaj poste retenis ankaŭ la ricevitajn resendkostojn, V. B. publikigis la nomojn de la 75 negativuloj en Lingvo Libro, kaj eble ankaŭ aliloke.

Kiel prijuĝi nun, post preskaŭ 40 jaroj ĉi tiun mispaŝon? Ĉu ĝi estis fakte mispaŝo? Tiutempe estis ankoraŭ vivanta la mistiko de la samideaneco, ĉu estis do tro granda ŝarĝo postuli, ke samideano, ricevinte interesan kaj de ĉiuj recenzistoj laŭdegatan libron, post la ellego ĝin resendu, precipe se oni pagas al li la sendkostojn. Ĉu tro da malkomforto pagi la libron kaj alpoŝtigi? —

G. J. Degenkamp en sia libro, el kiu mi jam citis, indigas la eldonejon LM je 14 aprobaj kaj 45 malaprobaj vortoj. Enkonduke li skribas: „La eldonoj de LM estis tro multaj, ol ke ni povus dediĉi al diversaj el ili apartan konsideron." Jen, efektive, kiel la franco diras, „embaraso de riĉeco". Pri la eldonaĵoj de LM oni povas verki pli ol la amplekso de lia tuta libro. En ĉi tiu artikolo mi volas nur montri, kiel varia estis la eldonplano de V. B. Jen:

Originala poezio: Baghy (2), Kalocsay (3), Kurzens, Dekdu Poetoj, Naŭ poetoj, Emba.

Originala prozo (romano, noveloj): Baghy (2), Emba, Weinhengst, Newell, Engholm (2), Szilágyi, Adamson, Forge, Lejzerowicz, Sturmer.

Antologioj: Hungara, Ĉeĥoslovaka, Svisa. Preparataj estis: Itala, Nederlanda, Japana.

Tradukitaj poemoj: Dante: Infero. Eterna Bukedo. Preparata estis la plena Baudelaire, kiu aperis nur post 20 jaroj ĉe Régulo Pérez.

Tradukitaj romanoj: Axel Munnthe: La romano de San Michele. Jelusiĉ: Cezaro. Ash: Sorĉistino el Kastilio. Karinthy: Vojaĝo al Faremido. Jerome: Tri homoj en boato. Preparataj estis: Dro Arrowsmith. La plena Boccaccio. Vallienne: Ĉu li.

Lingvaj verkoj: Szilágyi: La simpla Esperanto. Ellernu! Seppik: La tuta Esperanto. Kalocsay kaj Waringhien: Parnasa Gvidlibro. Plena Gramatiko de E-o. (du eldonoj). Wüster: Konturoj de lingvonormigo.

V. B.: Ora libro de la E-movado.

Belartaj verkoj: Hekler, Genthon, Brzekowski.

Esearo: Totsche: De paĝo al paĝo.

Diversaj: Aisberg: Fine mi komprenas la radion. Slonimski: Vojaĝo en Sovetio. Privat: Interpopola konduto. Herzl: La juda ŝtato. Van Lon: Rigardu la teron. Arĝenta duopo.

Kaj fine la *Enciklopedio de E-o* en du volumoj redaktita de Kökény, sed kies riĉan ilustraĵ-materialon kolektis V. B. per ega korespondado kaj ne malpli egaj kostoj.

Ĉio ĉi kaj la nemenciitaj ankoraŭ estis eldonitaj en sep jaroj.

Sed la situacio en Eŭropo fariĝis pli kaj pli minaca. V. B. do decidis serĉi alian kontinenton: sendis sian kunlaboranton Braun al Japanujo, volante presigi siajn librojn per japanaj presejoj. Sed ankaŭ Azio ne estis bona kontinento: Braun ne povis atingi Japanujon, ĉar dume eksplodis la japana-ĉina milito. Tiam V. B. direktis lin al Hong-kong, kiu ŝajnis esti vere sendanĝera loko. Kaj tie li kontraktis kun presejo pri la presado de *sesmil* paĝoj jare.

En la unua numero de la oka jaro de LM aperis artikolo sur la interna titolpaĝo el la plumo de V. B.: Eŭropo hodiaŭ. Pli konvenus al ĝi tamen la titolo: Etsi fractus illabatur orbis (eĉ se la mondo frakasiĝos). Tie V. B. eksplikas, ke LM jam estas starigita sur tute internacia bazo, tiel ke sian agadcentron ĝi povas transmeti necesokaze en iu ajn momento al iu ajn lando. Antaŭ la fino de la artikolo sesfoje ripetiĝas la vorto *fido*. Kaj pri la hungaraj cirkonstancoj li pentras ankoraŭ optimisman bildon, sed dume jam intense okupiĝis pri la penso „transmeti sian agadcentron." Li pensis pri Nederlando, Svedujo, Svisujo, Estonio, fine li elektis Parizon. L. M. ĉesis en 1938, sed la eldonejo ankoraŭ funkciis kelktempe: en Hongkong presiĝis la unua volumo de *Ĉu li* de Vallienne kaj la dua parto de la Heklera Arthistorio (perdiĝis), en Italujo pretiĝis *Izolo* de Kalocsay kaj *Naŭ Poetoj* (perdiĝis), Sed la atmosfero jam estis tia, ke en tiu ankaŭ la milidea kaj miltruka V. B. devis malprosperi.

En Parizo li malsaniĝis je meningito, kies epidemio tiam trabalais Eŭropon, kaj kuŝis en grava stato hospitale, kiam la germanoj okupis Parizon. Szilágyi drame priskribas tion: li kuŝis tie sola, forlasita: la personaro, la kuracistoj, eĉ la kuripovaj pacientoj fuĝis ĉiudirekten. Mi ne scias ĉu tio estas fakto aŭ nur verkista fantazio; verŝajnigas ĝin, ke tiam ekzistis jam la sulfamidoj kaj per ilia apliko la malsano multe perdis el sia mortiga povo, precipe se ni komparas ĝin kun tiu de la hitleranoj. Li do eble povus saniĝi per zorga kuracado, sed por kia sorto? Nek Francujo invadita, nek Francujo de Vichy estus por li lando de viveblo.

Nun li kuŝas en la tombejo „Cimetière Parisien de Thiasis 82. division, 20. ligne, No 27."

Li ne verkis tiel varmajn kaj spicajn ampoemojn, kiel Heine, kies tombon la francaj virinoj ĝis nun ornamadas per floroj, sed se al iu esperantist(in)o venus en la kapon meti florojn sur lian tombon, eble la 14-an de majo, li (ŝi) ne malŝparus la floron sur la tombon de senindulo. Ni trankvile povas diri, ke sen V. B. la Esperanta literaturo estus multemulte pli malriĉa.

Kiel rekomenci lian laboron. Sindonajn, lertajn, simpatiajn eldonejojn ni havas, tiun de Juan Régulo Pérez oni eĉ povas nomi heroa. Sed kiu nun konas la vojojn, tra kiuj V. B. siatempe venigis la librojn al la legantoj? Kie estas tia homo? Aŭ eble ĝin povus fari ia instituto per funda libromerkatesploro, per tekso de librokomerca reto?

Jes, jen la mesaĝo de Vilmos Bleier: ne sufiĉas eldoni librojn, oni devas ilin vendi per ĉiuj eblaj klopodoj.

K. KALOCSAY

Karlo Marx

(1818—1883)



Antaŭ 150 jaroj naskiĝis Karlo Marx, unu el la plej elstaraj filozofoj kaj revoluciuloj de la tutmonda historio, fondinto de la scienca socialismo, la homo, laŭ kies instruoj Lenin kaj la rusa proletaro en 1917 gvidis la revolucion al venko, kaj sur la sesono de nia terglobo poste elformiĝis la unua socialisma lando. Marx antaŭ cent dudek jaroj manifestis la senmortan devizon de la laborista movado: „Proletoj de la tutmondo, unuiĝu!" Vere, la internacia spirito vivigis ĉiam la progreseman laboristan movadon, la rekono de la sama sorto de la proletoj sub jugo de la kapitalo, la neceseco kaj la decida venko de la komuna batalo donis esperon, pruntis entuziasmon kaj forton en ĉiuj landoj al la subpremitaj klasoj kaj tavoloj. La nomo de Karlo Marx ankaŭ nun estas firma standardo de ĉiuj konsciaj laborantoj, ankaŭ nun li estas objekto de senlima malamo flanke de la uzurpantoj de la materialaj kaj spiritaj havaĵoj. La instruoj de Marx ankaŭ nun vivas, influas, instigas por aktiveco kaj kontraŭ ĉiuspeca pasiveco.

Ni esperantistoj ne forgesas ankaŭ pri tio, ke la II-a kongreso

de la I-a Internacio en 1867 en Lausanne akceptis rezolucion, laŭ kiu „La kongreso opinias, ke universala lingvo kaj reformo de ortografio estus komuna bonfaro kaj treege akcelus la unuiĝon kaj fratecon de la popoloj."

Niaj pensoj flugadas al la germana urbo Trier, kie Marx naskiĝis kaj lernis tie en la unuagrada kaj en la meza lernejo. Kaj ni pensas kun ega respekto pri Jenny von Westphalen, kiu fariĝis „la plej amanta, plej zorgema edzino, la plej bona virino". Ni dankas ankaŭ al la plej bona amiko kaj kunlaboranto, Frederiko Engels. Kaj ni pensas ankaŭ pri la hungaraj amikoj-kunlaborantoj de Marx inter kiuj la plej eminenta estis Leo Frankel. Ni sentas nin afliktitaj pro la multaj persekutoj kontraŭ Marx, ni memoras pri liaj suferoj pro la malriĉeco. Ni admiras — kaj ŝatus sekvi tiun ekzemplon —, ke dum longaj jaroj Marx laboris ĉiutage po dek horojn en la biblioteko de British Museum. Ni ne forgesis, ke li mem admiris la hungaran liberecmiliton en 1848/49 kaj ĝian gvidanton, Lajos Kossuth.

Ni omaĝas dankeme al tiu ĉi giganto de la homa historio. Karaj esperantistaj amikoj, kiuj ĝis nun ne konatiĝis kun la vivo kaj agado de Karlo Marx, legu kaj studu ĉion, kio koncernas Marx kaj la marksismon, la gvidan ideologion de nia epoko.



Marx kaj lia edzino

REVENINTE

el Sovetunio post sesmonata esplorvojaĝo mi aranĝas miajn notojn. De ekstere mi observis tion, pri kio mi okupiĝas jam 20 jarojn kaj pasie mi serĉis respondojn al tiuj demandoj, kiuj dum tiuj ĉi 20 jaroj akumuliĝis en mi. La rondo de tiuj problemoj estas sufiĉe limigita: instruado (adekvate — lernado) de fremdaj lingvoj, sed la detaloj, la eroj de tiu mozaiko estas multegaj.

(Jam nun mi devas nepre noti, ke mi estis tie ne kiel esperantisto. Sed ĉu iu esperantisto povas forgesi sian memon aŭ rigardi tra fremda prismo?)

1. Ne ekzistas en la mondo ŝtato, en kies publikeduka sistemo ne estas instruado de fremdaj lingvoj (aŭ almenaŭ de unu fremda lingvo). Do — la problemo estas universala, tutmonda.

En Sovetunio la lingvoproblemo estas kompleksa socia problemo. Laŭ la statistikaj indikoj science pruvitaj la diversaj popoloj vivantaj en Sovetunio apartenas al 11 lingvofamilioj kaj parolas 88 diversajn lingvojn:

Hindeŭropa familio: *Irana grupo — 7 lingvoj*
Slava grupo — 5 lingvoj
Balta grupo — 2 lingvoj
Ĝermana grupo — 1 lingvo
Latinida grupo — 1 lingvo

Semita-hamita familio — 1 lingvo
Kaŭkaza familio — 19 lingvoj
Finnugra familio — 14 lingvoj
Samoeda familio — 3 lingvoj
Turka familio — 20 lingvoj
Mongola familio — 2 lingvoj
Tungusa — manĝua familio — 6 lingvoj
Ĉina—tibeta familio — 2 lingvoj
Paleoaziaj popoloj — 5 lingvoj
Ekster lingvofamilioj: *Korea lingvo kaj Eskima lingvo.*

La rusa lingvo estas la oficiala ŝtata lingvo. Do, oni instruas ĝin en ĉiuj lernejoj de la ŝtato.

La instrumetodo de iu fremda lingvo estas fundamente difinita far la gepatra-lingva bazo. La gepatra lingvo, ĉu konscie, ĉu subkonscie, ĉiam ĉeestas kiel tiu „metalingvo", laŭ kies nocioj la lernanto pensas. Instruante la rusan lingvon en Sovetunio oni devas kalkuli unue je 11 lingvofamilioj — kiuj havas certajn komunajn trajtojn ĉefe en la sistemo de la lingvo kaj malpli en leksiko kaj fonetiko. Surbaze de tiuj 11 „ŝablonoj" oni devas detaligi la metodologiajn problemojn laŭ la konkretaj lingvoj. Tiu ĉi problemo de proksime interesis min, ĉefe kio koncernas la instruadon de rusa lingvo en la finnugra medio, ĉar la sistemo de nia lingvo similas al ilia sistemo, sekve ni havas multajn komunajn problemojn. Sed ankaŭ la diferenco estas granda: la finnugraj nacioj en Sovetunio lernas la rusan lingvon kiel „duan gepatran", kiel oficialan, ŝtatan lingvon, inter aliaj, pli oportunaj cirkonstancoj ol niaj lernantoj.

2. Mi ne povis kontentiĝi pri tiu esplor-tereno kaj mi devis studi ankaŭ alian problemon: kiel oni instruas la rusan lingvon en la universitatoj al diversnaciaj stipendiatoj. Kvankam tiuj ĉi kursoj

estas multe pli intensaj ol la niaj kaj ili okazas en lingva medio, tamen mi kolektis riĉan sperton kaj abundan materialon, kiun ni povos utiligi en nia hejma praktiko.

3. La tria teritorio estis: la instruado de fremdaj lingvoj (angla, franca, germana) al la ruslingvaj gelernantoj. La konkreta situacio en tiu kazo ne similas la nian: oni instruas hindeŭropan lingvon sur hindeŭropa bazo. Tamen, mi povis rimarki tiun tendencon, kiu lasttempe pli kaj pli evoluas en la soveta metodologio.

a) Lasttempe ĉiam pli vaste oni aplikas la ekzaktajn, matematike esprimeblajn faktojn en la planado de la instrumaterialo.

La cibernetiko revoluciigis la lingvosciencon. La novaj lingvistikaj tendencoj radike ŝanĝis ankaŭ la fundamenton de la lingvoinstruado. Nun ni povas rimarki la klopodon apliki la samajn principojn en la metodologio mem, do la formaligon de la instrumetoda teorio kaj praktiko.

b) Kiel kontraŭpoluso de la formaligo aperas en la lingvometodologia teorio la pretendo observi pli intense la psikologiajn faktorojn de la lingvoinstrua kaj lernada praktiko. Ĝis nun la lingvoinstruado estis kvazaŭ praktika apliko de lingvistiko en difinita situacio. Sed la metodologio de fremdaj lingvoj nur parte estas „lingvistiko". Almenaŭ samgrade ĝi estas psikologia, aŭ pli ĝuste: psikolingvistika problemo. Sen serioza observado de tiuj psikologiaj fenomenoj, kiuj ĉeestas dum la instruado kaj lernado de fremdaj lingvoj, sen la scienca esploro de interferenco inter la gepatra kaj fremda lingvo, sen sistema lingvotipologio, kiu sistemigas la interferenciĝintajn surfacojn de tiu „lingvokarambolo" oni ne povas konstrui efikan metodologian teorion, senmanke aplikeblan en la praktiko.

4. Krom la esploro de teorio kaj praktiko de lingvoinstruado mi okupiĝis pri la studado de lernolibroj por fremdaj lingvoj. En la riĉegaj pedagogiaj bibliotekoj de diversaj sciencaj institutoj mi havis okazon trovi centojn da tiuj lerniloj kaj mi havis tempon detale studi kaj analizi ilin. La rezulto de tiu studado konkretiĝas en pli ol 300-paĝa manuskripto jam tajpita, kiun mi konsideras kiel bazo de estonte verkota „Lernolibro-metodologio".

Laŭ la statistikaj indikoj de UNESKO inter la libroj, aperantaj ĉiujare en la tuta mondo laŭnombre la unuan lokon okupas la lernolibroj. Estas ja mirinde, ke ĝis nun ne ekzistas sistema teorio de lernolibroverkado kaj la lernolibroj ĝenerale estiĝas el persona koncepto de lernolibro-verkisto. La gravega loko, kiun okupas la lernolibro en la instrueduka procezo, estas nekontestebla: ĝi implikas ofte ne nur la materialon, sed sugestas ankaŭ la metodon. Nun, kiam ni havas ĉiam pli kaj pli da konkreta materialo pri la diversaj „minimumoj" (fonetika, gramatika kaj leksika minimumoj), kiam en la metodologio elformiĝas kelkaj bazaj, matematike esprimeblaj leĝoj, alvenis la tempo sistemigi ilin, konstrui konsekvencan programon de la studmaterialo, montrante ne nur *kion?* kaj *kiel?* oni instruu, sed ankaŭ KIOM?

En la spektro de tiu problemaro mi devis ĉiam

La Universitato Lomonosov

adekvate vidi ankaŭ niajn hejmajn problemojn, kvazaŭ mi sinkrone transponis la konstatitajn problemojn en nian hejmlandan terenon. Dum la reformo de la instruado lasttempe ni raciigis la instruedukan procezon. Aperis novaj lernolibroj, la instruado okazas laŭ la modernaj konceptoj, sed ankaŭ nun, same kiel niaj sovetaj kolegoj, ni ne povas kontentiĝi pri la rezultoj. Se ni daŭrigos la plibonigon de nia laboro laŭ la supremenciitaj novaj elementoj, nia laboro nepre pliboniĝos. Sed mi persone ne estas konvinkita, ke post tio ni estos senmanke kontentaj pri niaj sukcesoj. Dum dudekjara teoria kaj praktika agado mi devis konvinkiĝi, ke ni povas instrui fremdan lingvon ĉiam pli bone kaj pli bone — sed ĉu bone, mi dubas. Estas ja kazo, kiam la komparativo esprimas malpli ol la baza grado!

Restas unu solvo: Esperanto. Mi tre ĝojas, ke tia aŭtoritato, kiel la hungara akademiano Géza BÁRCZI tute klare esprimis la saman opinion en la oficiala revuo de nia Kleriga Ministerio: ekzistas nur unu lingvo, kiu povas esti senmanke alproprigebla dum la cirkonstancoj de lerneja instruado: Esperanto. Mi aŭdacis pri tio paroli ankaŭ dum mia esplorvojaĝo: mi prelegis en la Lingvoscienca Instituto de la Scienca Akademio, en la Universitato Lomonosov kaj alparolis dum la preskonferenco pri la temo „La lingvaj problemoj en la sciencoj", kie

prezidis la akademiano Aksel BERG, prezidanto de cibernetika sekcio de la Soveta Scienca Akademio. Mi sukcesis pruvi, ke Esperanto:

a) estante neŭtrala, kaŝas valoregajn edukajn elementojn;

b) estante formaligita, sistema lingvo, pleje taŭgas por apliki senmanke en ĝia instruado la modernajn metodologiajn konceptojn;

c) ĝia facileco nerimarkite solvas la psikolingvistikajn problemojn;

d) fine, kiel baza lingvo estas perfekta ponto inter la gepatra kaj alia lingvo, sendepende de la karaktero de tiu dua.

Kiel ekzemplon mi menciis kaj per praktikaj spertoj mi pruvis, kiomgrade la kono de Esperanto, enhavanta aron da hindeŭropaj elementoj, helpas la finnugrolingvan hungaron lerni iun hindeŭropan lingvon. En Sovetunio plej vaste oni instruas la anglan lingvon. Tute speciala kaj ege malfacila problemo estas la instruado de latina grafiko surbaze de angla grafiko. Mi proponis: instruu nur unu jaron Esperanton antaŭ la angla kaj observu poste la favoran influon sekvontjare en la instruado de la angla. Ĉu oni povas malatenti tiujn argumentojn? Jes. Kial? Al tiu demando mi devas citi la vortojn de akademiano BERG, eldiritajn dum la jam menciita preskonferenco:

„Ĝis nun mi aŭdis multajn opiniojn pri Esperanto: kaj favorajn, kaj malfavorajn. Oni citas elstarajn homojn, diversajn eldirojn kaj detalargumentojn. Sed mi petas vin, esperantistojn: donu al mi sisteme kaj science argumentitan materialon, ĉiuflanke analizantan la problemon, kiun mi povus meti sur la tablon de la Scienca Akademio kaj peti la Akademion pridiskuti ĝin."

Jen, tiu materialo ankoraŭ mankas. Ĝis tiam niaj klopodoj estas sengrundaj. En Sovetunio tre seriozaj kaj kompetentaj fakuloj science kaj tre profunde laboras sur tiu ĉi tereno. Ni menciu unue la lingvistojn: la profesorojn Bokarjov, Ahmanova, la esploriston Grigorjev, poste la profesoron-geografon Armand, la ĵurnaliston Danovski kaj el la pli juna generacio: la matematikiston Malkin, la kemiistondocenton Tokarev, la ĵurnaliston Ĥarkovski. Ili ĉiuj komprenis tion, kion ankaŭ ni devas kompreni: neniu krom ni, esperantistoj plenumos tiun taskon!

D-ro István Szerdahelyi

Eva FARKAS

MOMENTFOTOJ PRI LA 53-A UK.

Hispanio. Sindeteno kaj scivolo miksiĝas en ni. Lernejaj studoj el arthistorio; Velazquez, El Greco, Goya . . ., delikatvoĉaj poetoj kaj aŭdacaj filozofoj, ardaj dancoj kaj brutalaj taŭroludoj . . . Entute tamen allogas nin la nekonata lando. Sed ĝi ne estas facile atingebla por ni. El la socialismaj landoj preskaŭ ĉiuj partoprenantoj travivis minimume iom da prokrasto ĉe la ricevo de la enirvizo.



El Escorial

En fremdaj urboj ni atendadis kaj ĉagreniĝis, ĝis fine — malfruiĝante ni atingis Madridon.

Post dekdu-hora, ege malkomforta vojaĝo en plenplena nokta trajno (sen litvagono), fine jam sidante kun multaj aliaj samsortanoj sur la planko de la koridoro, finfine ni alproksimiĝis al la ĉefurbo. Niaj dormemaj okuloj jam de unu horo miris la strangan pejzaĝon, la sekajn montetojn, rusto-ruĝan grundon, la malaltajn pinospecojn forte bonodorantajn en la varmiĝanta sunbrilo.

Ĉirkaŭ la 8-a matene ni alvenis al unu el la stacidomoj. Banko, informejo, vendejoj, ĉio estis fermita — dormis ankoraŭ la stacidomo; nur post la 9-a komenciĝas la vivo. Iom pli poste ni jam sciis la kialon; la vivo ankaŭ finiĝas tre malfrue, kun longa paŭzo inter la 12-a kaj 17-a horoj en la mezo de la tago.

Agrabla surprizo ĉe la stacidomo; multaj taksioj trafikas sur la stratoj malmultekoste. Nigraj Fiat-oj, kun larĝa ruĝa strio ĉirkaŭe.

Béla Berceli parolas en la komitatkunsido de UEA. Maldekstre de li d-ro István Bácskai, dekstre Lajos Dér kaj Antal Koós

Malfrue, aparte alveninte jen estas la problemo, kie mi povos renkonti mian Budapeŝtan amikinon. Ŝia korespondanto loĝis tre malproksime kaj ne havis telefonon. — En la unua paŭzo mi jam rapidis al la Prado, al la granda trezorejo, kiu tiel alloge proksime situis al la Kongresejo. Antaŭ la granda kolektaĵo de esprimplenaj, pensigaj desegnaĵoj de Goya mi subite ekvidis la Budapeŝtan amikinon! Kiel bone estas, ke la sama deziro tiras nin!

Grandioza estis la Kongresejo, la Domo de la Sindikatoj. Sed ĉi tiu grandiozeco havis ankaŭ sian ombran flankon; ofte ni trovis kongresanojn nervoze vagantajn, kiuj serĉis la salonojn kaj ĝuste pro tiuj labirintoj la prelegantoj multfoje estis ĝenataj de la malfrue alvenantaj aŭskultantoj.

En la unuaj tagoj iom tro dense estis kompilita la programo. Trikvar tiaj prelegoj okazis samtempe, kiujn ni tre bedaŭris preterlasi. Sed je la fino de la semajno, kompare al la komenco, tre maldensiĝis la ĝeneral-interesaj prelegoj. Eble tio estis la kaŭzo, ke de vendred-mateno jam multaj forvojaĝis.

Madrid tute ne estis tiel sufokige varma, kiel timigis nin ĝia famo. Sed la promesitaj klimatizaj aparatoj tamen estis funkciigitaj, sekve en la teatron, aŭ en la grandan prelegejon de la Kongresejo oni devis kunporti varmajn vestaĵojn kontraŭ malvarmumo.

Teatraj prezentadoj — neniam malfrueblaj. Ĝenerale ĉiuj vesperaj programoj komenciĝis tre malfrue kompare al mezeŭropaj kutimoj, sed la teatraj prezentadoj eĉ pli malfrue. — La ĉarma teatro — kaŝita en tre malgranda strato — neniam pleniĝis. La teatraĵoj — ofte estis nur monologoj tre mallaŭtaj.

Ankaŭ ĉi tie flustradas, grincadas, ploretas beboj, malgrandaj infanoj, kiel ĉie en Madrid. Multajn ĉarmajn infanojn mi vidis kun grandaj, nigraj okuloj, etulojn surbrake, aŭ apud la jupo de la patrino. Nur iom surprize estis por ni, mezeŭropanoj, ke eĉ dum la nokto ili ankoraŭ kuradis kaj kriadis sur la stratoj, promenadis kun la gepatroj. Etuloj en la muzeoj, kinejoj, preĝejoj, teatroj, restoracioj, eĉ en tiaj lokoj, kien ĉe ni, neniam oni kutimas kunporti infanojn!

Belegan koncerton prezentis al la partoprenantoj de la Kongreso la orkestro de la Madrida Radio kaj Televido el verkoj de hispanaj komponistoj. Certe la kongresanoj volonte estus plenigintaj la tutan koncertsalonon, se ĝi ne troviĝus tiel ege malproksime de la Kongresejo, kaj... se ne en la lasta posttagmezo oni estus disdonintaj la invitilojn!

El la tre grandampleksa parko Retiro, speciala parto, lukse kaj bele ekipita, estas rezervita por solenaj aranĝaĵoj, akceptoj. Ĉi tie okazis la akcepto fare de la vicurbestro de Madrid. En la anoncita tempo jam atendis granda, bunta aro da kongresanoj. Ni staradis, interbabiladis, rigardadis la bele iluminitajn florbedojn kaj fontanojn. Dek minutojn poste jam alvenis eĉ la malfruantoj, dudek minutojn poste ankaŭ tiuj, kiuj erarvagadis kaj nur malfacile trovis la enirejon. Sed la solenaĵo ankoraŭ ne komenciĝis, ni atendadis. Renkontante nederlandanojn, kiuj partoprenis la 51-an en Budapest, ni rememoris pri la akcepto tiama en la Parlamentejo. Iu rimarkis: „Ĉu vi memoras? ... ne ni atendadis en la salonego, sed la Ŝtatprezidanto mem, kiel

En Escorial. Ĉe la kapo de la kuŝanta figuro Béla Berceli, apud li Eva Farkas

dommastro de la bonvenigataj gastoj, atendis nin sur la supro de la ŝtuparo kaj aparte manpremis al ni ĉiuj!"

Fine alvenis la vicurbestro, salutis nin, tre favore parolis pri Esperanto, kiujn vortojn la prezidanto de UEA ĝoje konfirmis kiel konvinkajn propagandajn vortojn por Esperanto.

Kvankam ne estis tro granda la nombro de la kongresanoj, ĉirkaŭ 1600, multaj homoj plendis, ke ili vane serĉadis unu la alian, — mankis la tradicia rendevuo-tabulo! Sur la muro en la koridoro, kie troviĝis kelkaj giĉetoj, ekaperis unu post la alia, paperoj, anoncoj surgluitaj. Inter ili sur pluraj slipetoj gejunuloj serĉis liberan lokon en aŭtomobiloj al diversaj direktoj. Iu junulo (ne junulino!) tiel rekomendis sin, ke li estas „ĉarma kaj bonhumora".

Ankaŭ mi uzis ĉi tiun eblecon por afiŝeto kun la teksto: „parolistino de Radio Budapest Esperanto Dissendo, volonte interkonatiĝus persone kun aŭskultantoj;" En la signita loko kaj donita tempo iom timema, afable ridetanta viro estis la unua gasto. Kun brilantaj okuloj li diris: „Mi tre ĝojas, ke finfine havas la okazon persone diri al vi, kion mi neniam povas skribi en letero. Mi, en mia okcidenteŭropa lando ofte aŭskultadas viajn programojn kaj mi tre ĝuas ilin, sed en nia lando ankaŭ Esperanto mem ne estas favorata, kaj eĉ skribi oni ne povas al Radio Budapest...! Mi certe havus malagrablaĵojn! Do, pardonu al mi, ke ankaŭ mi apartenas al tiuj aŭskultantoj, kiuj ne skribas al vi! Tamen mi ĝojas, ke mi foje povas diri *tion al vi persone."*

Kun granda ĝojo mi interkonatiĝis kun fidela aŭskultanto de Esperanto dissendo de Radio Budapest, kun s-ro Manuel Casanoves, gajninto de la unua premio de Theodorakis konkurso. La vigla, bonhumora romkatolika pastro, profesoro de kataluna lingvo kaj historio, multe scias jam pri nia lando kaj kulturo pere de la regulaj Esperanto dissendoj. Kun aparta ĝojo li raportis al mi pri la prelego de s-ano Lajos Lesznai, kiun li faris en la kadro de Internacia Somera Universitato. Cetere ĉi tiu prelego kaptis la atenton de multaj interesiĝantoj per siaj faka nivelo kaj bonegaj sonbendo-ilustraĵoj.

Nekonata sinjoro ĉe giĉeto, en amaso da homoj, retrorigardis aŭdante min paroli kun iu alia: „Sinjorino, de kie mi konas Vian voĉon?" Mi ridetante: „Bonan vesperon karaj aŭskultantoj, en nia hodiaŭa programo vi aŭdos . . ." . . . „Ho, jes, jes" — li ekridas — „Radio Budapest!"

Manĝaĵoj. Unu el niaj hungaraj kolegoj sciis kelkajn hispanajn vortojn, sed tutcerte ankaŭ li rekonis nur la kokidaĵojn sur la menuo kartoj, tial miaj amikoj manĝis dum la tuta restado nur rostitajn kokidojn, — cetere tre bongustajn. Mi estis scivola kaj volis elprovi ankaŭ aliajn restoraciojn, sed timigis min la diversaj teruraj marbestoj, rampantaj en pluraj montrofenestroj. Mi ne kuraĝis riski, ke ne konante la manĝaĵojn, oni alportu ion, kion mi eĉ vidi ne povas. Germana esperantisto helpis fine, kiu jam malkovris memservan restoracion en la placo Puerto del Sol. Kun granda trankviliĝo ĉi tie mi mem povis elekti el la pladoj, klare observante la manĝaĵojn. Longa vico atendadis, inter ili multaj eksterlandanoj. Eble pro la sama kialo? Unu el miaj plej karaj interamikiĝoj originas tie en la memserva restoracio, kun la mildvoĉa japana profesoro Koseki kaj kun lia ĉarma filino, kiuj tri semajnojn poste eĉ en Budapeŝto jam vizitis min.

Post la kongreso ankoraŭ kelkaj vizitoj; Toledo kun siaj nemezureble riĉaj arthistoriaj memoraĵoj, Zaragoza, kun la ĉiam servopretaj, bonhumoraj organizantoj de la postkongreso, la eksterordinaraj formacioj de rozkoloraj rokoj en la Pireneoj . . . neniam estos forgeseblaj! Same, kiel la maltrankviliĝo en la stomako, kiam preskaŭ je ĉiu duonhoro paro da ĝendarmoj (policistoj) enrigardadis longe en ĉiujn kupeojn per traboraj okuloj laŭlonge de la trajno de Barcelono ĝis la landlimo.

EL NIA VIVO KAJ KULTURO

La 31-an de decembro 1968 mi demetos la „ĉefredaktoran" postenon de Hungara Vivo. Post plenumo de ampleksaj laboroj dum ok malfacilaj jaroj mi laboros de nun kiel „ĉefkunlaboranto" por nia revuo. Mi deziras tre sukcesan laboron al la nova ĉefredaktoro, la verkisto Mihály Gergely. Mi diras sinceran dankon por ĉiuj kunredaktoroj, ĉefkunlaborantoj kaj kunlaborantoj de la unuaj ok jaroj de H. V. kaj aparte por ĉiuj karaj legantoj, per kies komuna kontribuo nia revuo fariĝis unu el la plej altnivelaj periodaĵoj de Esperanto.

Ludoviko Kökény

Ekde la 1969-jara 1-a n-ro Hungara Vivo aperos en simila formato, tamen kun alia tipografio kaj en pli moderna eksteraĵo. Ni ĉerpos el la interesaj temoj de la hodiaŭaj hungaraj artoj, de la ekonomia, socia kaj spirita vivo, krome el la gravaj informoj de la hungara Esperanto-movado, kaj ĉion ĉi ni faros pli kolora per eminentaj grafikaĵoj kaj fotografaĵoj, kiuj ankaŭ memstare prezentas travivaĵon.

Nur kiel gustumaĵojn ni mencias kelkajn artikolojn el la 1-a n-ro de la IX-a jarkolekto. Per liaj sep unuminutaj noveloj ni prezentos la specifan, grotesk-tonan verkistan arton de István Örkény, — kies dramon sub titolo „La Familio Tót" oni ludas en pluraj ĉefurboj de Eŭropo. En László Benjámin eĉ se nur baze de kelkaj poemoj niaj legantoj povas ekkoni unu el la plej simpatiaj hungaraj poetoj. La kreaĵoj de la grafikartisto János Kass konvinke subtenos tiun nian

klopcdɔn, ke nia revuo en sia nova formato eĉ pli ol ĝis nun akiros la plaĉon dɜ niaj abonantoj kaj legantoj. Sur aparta paĝo ni prezentos kelkajn el la novaj poemoj dɜ William Auld. Unu el niaj artikoloj „dɜsegnas" la portreton dɜ András Kovács, reĝisoro dɜ la plej elstara filmo dɜ la pasinta jaro. Nia paĝo sub titolo „Humuro dɜ Babel" dɜziras dɔnaci al vi gajajn, samtempe pensigajn minutojn. Krome — ni esperas — simile interesaj legaĵoj estos nia lingvistika artikolo kun Esperanta enhavo, nia librorecenzo kaj mallongaj koloraj riportoj el vivo dɜ nia patrujo.

Ni tre ĝojus, se apogiĝante sur la ĝisnunaj rezultoj nia renoviĝonta revuo Hungara Vivo krom la malnovaj abonantoj havus novajn adɜptojn, novajn amikojn. Ni krɔdas, ke niaj celoj — pli dɜtale eksplikotaj en la enkonduko dɜ nia 1-a n-ro — kaj la esprimiĝo de niaj klopcdɔj jam per nia sekva numero certe konvinkos vin, ke nia revuo meritos pli grandan interesiĝon, pli ampleksan subtenon kaj amikecon de adeptoj de la tuta internacia Esperanto-movado.

Mihály Gergely

La 24-an de Majo 1918 estis prezentita en la Budapeŝta Operdomo la „Burgo de la Blubarba Princo", ununura opero de Béla Bartók. Tiu ĉi komponaĵo de Bartók estas la plej grava hungara sceneja kreaĵo de la 20a jarcento. Hodiaŭ jam en la tuta mondo oni konas tiun ĉi operon, kiu kreis novan majstraĵon „per la kunagordo, per la sintezo de la hungaraj popolaj elementoj, de la naciaj radikoj kaj de la ekspresionismaj klopodoj de tiu epoko". La simbola okazaĵo de la verko pritraktas la eternan problemaron de la rilatoj inter viro kaj virino. Ju pli volas ekscii Judita, la virina ĉefrolanto el la sekretoj de la animo, interna burgo de la Blubarbulo — des pli malproksimen ŝi foriras de li, por fine ankaŭ perdi lin. La aŭtoro de la akompana teksto estas Béla Balázs.

*

La poemo en la nuna Hungario *estas grava parto de la kultura vivo. Ĝi ligiĝas strikte al niaj tagoj, kaj ofte ĝi kaŭzas pasiajn diskutojn. Antaŭ nelonge kirliĝis disputado en literatura revuo pri la enhavo, moderneco kaj kompreneble co de la poezio. Jam de jaroj vekas efektive akuz- kaj defendparolojn la lirikaj esprimiĝoj de Ferenc Juhász kun senbrida fluado kaj kun nekutima konceptado. Oni diskutas multe ankaŭ pri la eksteraj kaj internaj cirkonstancoj de la verkista luktado por la esprimado.*

*

La nuntempa poeto devas helpi la homon, por orientiĝi en la mensoperda kuregado de la scienco kaj tekniko, la poeto devas akceli, ke la Tero fariĝu nia paca hejmo kaj restu daŭre ĝiaj belaĵoj. Kiel la atomfiziko, la cibernetiko kaj la biologio portas nin antaŭen, ankaŭ la poezio devas helpi la homaron antaŭen, en defendo de la vivo, kontraŭ la difektado, doloro kaj maljustaĵoj, kontraŭ la sangoverŝado kaj perforto, por gardi la homajn interesojn kaj valorojn.

*

Unu el la plej plenŝtopitaj komercaj stratoj *de Budapeŝto estas la strato Petőfi Sándor. Sur la pordego de maljuna konstruaĵo n-ro 5. tabulo alvokas la atenton, ke ĉi tie agadas la „Teknika klubo de la Konstruistoj". En multaj tagoj de la semajno la kluba vivo estas ĉi tie senĝena. La bufedo funkcias, kaj en la vesperaj horoj — ĉefe sabate kaj dimanĉe — transformiĝas la ejoj malfermeblaj kontinue, el la brakseĝoj apud la klubecaj aŭ kafejo-manieraj tabletoj fariĝas teatraj klapseĝoj, la publiko — membroj de la klubo kaj teatraj vizitantoj — turnas sin vizaĝe al la scenejo.*

*

La interesiĝo de la Budapeŝta publiko tre rapide turnis sin al tiu ĉi specifa klubo-scenejo, estanta preskaŭ unika en la lando. La prezentadoj okazas antaŭ plena rigardejo, tio estas antaŭ 140 ĝis 150 spektantoj. Unu el la programoj havis la titolon: „Mi, povra Villon ĉi tie ekstaras." Kaj tiu ĉi programo donis voĉon ne nur al la plej belaj tradukaĵoj de Villon, sed ĝia dramatiga kadroludo donis specialan gustumaĵon el tiu epoko kaj el la vole-nevole vagabonda, stranga vivovojo de la eminenta franca lirikisto. Rikoltis sukcesegon ankaŭ la programo de la malnova hinda kaj Babilona poezio.

*

Oni aranĝis en la klubo la aŭtoran vesperon *de pluraj vivantaj hungaraj poetoj en kunlaboro de la plej eminentaj hungaraj aktoroj. Krome: ili atingis sian plej grandan sukceson per la prezentado de la literaturo de nia epoko laŭ riĉega kaj speciala sceneja formo. Oni prezentis la scenejan variaĵon de la grandsukcesa romaneto de la franca verkisto Romain Gary, sub titolo „Lady L." kaj estis prezentita ankaŭ la teatra formo de la monumenta romano de Erich Knight, sub titolo „Estu fidela al vi mem".*

*

La familio estas la plej malgranda ĉelo de la socio. Se ni esploras la kontakton de la junularo kun la socio, ni ekzamenu unue, kiel efikas la familia medio al la infano kaj al la adoleskulo. Sed ankaŭ en Hungario oni ĉiam devas alvoki la atenton je tio, ke la devo de la gepatroj estas ne nur la fizika-korpa edukado-zorgado pri la infano, sed ankaŭ la elformado de la spirito kaj sinteno de la gefiloj. La hungara pedagogio konsideras tre grava, ke la influo de la familio estas tre decida, kaj tiu ĉi efiko estas

valida ankaŭ kiam la gepatroj tute ne pensas je siaj gefiloj. La vivmaniero de la gepatroj, ilia rilato de unu al alia kaj al la gefiloj, iliaj rimarkoj faritaj pri la gekolegoj kaj geamikoj, pri la laborloko, lasas en la gefiloj profundajn spurojn, kaj tio ofte efikas pli forte je ili, ol la konscia eduklaboro de la pedagogoj.

*

La partopreno en la zorgoj *de la prenkreskuloj komenciĝu per la konatiĝo kun la zorgoj de la familio. La gefiloj partoprenu en tiu priparolado, kiu okazas por dividi la monatan salajron, la gefiloj sciu, al kiuj investadoj preparas sin la gepatroj, kiom kostas la plenumo de la deziroj de la gefiloj, kaj informiĝu ankaŭ pri tio, kiel la gepatroj perlaboras la monon. Nur tiel la gejunuloj povas sufiĉe taksadi la fortostreĉojn de la tuta socio, kaj nur tiel ili povas prepari sin al tio, ke iam ankaŭ ili estu konscience laborantaj membroj de la socio. — Jen tiujn ĉi pensojn ni legis en la dokumento de la Patriota Popolfronto.*

*

Grava stilistika kunlaboro. En ĉiu lingvo troviĝas multegaj metaforaj esprimformoj, pli-malpli stabiliĝintaj parolturnoj, idiotismoj (hungarismoj ktp.), vortoj, esprimoj kun la sama, simila aŭ parenca senco (sinonimoj) kaj ankaŭ tre multaj proverboj. En Budapeŝto sub patronado kaj subteno de nia plej kompetenta verkisto Kolomano Kalocsay formiĝis laborgrupo, kies membroj estas: Ada Csiszár, Ludoviko Kökény, d-ro Jozefo Mátéffy kaj Tibor Ujlaky-Nagy. La celo estas: trovi kaj konstati laŭ maksimuma eblo la esperantlingvan „ekvivalenton" de la hungarlingvaj metaforaj esprimoj, parolturnoj, proverboj kaj ellabori grupojn de la sinonimoj. La kunlaborantoj antaŭvidas ĉ. dujaran seriozan esploradon kaj laboradon. Poste tiu ĉi eldonota verko servos utilege por ĉiuj, kiuj funde volas konatiĝi kun Esperanto; la verko helpos precipe al la tradukistoj, ankoraŭ ne tro spertaj. Ni petas la interesiĝantojn, bonvolu skribi al nia redakcio.

*

Elektitaj Poemoj de S. Petőfi — tradukitaj de K. Kalocsay — *jen estas la gravega poemaro, pri kies eldono ni insistis en nia 2-a n-ro. La prezidantaro de HEA jam faris decidon pri la aperigo, sporade jam alvenis antaŭmendoj el eksterlando, precipe el Germana Demokratia Respubliko. Tamen la plej ampleksa interesiĝo estas konstatebla en la patrujo de Petőfi, en Hungario. Ni ĉiuj pruvu per faktoj, per amasa antaŭmendo de la poemaro, ke la eldonejo Corvina ankaŭ materiale trovu inda la aperigon. Espereble baldaŭ komenciĝos tutlanda kampanjo por la Petőfi-eldono, kaj ni jam nun alvokas ĉiujn niajn legantojn por fervora subteno.*

*

Mortis Ŝimono Csóra la 21-an de junio. S-ano Csóra naskiĝis la 18-an de novembro 1904 en Zalatna (nun en Rumanio). Li fariĝis e-isto en 1922, laboris en Hago ĉe la E-Instituto, gvidis multajn kursojn, ĉefe laŭ la fama Cseh-metodo. Li vigle partoprenis la organizadon de la 14a IFEF Kongreso, kaj kunlaboris ankaŭ por la 51a UK, ambaŭ en Budapeŝto. Ŝimono Csóra dum dek jaroj redaktis la gazeton „Hungara Fervojista Mondo". S-ano Csóra per sia fervora agado multe utilis al la E-movado.

I. B. ĤOVES

La 3-an de aprilo en sia 69-a jaro forpasis en Moskvo eminenta soveta esperantisto-veterano I. B. Ĥoves, pli ol 50 jarojn fervora adepto de la Internacia Lingvo. Dum longaj jaroj kiel talenta ĵurnalisto li kunlaboris en diversaj sovetaj ĵurnaloj. I. B. Ĥoves multe kontribuis en sia patrolando al la disvastigo kaj popularigo de Esperanto. S-ano Ĥoves en la Siberia urbo Omsk post la unua mondmilito interamikiĝis kun hungaraj militkaptitoj-esperantistoj, estis en bona rilato kun hungaraj internaciistaj batalantoj. Inter ili estis Kálmán Papp (Debrecen) kaj mi. Kun vera talento li majstre tradukadis precipe poemojn de klasikaj rusaj kaj famaj sovetaj poetoj. La lasta kaj plej elstara verko estas lia traduko de la versa romano de Puŝkin „Jevgenjij Onjegin". Ĥoves kunlaboris en la nova Rusa-Esperanta Vortaro de prof. Bokarjov, membro de la Akademio de Esperanto.

A. KELEMEN

La Esperanto-dissendo de Radio Budapest donas pririgardon pri la ĉefaj politikaj eventoj de la tago kaj informas pri diversaj novaĵoj de la Esperanto-vivo. Ĉiun mardon ni disaŭdigas informojn laŭ la Esperanto-gazetaro, vendrede rubrikon: „Niaj aŭskultantoj raportas", kaj ĉiun sabaton intervjuon kun esperantisto. La konstantaj programoj estas: Lunde sportaj raportoj, ĵaŭde leterkesto de L. Pusztai, dimanĉe kultura programo kun muziko. La duan dimanĉon de ĉiu monato programo por infanoj. En la aliaj tagoj: aktualaj komentarioj kaj literaturaj, historiaj, kulturaj prelegoj. Ni petas niajn aŭskultantojn: skribu vian opinion pri la aŭditaj programoj al la redakcio de la Esperanto-dissendoj. Radio Budapest volonte respondos al la demandoj ĉu en letero, ĉu en la kadro de la programo. Niaj dissendoj okazas ĉiutage de la 20,30 ĝis la 20,45 laŭ mezeŭropa tempo per la sekvaj ondolongoj: 25,2, 20,5, 42,2, 48,1 kaj 240 metroj.

*

Jindrich Tomišek (fervojisto) Radvanice 77, Okres Prerov, ĆSSR. Ĝoje ni informiĝis, ke la dissendoj de Radio Budapest en Esperanto, ĉefe tra meza ondo 240 m, estas en via ĉirkaŭaĵo tre bone kompreneblaj. Kaj ankaŭ viaj e-istaj geamikoj tre laŭdas la E-programon. Vi korespondadas kun e-istoj de kvar socialismaj landoj, kaj nun vi serĉas korespondamikojn en okcidentaj landoj, prefere en Svedio. La kontaktiĝo kun eksterlandanoj estas por vi despli dezirinda, ĉar vi loĝas en vilaĝo.

*

G. M. Deĥterev, Omutninsk, Sovetunio. Ni dankas al vi, ke vi atentigis nin, ke enŝoviĝis eraro sur la 31-a p. de H. V. 1968/2. Do, kiel vi mem skribis: „Mari troviĝas okcidente de Uralo, en Eŭropa parto de Ruslando." La antaŭe konata nomo de mari-oj estis ĉejremisoj, najbaroj de la udmurtoj, al kiuj nia Julio Baghy verkis poemon por nia revuo. Kiel ankaŭ ni scias, ambaŭ popoloj kaj ankaŭ ni hungaroj apartenas al la finno-ugra popolfamilio.

Pri nia lingvouzo

La subajn pensojn vekis en mi la legado de la numero 1/1968 de Hungara Vivo.

*

Mi legas: *Tio estis tiutempe le sorto ankaŭ de multaj mil hungaraj intelektuloj.* Unua reago: kial *multaj mil*, kial ne *multaj miloj da?* Sed poste mi provas analizi la strukturon, kaj devas konstati, ke ĝi estas ĝusta:

multaj	*mil*	*hungaraj*	*intelektuloj*
epiteto kvanta kiel flank-elemento de sintagmo	epiteto kvanta kiel flank-elemento de sintagmo	epiteto kvalita kiel flank-elemento de sintagmo	ĉefelemento de sintagmo
		sintagmo kiel ĉefelemento de alia sintagmo	
	sintagmo kiel ĉefelemento de alia sintagmo		
sintagmo			

Sekve ne *((multaj mil)(hungaraj intelektuloj))*, sed *((multaj) (mil hungaraj intelektuloj))*; *multaj mil* estus neebla kiel sintagmo: numeralo ne povas esti ĉefelemento de sintagmo kun flankelemento epiteta. Ne estus do ĝusta, ekzemple, la frazo *Estis tie multaj mil*, sed nur *Estis tie multaj miloj.*

La frazo citita el HV certe naskiĝis por eviti la pezecon de la strukturo *la sorto de multaj miloj da ...* Sentiĝas ankaŭ la influo de la hungara:

sok	*ezer*	*magyar*	*értelmiségi*
(mult)	(mil)	(hungar)	(intelektul)
kvanta epiteto kompleksa		sintagmo kiel ĉefelemento de alia sintagmo	
sintagmo			

Kvankam tia konstruo estas kontraŭa al la Esperanta, la rezulto *(multaj mil hungaraj intelektuloj)* tamen estas ĝusta (vidu la unuan analizon). Denova pruvo pri la vasta internacieco de Esperanto, kiu kapablas valorigi por si eĉ influojn de tute malsamaj lingvostrukturoj. Tio, kompreneble, ne signifas, ke oni povas senbride apliki la fenomenojn de iu ajn sintakso. Ĉiu sintaksa formo, uzata en Esperanto, devas esti en harmonio kun ĝia propra, klare elmontriĝanta strukturo. Sed en la kadro de tiu strukturo estas multege da ebloj. Al ili apartenas la menciita formo, apud la klasika.

*

La sekva hungarismo, jam ne pravigebla: ... *ni adiaŭas de* ... Oni povas *adiaŭi iun*, ankaŭ *adiaŭi al iu*, sed ne *de iu.*

*

Streketo inter vortoj povas ŝajni bagatelo. Ĝia manko tamen ĝenas, precipe, se tro ofta:

... *ni komencis la pli ol 3400 kilometran vojaĝon ... tri tagnokta veturado ... 350 kilometra veturo ... 12000 kilometra vojaĝo* ... (Ĉie mankas streketo antaŭ *kilometra* kaj *tagnokta.)*

La manko de la ligilo eĉ povas rezultigi miskomprenon: *La saĝaj maŝinoj pakas la teojn por en- kaj eksterlando en 50 gramajn paketojn.*

Ĉu en 50 paketojn, kaj ĉiu paketo estas unugrama? Kompreneble en *50-gramajn paketojn!*

Superfluaj estas la streketoj en *iom-post-iom.*

*

Malĝusta uzo de *sia* (anstataŭ *ĝiaj*): *Ni havis okazon vidi ... la novan socialistan urbon ... kun sia kuproercminejo kaj kuprokombinato.*

La vortoj *kuproercminejo kaj kuprokombinato* dependas de la vorto *urbon* (kiu ne esprimas agon), kaj tiu dependas de *vidi* (ago, kies subjekto estas *ni*). Sekve ne *sia*, sed *ĝiaj* (pluralo, rilatanta al du substantivoj).

Ĝenerala konsilo por ne erari en la uzo de posedpronomoj:

Serĉu la frazelementon, al kiu estas subordonita la posedaĵo. Se tiu frazelemento esprimas agon, kontrolu, ĉu ĝia subjekto (logika) estas identa kun la posedanto. Se jes, uzu *sia*, se ne, alian posedpronomon. Se la frazelemento, de kiu dependas la posedaĵo, ne esprimas agon, serĉu la vorton, superordonitan al ĝi. Se ankaŭ tiu ne esprimas agon, ripetu la procedon, ĝis vi trovas frazelementon, esprimantan agon. Komparu ties subjekton kun la posedanto (kiel supre).

*

Ne *kolhozo*, *sovhozo*, sed *kolĥozo*, *sovĥozo*. (La unua troviĝas ankaŭ en la SAT-vortaro.) La rusa litero *x* devas esti transskribata per *ĥ* (sono *h* en la rusa fonetiko ne ekzistas). La eraron kaŭzis la hungara transskribmaniero.

*

Denove sintaksan demandon levas la sekva frazo:

Adiaŭinte de la sovĥozo jam pli rapide ŝanĝiĝas la pejzaĝo.

Ni ne plu okupiĝu pri *de* post *adiaŭi* kaj pri *sovhozo*, pri kiuj jam temis; ni imagu, ke estas skribite: *Adiaŭinte la sovĥozon* ... — kaj ni atentu nur la frazkonstruon:

Adiaŭinte la sovĥozon	jam pli rapide ŝanĝiĝas	la pejzaĝo
?	predikato (plilarĝigita)	subjekto

Al kiu frazoparto apartenas *adiaŭinte la sovĥozon?* Laŭsence ĝi devus aparteni al la predikato kaj respondi al la demando *kiam* — kp. *poste.* Vere, oni povus diri *Poste jam pli rapide ŝanĝiĝas la pejzaĝo.* La finaĵo *-e* povas ja esprimi tempon. Sed se vortoj kiel *poste, matene, lunde* ktp. esprimas nur tempon, participadverboj *(-ante, -ate, -inte* ktp.) esprimas ankaŭ rilaton al la subjekto de la superordonita ago:

1. Ekvidinte nin, li foriris.
2. Ekvidite de ni, li foriris.

En 1. *li* ekvidis nin, en 2. *li* estis ekvidita de ni.

La citita frazo do signifus, ke la pejzaĝo adiaŭis la sovĥozon, kaj poste jam pli rapide ŝanĝiĝis.

Participadverbo estas nur uzebla, se la subjekto (ĉe aktivo) aŭ objekto (ĉe pasivo) de ĝia ago identas kun la subjekto de la superordonita ago. Se Petro batis Paŭlon kaj poste forkuris, ni povas diri: *Batinte Paŭlon, Petro forkuris.* Se Paŭlo batis Petron, kaj poste forkuris Petro: *Batite de Paŭlo, Petro forkuris.* Sed la pejzaĝo (en nia ekzemplo) nek adiaŭis, nek estis adiaŭita: adiaŭis *ni*, kaj adiaŭita estis *la sovĥozo.* Sekve nek *adiaŭinte*, nek *adiaŭite* estas uzeblaj.

Ni devas do uzi alian konstruon. Eble: *Post nia adiaŭo al la sovĥozo* ... Aŭ: *Post kiam ni adiaŭis la sovĥozon* ... Aŭ: *Adiaŭinte la sovĥozon, ni vidis, ke* ...

*

Noto. Sintagmo = vortostrukturo; la rilato logika kaj gramatika de du vortoj aŭ esprimoj.

Jókai – nuntempe

Kiam sur la paĝoj de Hungara Vivo la unuan fojon aperas la nomo de Mór (Maŭricio) Jókai, ni sentas tiel, ke ni riparas malnovan ŝuldon, kiam pere de la ĉi-sekvanta rememoro ankaŭ ni metas la plej elstaran hungaran romanverkiston sur la piedestalon de la omaĝo meritita.

Se por niaj karaj eksterlandaj legantoj mi iom kompletigas la enkondukajn vortojn per tio, ke ne multe malpli ol unu kaj duona jarcentoj disigas nin de lia naskiĝo, kaj ke antaŭ cent jaroj la plejparto de liaj plej gravaj verkoj estis jam publikigitaj, tiam kun bonvola, ĝentila rekono vi diros: vere, omaĝo al la grandulo, kiu per sia vivoverko — por tiel diri — metis la fundamenton de la hungara romanverkado, kaj montris direkton por la pli novaj verkistaj generacioj.

Se ankaŭ tion mi malkaŝas, ke liaj verkoj — plejparte romanoj, krome multaj noveloj kaj kelkaj teatraĵoj — ampleksas pli ol cent volumojn, tiam certe vi primiros lian fekundecon, se ne paroli pri la konsiderinda teknika plenumo — ja propramane, per plumo li skribis la multmilojn da folioj da manuskripto — verŝajne vi faros komparon kun la plej produktivaj romanistoj de la mondliteraturo, kaj via rekono certe plialtiĝos.

Sed, se mi diros al vi ankaŭ tion, ke Mór Jókai ne nur estis, sed estas ankaŭ nun la plej legata romanverkisto, tiam kun ioma nekredemo miksita kun priadmiro kaj sincera apreco vi haltos por momento antaŭ lia memoro, kaj — mi estas certa — kun scivola intereso vi legos koncizan memorskribon pri tiu talentulo, pri kiu kaj pri kies verkoj la literaturistoj jam verkis preskaŭ tiom, aŭ eble pli ol kiom ampleksas entute lia neĉiutaga verkaro.

15-a de marto 1848!

Juna oratoro staras sur la scenejo de la Nacia Teatro de Pest, kaj festparolas al entuziasma, ekstaze jubilanta homamaso. Estas la vespero de la glora tago de la hungara revolucio, la uverturo de la heroa sed tragika liberecmilito de la nacio kontraŭ la Habsburga subpremo. Post la parolado meze de freneza aplaŭdo kaj vivuado la plej furora aktorino de la teatra ensemblo, Róza Laborfalvi fiksas nacikoloran rubandobukedon sur la bruston de la knabinvizaĝa, 24-jara oratoro, Mór Jókai, la juna redaktoro de bonfama beletra revuo.

Li estas unu el tiuj politike maturaj junuloj, kies patrujama societo preparis kaj startigis la grandan historian eventon. En tiu fervora stabo de la revolucio, kunlabore kun tiaj patriotoj, kiel Sándor Petőfi, li aktivas senlace kaj sindediĉe en tiuj sortodecidaj tagoj.

En tiuj tempoj Jókai jam ne estis nekonata antaŭ la literaturama publiko. Ankoraŭ 19-jara jurscienca studento en Kecskemét li jam partoprenas tutlandan literaturan konkurson de la Nacia Teatro, kaj gajnas la duan premion per sia drama poemo.

Multaj sciis pri li ankaŭ tion, ke li estas intima amiko de Petőfi, ja eĉ en lia unua sukceso havis Petőfi sian kontribuon: li skribis la neton de la konkurs-verko per sia bela kaligrafio. Jen kiel skribas pri li Petőfi en 1847: „Kion mi sentas kontraŭ Jókai, por diri la veron, tio estas nek amikeco, nek frata amo, aŭ eble la mikso de ambaŭ ... Io nepriskribebla, kaj estas nekontesteble, ke kontraŭ neniu en la mondo mi sentas tion, kion mi sentas kontraŭ li."

*

Kiel filo de bonfama advokato li naskiĝis en 1825, en la trankvila apud-Danuba urbeto Komárom. Post la gimnaziaj studoj li sekvas la patran ekzemplon kaj per laŭdinda ekzameno havigas al si la advokatan diplomon. Sed lia inklino al la verkista kreado fariĝas ĉiam pli intensa, pli konscia, kaj post mallonga jurista praktikado li transiras definitive al la literatura kampo. Jaron post la ricevo de la diplomo ni jam trovas lin redaktanta gravan beletran gazeton. En liaj manoj la gazeto fariĝas la literatura organo de la radikalspirita juna Hungarlando. Lia individua mondpercepta kaj politika evoluo rapide prosperas, kaj marte de 1848 jam kiel burĝa revoluciulo li staras kune kun Petőfi kape de la junularo. Ankoraŭ en tiu sama jaro li edziĝas al Róza Laborfalvi, al kiu lin ligas teneraj sentimentoj ekde tiu memorinda okazintaĵo. Spite la 13-jaran pliaĝecon de la edzino ili

vivas feliĉe. Sed la familio provizore ne povas pardoni al li la neaprobitan paŝon, kaj ankaŭ la amikeco kun Petőfi malvarmiĝas.

Venas la gloro- kaj sangoplenaj monatoj de la granda liberecmilito, dum kiu per sia gazeto fidele li servas Kossuth-on kaj la sanktan aferon de la batalanta nacio. La periodon de la teroro, sekvanta la falon de la liberecmilito, li travivas en kaŝita montara vilaĝeto, sed baldaŭ li povas reveni al la ĉefurbo, kaj meze de la 50aj jaroj li estas jam rekonata kiel la plej populara hungara prozisto.

En 1856 li ricevas denove permeson redakti gazeton. Unue li redaktas humurajn gazetojn sed ekde 1863 jam politikan ĵurnalon, nome tiun de la mez-maldekstrula partio. Dume vigle li partoprenas ankaŭ en la politika vivo. De 1865 ĝis 1896, do dum pli ol 30 jaroj, li estas ankaŭ deputito de la „sendependa", poste de la „liberala" partio. En la jardeko post la kompromiso inter la hungaraj regantaj klasoj kaj la Habsburga dinastio (1867) li estas konsiderata unu el la plej renomaj publicistoj de la lando. Li reprezentis la liberalajn tradiciojn de la burĝiĝanta hungara mez-nobelaro.

De la komenco de la 80-aj jaroj li malpli partoprenas la politikan vivon, eĉ la redaktadon li transdonas al aliaj. Anstataŭ tio li multe vojaĝas al eksterlando kaj ankaŭ en la lando. Samtempe li interesiĝas ĉiam pli pri la natursciencoj. Lia edzino frue retiris sin de la teatra vivo. En 1886 ŝi mortis. 13 jarojn poste, en 1899 la 74-jara maljunulo volas fuĝi el la soleco lin ĉirkaŭanta, kaj edzinigas al si junan aktorinon, kio kaŭzas nekomprenon kaj malaprobon ĉe granda parto de la publika opinio.

Sed la verkadon li ne forlasas ankaŭ en sia alta aĝo, eĉ li lernas novajn artifikojn el la tiutempa literaturo. Dank' al tiu nova edzeco lia verkista vojo denove rimarkeble ekascendas, kvankam la stilo jam ne aliiĝas, kaj li restas ĝisfine ĉe la romantiko.

En 1904 li mortas. Milionoj de liaj legantoj funebras lin, kaj



Sceno el la Jókai-filmo „Kompatindaj riĉuloj"

ĉirkaŭstaras en animo la tombokavon, kiu forglutis la varmakoran, dolĉparolan rakontiston de la nacio, sed ne povis forgluti lian nemorteblan memoron: tiun fabelmondon, kiu katenas kaj ravas ankaŭ hodiaŭ liajn sennombrajn legantojn.

*

Apud Petőfi, Jókai estas la plej legata hungara literaturisto en eksterlando. Laŭ fidindaj bibliografiaj indikoj jam en 28 lingvoj aperis tradukoj — noveloj aŭ romanoj — el liaj verkoj. Eble valoras mencii tiujn lingvojn: armena, angla, ĉeĥa, ĉina, dana, Esperanta, estona, finna, franca, germana, hebrea, hispana, Ido, itala, kroata, latva, latina litova, nederlanda, pola, portugala, serba, rumana, rusa, rutena, slovaka, sveda, turka. Liaj kvar rekordaj romanoj el tiu vidpunkto estas „Ora homo", „Nova grandbienulo", „Pater Petro" kaj „Nigraj diamantoj", tradukitaj en 20, respektive 14 kaj po 11 lingvojn.

Ĝuste pro tio, ke ĝis nun neniu lia romano aperis en Esperanto, (nur noveloj), pli sube mi prezentos al vi, karaj legantoj, kvar romanojn el liaj plej elstaraj verkoj. Cetere, por diri la veron, ne estas facile trovi la plej elstarajn. Ja ĉiuj liaj romanoj estas tiomgrade niaj propraj travivaĵoj, iliaj herooj kaj roluloj estas tiome niaj dorlotitaj amikoj aŭ malestimataj malamikoj, ke elekti inter ili estas vere malfacile. Mia generacio en sia junula periodo havis sian apartan Jókai-mondon, kiun popolumis la bunta societo de liaj romanfiguroj.

Mia elekto koncerne la prezentotajn verkojn ne estis tute laŭhazarda. Ili estas romanoj filmigitaj post la dua mondmilito, do jam en la socialisma vivo de nia lando. Ĉiuj kvar estas artaj kolorfilmoj, pretigitaj sub la gvidado de talentaj reĝisoroj kaj ludataj de niaj plej elstaraj geaktoroj.

Estas menciinde, ke ankaŭ koncerne la kinon Jókai staras sur la unua loko: krom la traktotaj kvar romanoj pli ol 20 aliaj romanoj aŭ noveloj de Jókai estis ĝis nun jam filmigitaj.

Post la dua mondmilito la serion de la Jókai-filmoj malfermas en 1959 la filmo „*Kompatindaj riĉuloj*".

La intrigo de la romano okazas en la 18a jarcento. Scenejo: unu el la plej sovaĝaj lokoj de la tiama Transilvanio. La belan orfinon Henrieta la avo trude edzinigas al la riĉega sed aventurema, kruda kaj perfortema bienulo Hátszegi, kontraŭ kiu ŝi, amanta jam alian viron, eĉ simpation ne



Sceno el la-filmo „Kompatindaj riĉuloj"

havas. En sekreto Hátszegi estas la estro de rabista bando. Portante ĉiam nigran maskon — de tie lia popola nomo: Fatia Negra (nigra vizaĝo) — li tenas en konstanta teruro la loĝantojn de la ĉirkaŭaĵo. Kelkaj el la bando pretigas ankaŭ falsan monon en kaŝita groto. Hátszegi portas Henrietan en sian kastelon, kaj lasas ŝin sola por longaj tempoj. Henrieta, kiu bonkore zorgadas pri la mizeruloj de la vilaĝo, sciiĝas, ke Fatia Negra planas rabi la edzinon de iu vilaĝano. Ŝi diras tion al Anica, la amatino de Fatia Negra. La ĵaluza virino, por venĝi sin, perfidas la groton de la monfalsistoj. Oni kaptas tiujn, sed sen la estro. Foje Henrieta ekvojaĝas al sia frato. Dumvoje atakas ŝin Fatia Negra. La malforta virino per sia tuta forto deŝiras la maskon kaj rekonas sian edzon. De tiam kvazaŭ mortinta ŝi vivas apud li. La lasta aŭdaca ago de la bandoĉefo estas atako kontraŭ la armita trupo transportanta la konfiskitan falsan monon. Oni kaptas lin embuske, sed jam ne viva, ĉar en la lasta minuto li pafas al si en la buŝon.

*

En 1962 pretiĝis la filmo „*Ora homo*" el la samtitola romano. La historio okazas en la 18a jarcento.

Tra la danĝeraj rokegoj kaj klifoj de la malsupra Danubo Miĥaelo Timár la brava ŝipisto savas sian ŝipon unue for de liberiĝinta flosanta akva muelejo, poste de turka milit-ŝipo ĝin persekutanta. Sur la ŝipo de Timár fuĝas altranga turka sinjoro kun sia statue bela filino Timea, kiun li devas savi de la haremo de la sultano. Li kunportas ankaŭ siajn fabele altvalorajn trezorojn. La turka sinjoro venene mortigas sin, post kiam li konfidis sian filinon kaj la trezorojn al Timár, kiu pruvis sin kuraĝa kaj lerta. Timár portas la knabinon al la apud-Danuba urbo Komárom, aĉetas por ŝi belan domon, kaj transdonas al ŝi la trezorojn. Pro dankemo Timea akceptas lian edziĝproponon, donas al li la manon, kvankam ŝi amas alian viron. Timár, kies riĉeco kreskas de tago al tago, kaj la popolo lin nomas jam „ora homo", vane klopodas konkeri la koron de sia edzino. Vidante, ke ĉio vanas, li malaperas, kaj ĉiu opinias lin mortinta. — Malgranda insulo staras meze de la malsupra Danubo. Tie, for de la mondo lin atendas la amanta koro de simpla knabino. Tie, forgesinte la zorgojn kaj suferojn de la mondo, Timár trovas sian paradizon kaj la pacon de sia koro.

*

En la jaro 1965 la hungara kinoarto ĝojigis nin per la aperigo de la filmo „La filoj de la ŝtonkora homo", pretigita el la samtitola Jókai-romano. Ĝi estas larĝformata kolorfilmo duparta (t. e. havanta duoble longan ludotempon).

La intrigo disvolviĝas en la 1840-aj jaroj. Baradlay, la komitatestro, la potenca sinjoro kaj fidela subulo de la aŭstra imperiestro suferas je kormalsano: „ŝtoniĝas lia koro". Ĉe luksa tagmanĝo trafas lin la morta koratako, kaj havas jam nur kelke da tempo por doni la lastajn instrukciojn al la edzino pri la estonteco de siaj tri filoj: li antaŭvidas por ili altrangajn postenojn bone salajritajn en la favoroplena ombro de la imperiestra trono. La edzino ĉion promesas, sed post la morto de la edzo ŝi ĵuras fari ĉion home eblan, ke la filoj fariĝu ne vasaloj de la subpremanta potenco, sed noblaj viroj senhezite pretaj batali kaj suferi por la patrujo. La filoj de la ŝtonkora homo frontas la liberecmiliton. Unu el ili, la husaroficiro, spitante la rigorajn regulojn, el Vieno hejmengvidas sian roton por plifortigi la ĵus naskiĝintan sendependan hungaran armeon. La alia fariĝas eminenta politikisto apud Kossuth. Post la tragika falo de la liberecmilito persekuto kaj mortdanĝero atendas la du pli aĝajn fratojn, precipe Edmundon, kiu jam havas familion. Sed anstataŭ aresto alvenas la adiaŭa letero de la plej juna frato el Vieno. Pro eraro oni arestis lin anstataŭ la fraton, li ne malkaŝas la eraron, kaj oferas sian vivon en la ekzekutejo por sia frato.

*

Same en 1965 pretiĝis filmo el la Jókai-romano „Ráby, la malliberulo", kaj en 1966 oni prezentis la majstran filmigon de la romano „*Hungara nabobo*" en kolora, larĝformata, duparta produkto.

Johano Kárpáthy, la riĉega grandbienulo estas maljuna strangulo, kiun interesas nenio krom liaj vertragoj. Lin distras dungita cigano-klaŭno, ebriemaj drinkokompanoj kaj facilmoraj knabinoj. Tago post tago li

Sceno el la filmo „La ora homo"

Sceno el la filmo „La filoj de la ŝtonkora homo"

dibočadas kun ili, kaj malzorgas sian bienon. Sed fine ŝoke li resobriĝas, kiam lia nevo kaj heredonto, la dando de Parizo, superŝutita de ŝuldoj, sendas al li donace — ĉerkon, en la espero, ke tiu lia „komplezo" rapidigos la morton de la maljunulo. Kárpáthy travivas teruran animskuon, sed resaniĝas. Por malebligi, ke la egoisma nevo povu heredi, neatendite li edzinigas al si ĉarman knabinon de honesta burĝa deveno. Ŝi fariĝas lia fidela edzino, kaj baldaŭ — koste de sia vivo — ŝi naskas al li belan fileton. La maljunulo post nelonge postsekvas la edzinon en la morton. La knabo plenkreskas, kaj fariĝas noblanima viro kaj talenta politikisto, utila kaj valora filo de la nacio luktanta por la libereco.

*

Sekvu nun iom da analizado kaj pritaksado de la tutviva verkista laborado de Mór Jókai surbaze de konstatoj de la plej eminentaj literatur-ekspertoj. Oni unuanime konsentas pri tio, ke liaj plej valoraj verkoj pretiĝis en la 30 jara periodo de lia vivo, daŭrinta de la komenco de la 1850-aj jaroj ĝis la fino de la 70-aj jaroj. Liajn pli fruajn verkojn stampas la franca romantiko aspiranta al fortaj impresoj, dum la postajn ŝarĝas la rutineco kaj la amasigo de kuriozaĵoj. Sed jam en liaj plej fruaj verkoj manifestiĝas lia eminenta observi-povo, lia inklino al la popoleco kaj humuro kaj la freŝa natureco de lia lingvaĵo. La arto de Jókai estas specifa alojo de la romantiko kaj de la realismo, sed ankaŭ lia romantiko estas plurfaceta. Ĝi entenas arkaikajn popolfabelajn elementojn tiel same, kiel karakterize novaspecajn motivojn el la 19a jarcento. El liaj maturaj verkoj mankas la ekstrema voĉo de la melankolio, la soleco kaj malespera ribelado, kiuj estas tiom karakterizaj ĉe la elstaraj reprezentantoj de la okcidenta romantiko. En tio lin influis krom lia mola kaj optimisma individueco ankaŭ la historia situacio; la nacia perdo kaj la intensa konscio pri la patriotismaj celoj disciplinis liajn humorvibradojn. La senbaran vagadon de lia fantazio ĉiam bremsis la cirkonstanco, ke li vivas meze de pozitivisma epoko neanta la miraklojn.

La kolektado de la materialo ĉe li okazas plejparte helpe de la spertado, sed siajn travivaĵojn ĉiam volonte li kompletigas el legaĵoj aŭ el alies rakontoj. Okulfrapa eco de la intrigo en liaj romanoj estas la ŝato kaj klopodo al surprizoj. Liaj herooj unuigas en si tutan serion da eksterordinara boneco aŭ malboneco. Ili estas la kreaĵoj de la romantiko, sed de tia romantiko, kiu volas instigi al la solvo de la naciaj taskoj pere de prezento de brilaj, sekvendaj ekzemploj aŭ fortimigaj monstrobildoj.

La loko de Jókai estas inter la plej grandaj en la hungara literaturo. La originale hungara karaktero de liaj temoj, de la disvolvo de la intrigo kaj tiu de la ceteraj priartaj iloj — precipe lia lingvaĵo — havas definitivan signifon en tio, ke la ĝenro de la romano organike enkonstruiĝis en la hungaran literaturon. El la abunda trezorejo de lia verkista talento multe ĉerpis eĉ la plej elstaraj de la hungaraj verkistaj generacioj lin sekvintaj.

Tibor UJLAKY-NAGY

Sceno el la filmo „Hungara nabobo"

Novelo pri novelo

— Józsi Jenő Tersánszky —



Józsi Jenő Tersánszky, verkisto, elstara figuro de la hungara prozo, ĉefe de la noveloj, estas 80-jara. Lia unua novelo aperis en 1910, kaj lia unua verkista sukceso estis la romaneto „Ĝis revido, karega . . .", la unua kontraŭmilita romano en la moderna hungara literaturo. Jam de la komenco li konfesis sin verkisto de la malriĉuloj. En la plej tragika jaro de la hungara historio, en 1944 li kondutis ege kurage, li estis ja unu el tiuj, kiuj plej multe subtenis la persekutitojn. „Tersánszky estas tia, kiel liaj sonĝitaj figuroj. En sia vivoverko li ŝanĝas la ŝajn-valorojn al efektivaj valoraĵoj, ... en sia vivo li malrespektas la afekteman literaturan stilon, la vojon de sia vivo li ne lasas ŝanĝi ekde sia konsciiĝo. Li estas stranga individuo. Laŭ analizo de la literaturistoj li restis ĉiam natura, li vivis kiel liaj figuroj: vivo kaj verko apenaŭ povas esti pli unueca ol ĉe li." (Lajos H. Barta.) Tersánszky kreis en siaj noveloj aron da simplaj herooj, kiuj neglektas-malŝatas la sorton de la farizeoj, ĉar tiuj simplaj homoj pereus, se oni vestus ilin en uniformaĉon. — Ni salutas korege en Tersánszky ne nur la grandan verkiston kun Kossuth-premio, sed ankaŭ la eminentan homon, malamikon de ĉio misa, aĉa, fia, farizea. (L. K.)

Ke vi vidu, sinjoro, kiomrajte vi nomas la literaturon nura distrilo de mallaboremuloj, vi devas aŭskulti de mi la sekvan okazaĵon:

En mia universitat-studenta aĝo okazis al mi tio. En Pest mi loĝis, en terura monata loĝtruo. Sufiĉu diri tiom, ke ĝia sola fenestro rigardis al la tiel nomata „lumkorto" kaj eĉ dum hela tagmezo mi povis en ĝi vidi nur ĉe lamplumo.

Sed mia mono ne estis sufiĉa por pli bona loko ol tiu ĉi humormurda karcero. Miaj gepatroj estis malriĉaj homoj kaj apenaŭ subtenis min per io dehejme.

Multege mi devis min tordi, ke mi povu min vivteni. Verŝajne tio kaŭzis, ke miaj nervoj aĉe eluziĝis, kvankam mi kredas, tio ĉi kuniras kun tiu malsano.

Sufiĉas diri, ke krom pro la mizeroj mi multe suferis ankaŭ pro la animaj pestaĉoj. Senkaŭzaj ekscitiĝoj kaj inertiĝoj alternis en mi kun tiaj troagordiĝoj, kies plezuro eĉ pli multe min turmentis. Poste mi suferis multe pro maldormemo kaj kion ĝi kunportas.

Sed ĉion ĉi per dura mano bridis la forto de l' juneco kaj ili apenaŭ malhelpis min en la laboro aŭ en alio.

Tiel mi sidis iun nokton apud mia libro, antaŭ mia ĉefekzameno, ĝis eltenis miaj okuloj kaj cerbo.

Ĉirkaŭ matenkrepusko estis jam, kiam tutplene elĉerpiĝinte mi ĵetis min en mian liton. Sed la dormo eĉ tiel ne estis pli indulgema al mi kaj dum horoj ĝi igis min atendi pri ĝi.

Estis tiu tempo, kiam la nokta Budapest jam falas en ripozon, sed la taga ankoraŭ ne okupis sian lokon, kaj en tiu ĉi paŭzo, inter la gaja ritmo de l' nokto kaj la sobra bruo de l' tago, kiel oni diras, kvazaŭ aŭdiĝas la mistera spirado de l' silento.

Mi sentis kelkfoje mian liton kiel boaton, kiun la oceano de ia giganta zumzumo lulas en la mallumo.

Iomete ankaŭ tio ĉi komprenigas la strangan efikon de la sekvantaĵoj.

Subite el mia duonkonscio min vekis, el la senpere najbara loĝejo, ekkrioj, kriadoj, pordfrapado, kurado tien-reen. Mi saltleviĝis kaj vidis, ke la kontraŭa fenestro de la lumkorto subite eklumiĝis.

Mi ne povis opinii alion, ol ke okazis akcidento, ŝtelado, eble rabado, kaj venkinte mian timon mi elkuregis al la koridoro.

Iu ĝuste tiam kuris malsupren sur la ŝtuparo el la loĝejo. El interne ankoraŭ ĉiam aŭdiĝis la ĝemado, kurado, do senhezite mi provis pordmalfermi: kio povas esti tie?

La pordo estis malfermita kaj tra la antaŭĉambro senbare mi paŝis en ĉambron.

Post tio, kion tie mi vidis, malmulte mankis, por ke min, kun miaj aĉaj, turmentitaj nervoj, kaptu sveno.

Sur sofo, en plena lumo, kontraŭ mi, virino akuŝis kaj apud ŝi estis nur knabineto. Tiu ĉi helpis ŝin ploretante kaj kun senhelpe mallerta manipulado.

Kun naŭza stomako, duonsvene mi returniĝis kaj sur la koridoro mi jam renkontiĝis kun la revenanta helpo.

Mia bona gusto protestas kontraŭ tio, ke mi rakontu la spektaklon mem. Mi povas diri sole tion, ke ĝi faris al mi teruran efikon. Ne por tagoj, sed por monatoj. Eĉ, mi pensis, ĝi estos fatala por mita tuta vivo.

Por paroli mallonge, mi estis konvinkita, ke la sorĉo de la virinsekso por mi malaperis. Aŭ almenaŭ definitive ĝi malpuriĝis antaŭ mi. Tiu ĉi naŭza bildo ŝoviĝis inter mian sopiron kaj ilin, kaj tion mi kunportos ĉien ajn.

Vi povas kredi, ke de tiam mi rigardis al la plej ĉarmaj estaĵoj kiel al la viviĝantaj pomoj de Sidono: ke ilia belo kaj freŝo kaŝas naŭzan semon.

Nenion mi povis fari kontraŭ tio, kiom ajn mi min defendis kaj kiom ajn ĝi min malesperigis. Estis naŭze por mi eĉ pensi pri virinoj.

Kompreneble, miaj cirkonstancoj, kiel mi diris, ne estis tiaj, ke tia afero tro multe estus min okupinta ĉe miaj senperaj vivbataloj. Krome, mi suspektis eble malklare, ke la afero havas fortan interrilaton kun mia nervomalsano.

Ke la kuracisto preskribis nervofortigilon, proponis malvarman akvon, movon kaj similajn, kaj ke ĉio ĉi neniom utilis, mi eĉ ne menciu. La nova neŭrologio tiam ankoraŭ dormetis en la sino de Dio.

Kaj nun, aŭskultu.

Foje, dum posttagmezo, libro venis en miajn manojn. Novellibro, verko de rusa verkisto. Sed tiuj ĉi mirinde simplaj historioj tiom min katenis, ke de la kortuŝiteco ĝis la ridego ĉiu sento peliĝis tra mia animo pro la sorĉefekto de la presitaj linioj.

Kaj en iu loko la printempon li priskribas, sur kelkaj paĝoj, kiam la varmeta pluvo degeligas la glacian kruston kuŝantan sur lagoj kaj vojoj, kaj bestoj, homoj ĝis femuro vadas en la suka koto kaj subite sunlumo brilas al la malpura mondo.

Post ĉi tio la priskribon finis kelkaj vortoj, kiuj tiun sunlumon inundantan super la malpuraĵo komparas al la unua rideto de la juna patrino, kiu sian etulon naskitan en doloroj feliĉe premas al si.

Estus malfacile sentigi, kiom strangan krizon kaŭzis subite en mi tiuj ĉi kelkaj frazoj.

Nenion alian, ol kion oni pensas pri sorĉvortoj, ke ili faras miraklon.

Subite mi ekkonsciis, ke mi estis kaptita de tiaj timigaj frenezumoj, kiel

la deca atmosfero de etburĝa dimanĉa posttagmezo. Antaŭ mi aperis mia malsana teruro kontraŭ la benita mistero de la sopiro, koncipiĝo, nasko, sed jam ne en ĝia malnova, reganta, legitimita formo, sed kun sia efektiva, malbela kaj idiota vizaĝo.

Tiel estis. En mi ekjubilis la plezuro de l' savo kaj liberiĝo, kaj ke la alia neniam plu revenos, almenaŭ ne per sia malnova forto, je tio mi povas de tiam kalkuli.

Nu, sinjoro, kion mi aldonu? Ĉu al ni povas pli multe fari iu aŭ io?

Ĉu vi pensas, ke ne la libro faris? Ke tiu ĉi stato jam estis preta en mi kaj ke la libro nur la pordon malfermis antaŭ ĝi? Aŭ mil aliaj interludis?

Tio indiferentas sinjoro! Kaj eĉ tiel, ĉu ne sufiĉis, ke konsciiĝinte pri mia frenezemo, mi povu malpli esti elmetita al hazardoj kaj refaloj?

Kaj tion ĉi la libro faris, sinjoro. Kaj mi eĉ ne intencis diskuti ĉi tie, sed kvazaŭ pagi nian dankemon al la libroj, por unu el iliaj bonfaroj, per la rakonto de ĉi tiu fakto.

Trad. Ladislao HALKA

Du poemoj el Vjetnamio

Ankoraŭ ŝvelas odoroj...

Luu Trong Lu

Vizitis la arbaro densa
ĉi nokte min kun verd' intensa,
surpluvis min la prunfloraro...
Sur voj' malnova ni en paro
promenas, bambuombroj vibras,
flanarboj sur nin roson kribras,
La vento de l' Huong-rivero
por dormi flugas al kanejo.
Vi lante vočis dum promen'...
Ho, rava voĉo tra l' ĝarden'.
Ni iris, iris ĝis trans pado
kun ofta retrorigardado.
Punarboj sendis per parfumo
mesaĝon tra l'vespermallumo.
Odoro stranga ŝvelas, glitas,
en polv' ni niajn paŝojn vidas
Ankoraŭ ŝvelas...
kaj aŭdas bati nian koron,
ilian strangan kunsonoron.
La sonĝo for... Mi vin atendas.
Riveroj, arboj for... Sed pendas
tiu parfumo: mi ĝis sentas.
Dek jarojn torturiĝas torde
ĉi lando, la panarboj morte
falas, sed ŝvelas ja pli forte
parfum' en mia kor' kaj via...

Tradukis: K. KALOCSAY

Birdflugiloj

Quang Huy

Jen ventas en arbaro krepuskanta,
sur la ĉielo nub' sur nubon iras,
bird' flugas supre kun flugilo blanka.
Sen ĉes' je voĉ' patrina mi sopiras.

Tradukis: L. TÁRKONY

Lingvaj problemoj en la Hungara Radio

Kiel la naciaj lingvoj, ankaŭ Esperanto devas akomodiĝi al la konstanta movo, progreso de la vivo, kaj sekve ĝi devas esprimi novajn nociojn, teknikajn, kemiajn novaĵojn, ĝis nun nekonatajn fenomenojn. La vortoj kreitaj per la diversaj afiksoj kaj kunmetaĵoj ofte estas pezaj, kaj eventuale diverĝas de la vortoj uzataj internacie. Alifoje mankas la eblo de esprimo de la nuancaj diferencoj. Krome elformiĝis iuspeca „ĵurnala lingvaĵo. Kion povas fari la „povra" tradukanto de la Radio? Ĉefe ĉe polititaj tekstoj, kie ankaŭ la nuancitaj esprimoj havas pezon, vole-nevole li kulpas „neologismon", pli ĝuste novan internacian vorton. Multaj tamen malaprobas tion. Ankaŭ la redakcio de la Esperanto-dissendoj de Radio Budapest ricevas de tempo al tempo leterojn kun tia enhavo. La leterskribanto atendas kompreneble respondon. Tian respondon ni prezentas nun el la programo de la Esperanto-dissendoj.

Pusztai: Nia nederlanda aŭskultanto, s-ro Krikke en sia alsendita letero malaprobas, ke ni uzas vortojn, neoficialajn, ekz-e *ascendi, descendi, vikendo, futuro, paseo, prezenco.* Kun la problemo lingva ni turnis nin al akademiano Kolomano Kalocsay. — Kara sinjoro Profesoro, kion Vi respondas al nia aŭskultanto?

Kalocsay: Multaj eble diros, ke vi turnas vin al neĝusta persono, ĉar mi estis plurfoje diskriata kiel danĝera akuŝisto de novaj vortoj. Efektive, mi opinias, ke en la literatura lingvo oni povas, eĉ devas uzi anstataŭ poezie neoportunaj vortoj neoficialajn, sed jam registritajn en la modernaj vortaroj. Sed en la Radio la afero estas alia, oni deziras ja esti komprenata de ĉiuj, eĉ de komencantoj. Tial mi aprobus, se anstataŭ la menciitaj vortoj oni uzus: *supreniri, malsupreniri, semajnfino.* Mi ne estus kontraŭ tio, se nia Radio tenus sin al la t. n. *baza radikaro,* nun ellaborata de la Akademio, krom, kompreneble, la nemalhaveblaj fakvortoj de la ĵurnalistiko. Sed tia simplismo ne estus bonvena en literaturaj tekstoj.

Rilate la du vortojn *futuro* kaj *paseo,* mi opinias, ke ili estas uzeblaj. *Futuro* ja enestas en la Plena Vortaro de SAT, eĉ ne en la Suplemento, sed en la ĉefparto. Krome, ĉiu konas la vortojn futurismo, futuristo, la vorto do apartenas al tiuj internaciaĵoj, kiuj, laŭ la 15-a § de la Fundamenta Gramatiko estas uzeblaj senskrupule. Tiom pli, ke tiujn du tempojn, la pasintan kaj la venontan, oni propre ne povas ĝuste nomi en Esperanto. *Estonto* kaj *estinto,* laŭ Zamenhof mem, signifas ne tempojn, sed personojn, estinteco kaj estonteco, kiel pruvis Walter Lippmann, iama gramatika Direktoro de la Akademio, signifas kvaliton: do ies estinteco estas ne ies pasinta tempo, sed ies iameco, neplu-ekzisto. Restus estontaĵo, estintaĵo, proponoj Zamenhofaj, sed tiel nekutimaj, ke apenaŭ oni komprenus nun ilin. Tial do futuro, kun sia nepra internacieco, estas vera savo. Koncerne la estintan tempon, same *pas* estas tre internacia (Angla: past, Franca: passé, Itala passato; Hispana: pasado). Kaj *paseo* estas ne nura prunto en la franca *passé,* sed la pluformado de la Esperanta *pas* per la vokalo *-e,* ekzistanta, kvazaŭ pseŭdosufikso kun nedifinita senco, en pluraj vortparoj. Jen: *muzo* kaj *muzeo, armo* kaj *armeo, jubilo* kaj *jubileo, paso* kaj *paseo.* La vorto prezenco, kontraŭe, povas resti en la gramatiko, ĉar por la ĉiutaga uzado ni havas la tre bonan vorton *nuntempo.* Do: *paseo, nuntempo, futuro,* mi pensas, ke tiom lerni troŝarĝas nenies cerbon.

*

La alia problemo estus tiu de ATA-ITA. Ni neniam publikis eĉ unu linion pri ĉi tiu batalo, de kiu longe ĉis la Esperanta mondo. Ankaŭ nun ni nur transprenas intervjuon dissenditan de la Hungara Radio.

Pusztai: En la UEA-revuo Esperanto, ni legis la decidon de Akademio de Esperanto pri la ATA-ITA-problemo. Ni vizitis do niajn du hungarajn akademianojn sinjorojn Kolomano Kalocsay kaj Ludoviko Tárkony, por demandi ilin, kion profitas Esperanto el tiu decido. Kara Profesoro Kalocsay, kio estas via opinio pri la decido?

Kalocsay: La t. n. ATA-ITA-problemo rilatas al la uzado de la participoj ĉe kelkaj formoj de la pasiva konjugacio, do la okazoj, ĉe kiuj la esperantistoj disopinias, estas efektive maloftaj, sed la sinteno de la disopiniantoj estis des pli batalema: gramatikistoj ŝajne neniam distingis sin per granda toleremo. En la Akademio eĉ estiĝis frakcio, t. n. Libera Akademia Rondo, por kulti la t. n. atismon, laŭ kiu la participaj finaĵoj esprimas sole tempo-rilatojn, dum laŭ la t. n. itistoj ATA (ekz-e estis konstruata) signifas agon komencitan sed ankoraŭ nefinitan, kaj ITA (ekz-e estas aŭ estis konstruita) esprimas ne nur iam antaŭe faratan agon, sed ankaŭ agon plene plenumitan kiel fakton. La demando nun jam havas vastan bibliografion kaj tion kelkaj opinias ridinda, sed aliflanke oni povas, kun iom da bonvolo, trovi ion respektindan en tio, ke la esperantologoj klopodas fari plenan ordon eĉ en tiaj detaldemandoj. Fari ordon — tio estis ankaŭ la intenco de pluraj Esperanto-institucioj, ili do adresis rektan demandon al la Akademio de Esperanto, kiun uzi el la du variantoj. La Akademio opiniis, ke decida povas esti la lingvouzo de Zamenhof, ne pro ia majstrokulto, sed ĉar estas oportune, se du partioj necedemaj povas trovi ian areopagon, kaj certe, la zamenhofa tradicio estas areopago memkompreneble pli valora kaj respektinda, ol se oni konsultas ekzemple suprenĵetintan moneron: ĉu kapo aŭ skribo? Nun la Akademio fiksis per voĉdono pri kvar provotekstoj ĝuste la zamenhofan uzadon de la participoj. Ni esperu, ke tio estas granda paŝo antaŭen al la dezirata kaj esperata reunuigo de niaj lingvistoj, kaj la partio, kies sistemo pruviĝis nezamenhofa, tamen cedos, ĉesigante, eĉ en tia detaldemandeto la disopinion, tiom pli, ke ankaŭ teorie ili ne sukcesis pravigi sian sistemon. Mi estas certa, ke ili ne lasos sin gvidi de motivoj de prestiĝo.

Pusztai: Kaj vi sinjoro Tárkony, kion vi opinias pri la problemoj post la decido?

Tárkony: Miaopinie, la ĝisnuna situacio, kiam diversaj lernolibroj instruis, eĉ se nur en detaldemando, ne tute tion saman, tute ne utilis al la lingvo. Se tio ĉesos, — kaj mi tre esperas, ke la disciplino de ĉiuj esperantistoj helpos tion ĉesigi, tio estos ĝojiga fakto. Tiom pli, ĉar laŭ mia opinio Esperanto nun staras antaŭ grandiozaj sukcesoj en la interkomuniĝo de plej diversaj kontinentanoj, en libroeldonoj, sur la tereno ekde la ĉiutaga vivo, ĝis la plej diversaj teknikaj branĉoj, sciencoj kaj artoj. Jen nobla tasko, kiu meritas, ke ĉiu esperantisto agadu por ĝi en plena, ankaŭ en gramatika harmonio.

EĤO–REEĤO

F-ino N. Hanson, Halifax, Anglujo. Ni ĝojas, ke vi legis kun granda interesiĝo la artikoleton „La hungara muzikhistorio", kaj ke vi estos dankema, se ni aperigos plurajn ĉapitrojn pri tiu temo. Ni dankas al vi la afablan rekonon, kaj — via deziro facile estos plenumata, ĉar membro de nia Red. Komitato — s-ano Lajos Lesznai — estas konata fakulo de la hungara muzikologio.

*

Niaj nederlandaj legantoj. Ni informiĝis kun kontentiĝo, ke nova volumo de nia kara forpasinta Julio Baghy estas en preparo en via lando, kie nia Paĉjo ankaŭ nun havas multajn disĉiplojn. Ni sciiĝis ankaŭ pri tio, ke la novelo de nia kolego Szilárd Bálint „Rompŝtelisto en la vilaĝo" baldaŭ aperos ankaŭ en nederlanda lingvo.

*

Antal Kapusi, kuracisto, Targu Mureš, Rumanio. Dum la okjara aperado de H. V. ni ricevis diversajn proponojn por transformo de nia revuo. La unua propono estas: el H. V. fariĝu posteulo de Literatura Mondo, kun tiu aŭ kun simila titolo. Do ni devas sekvi la enhavon, universalecon, artismon ktp. de tiu ĉi plej fama revuo. La dua propono estas: el H. V. fariĝu iu bildgazeto, kun multaj ilustraĵoj kaj kun multe da tekso. La tria propono estis, ke H. V. rezigninte pri la memstareco, petu la eldonejon de pluraj fremdlingvaj revuoj, ke H. V. fariĝu unu el la frat-revuoj. La kvara propono estas — kaj tiun ĉi proponon nun detale vi motivis, ke tri revuoj: „Bulgario, Hungara Vivo kaj Suda Stelo interkompreniĝu pri la eldono de — komence nur okaza — komuna numero. Niaj spertoj instruis nin pri tio: kvankam oni povus elpensi teorie pli plaĉajn aŭ pli konvenajn formojn, ol la ĝisnuna, tamen el multaj praktikaj vidpunktoj ni daŭrigu la jam komencitan vojon, kaj ni efektivigu la ideojn por la plibonigo inter la jam ekzistantaj kadroj kaj kondiĉoj. La Esperanto-movado jam perdis multegajn fortojn pro fiasko de nesufiĉe pripensitaj planoj.

*

Marjorie Boulton, Anglujo. Unue: sincere ni dankas vin pro la belega poemo, aperigita en nia nuna numero. Due: ni ricevis la libroliston de grava angla eldonejo, kaj ni konstatas, ke vi estas aŭtorino de kvar lingvaj, resp. literaturaj verkoj (en Esperanto): La anatomio de la lingvo. — La anatomio de la prozo. — La anatomio de la poezio. — La anatomio de la dramo. — Kredu al ni, kara Profesorinoi ke ĉiu laboranto por la Esperanta literaturo fieras ankaŭ pro viaj anglalingvaj bazverkoj. Ĉu estus aŭdaca deziro, ke ankaŭ en Esperanto ni posedu baldaŭ similajn verkojn?

*

István Kamjén, hungara verkisto, Budapeŝto. Via novelo sub titolo „Unu minuto" aperis en Hungara Vivo. Ĝoje ni konstatis, ke tiu ĉi kontraŭmilita, animskua novelo aperis ankaŭ en Esperanta Finnlando, Bulgara Esperantisto, Monda Kulturo, Kontakto kaj la Sveda E-Gazeto, La Espero. La sama novelo en traduko de Sándor Szalay — en ses gazetoj de Esperanto dokumentas ne nur pri la talento de la hungara aŭtoro, sed ankaŭ pri la pacifista-pacbatalanta spirito de multaj gazetoj de Esperanto.

*

J. I. Atanasov, Sofio. Vi sendis al ni artikoleton pri granda filo de nia popolo, Sándor Petőfi. Kiel vi skribis, Petőfi en Bulgario estas kara, amata poeto, kaj oni tradukis multajn poemojn de Petőfi en la bulgaran. Ĝoje ni informiĝis, ke en Sofio estas strato de Sándor Petőfi kaj alia strato pri Lajos Kossuth. „Kiel Petőfi, tiel ankaŭ la granda bulgara poeto-revoluciulo Ĥristo Botev (25. XII. 1848—20. V. 1876), verkis, batalis kaj pereis por la libero de Bulgario ankaŭ tre juna." Ni informas vin, kara Amiko, ke la 2-a numero de Hungara Vivo havis gravan artikolon ĝuste pri nia plej eminenta poeto Sándor Petőfi, kaj la artikolo finiĝas per la konstato, ke baldaŭ eldoniĝos en Esperanto „Elektitaj poemoj de Sándor Petőfi" en traduko de Kalocsay. Ni esperas, ke tiu ĉi informo havos indan eĥon ĉe ĉiuj niaj legantoj.

*

Koran gratulon al la oficistinoj de la informservo de la telefono de Budapeŝto! Vi respondas afable ne nur al demandoj pri la meteorologia prognozo, pri la preciza tempo, pri gravaj politikaj problemoj, kaj dissendas fabelojn al la infanoj, sed respondas servoprete al la plej diversaj, eĉ strangaj demandoj. La afablaj oficistinoj ne facile perdas sian kapon. Antaŭ nelonge iu demandis per telefono: Mi petas vin, bonvolu diri, ĉu la hungara fervojo transportas kelkajn milojn da papilioj en malfermata vagono? La oficistino ĉe la telefono tuj respondis: Jes, sinjoro, nur la ekspedanto devas kunligi per ŝnuro ĉiujn papiliojn unu al la alia.

RECENZO

BONE ! — Poemo de l'Oktobro, de Vladimir *Majakovskij*. — El rusa lingvo trad. K. *Gusev*. — Eld. Komisiono de Sovetaj Esperantistoj, Moskvo 1967. — 108 paĝoj.

„Haraŝo" estas la originala titolo de la grandega revolucia poemo de Majakovskij verkita en 1927. — La 19-an de julio ĉi-jare rememoris la mondo pri Majakovskij, okaze de la 75-a datreveno de lia naskiĝtago. — La „poeto de la revolucio" — kiel oni nomas lin — en tiu poemo fidele respegulas tiun historian epokon, kiu komenciĝis per la Granda Oktobra Socialisma Revolucio.

Tempo
estas aĵo
longa kaj kolosa.
Estis kaj forpasis
la epok' eposa

Per tiuj cititaj linioj komenciĝas la elstara poemtraduko de K. Gusev kun titolo: Bone !, kiu ebligas por la poemamanta esperantista legantaro ĝui la brilan verkon de Majakovskij. Ĝi kronike rakontas pri la revoluciaj jaroj, pri la heroa batalo de la bolŝevikoj kontraŭ la en- kaj eksterlandaj malamikoj; rakontas pri ĉiutagaj suferoj, malsatoj, mizeroj kaj aliaj malfacilaĵoj, pri glora venko kaj pri la konstruado de la nova vivo. — La aldonita detala komento helpas la legantojn bone kompreni la eventojn esprimitajn per aludoj. Estas bedaŭrata afero — kiu malpliigas nian ĝojon dum legado — ke la libreto el tipografia vidpunkto estas malkonvena. Kelkloke ĝi estas legebla malfacile aŭ tute ne.

Entute: Bone ! estas grandvalora tradukaĵo de la grandvalora „Haraŝo".

Ada Csiszár

Fajro sur mia lango — poemaro de Edwin De Kock — Eld. Stafeto, La Laguna, 1967. 119 paĝoj. 18×12 cm.

La unua poemaro — Ombroj de la kvara dimensio — de Edwin De Kock vekis vastan diskuton en la literatura mondo. Verŝajne okazos same rilate al la nuna poemaro: Fajro sur mia lango.

Bedaŭrinde la sud-afrikana poeto ne sekvas la poetikan tradicion. En la prologo de la volumo Edwin De Kock donas klarigon pri sia verstekniko, pri la rolo de trokeo, pri la „neŭtrala takto". Li ŝatas uzi kunmetitajn vortojn surprizajn: „korpkajuto", „konsciencretino", „cerbsankteco" ktp La temaro de la poeto estas tre riĉa, en la versaĵoj montriĝas la forta imago. Tre efikaj estas liaj metaforoj, alegorioj:

Akre brila klingo de la horo
faras sonan tranĉon tra l' silento

La poezio de E. De Kock estas tre multkolora kaj spegulas simpatian amanton de la homo (ĉiu raso). Tiu ĉi poemaro povas esti tre interesa por versamantoj, kiuj okupas sin pli funde pri la poezio.

Ada Csiszár

Tra la Soveta Ukrainio. Eld. Ukraina Societo de Amikeco kaj Kulturaj Rilatoj kun Eksteraj Landoj (Kiev-21, str. Kirova 5.a.) Speciala eldono, redaktita de Nadija Andrianova. 41 p. — Korege ni salutas la enhavriĉan eldonaĵon. Ĉiuj artikoloj estas interesaj, ĉu ni legas pri la cibernetiko kaj progreso de la homaro, ĉu pri la kapelo de banduristoj (iuspecaj muzikistoj), ĉu pri la historiaj relikvoj de Ukrainio, ĉu pri la legenda vivo de la blinda verkisto-esperantisto V. Jeroŝenko, el plumo de la redaktorino. Jeroŝenko apartenas al la plej gloraj figuroj de la Esperanto-kulturo (1890—1952). Nun ni konatiĝas kun lia vivovojo. Li estis kvarjara, kiam fariĝis blinda, sed malgraŭ tio — per konstanta streĉo de la fortoj — li fariĝis multflanka bonega muzikisto, kantisto, deklamisto, travojaĝis multajn landojn, perfekte scipovis 12 lingvojn. Liaj verkoj krom en Esperanto aperis ankaŭ en rusa, japana kaj ĉina lingvoj. — En la gazeto troviĝas ankaŭ poemoj el la estonta „Antologio de ukraina literaturo en Esperanto". Ni ne hezitas konfesi: ni soifegas al verkoj de la rusa, ukraina ktp. literaturo en senriproĉa Esperanto, kia estas tiu ĉi numero.

L. Kökény

27 belegaj fotoj, ĉiuj sur aparta kartono pri Soveta Ukrainio, kiel aldonaĵoj al la recenzita gazeto. Tre bela laboraĵo ! La fotoj certe taŭgas kiel materialo por lumbildparolado, precipe ĉar la klarigaj tekstoj estas sufiĉe detalaj.

Norda Prismo, 1968/1—2. n-ro 64 p. Ni treege ĝojas, ke denove ni povis ricevi (fine de septembro) la kulturan, socian, literaturan revuon, unikan en nia Esperanto-preso. La nova ĉefredaktoro William Auld — kiun ni salutas kolege kaj korege — skribis en sia gvidartikolo, ke „Mi firme opinias, ke la linio de Szilágyi montriĝis tra la jaroj taŭga kaj efika, kaj tia ĝi restu." Jen, tre saĝe pripensitaj vortoj de unu el niaj plej eminentaj literaturistoj. Kion ni diru pri la enhavo? Riĉa, eĉ riĉega ! Varia, eĉ variega ! Membro de la fama „Kvaropo" John Francis meditas pri la mistaksita duopo, Zamenhof kaj Baghy. Li konstatas, ke „Zamenhof ne povas plu protesti, kaj Baghy certe neniam estus batinta la bruston postulante, „Rigardu min. Mi estas pli talenta verkisto, ol vi supozis." Ekkoni lin estis ekami lin, ĉu la konateco estis rekta aŭ pere de liaj verkoj, kaj tiu lia amindeco nutros la legendon, ĉar estus hereze, sugesti ke homo tiel aminda povis esti vere eminenta ..." Bedaŭrinde estas eĉ hodiaŭ aktuala la poemo de Henrik Ibsen „La murdo al Abraham Lincoln". Veraj spicaĵoj estas: artikolo pri la familia vivo en la hejmo de Marko Zamenhof, kaj alia artikolo pri la moderna literaturo en Aŭstrujo. Kion ni deziru al nia fratgazeto? Ĝi fariĝu stabila, havu multegajn abonantojn, kiel eble plej multajn legantojn ankaŭ en Hungario. Tiel valorega revuo — fondita kaj redaktita de nia kara Ferenc Szilágyi — estas fieraĵo de ni ĉiuj !

L. Kökény

Rememoro pri la 6-a Somera Esperanto-Universitato en Gyula

Kiun ankoraŭ ne kaptis deziro denove viziti pejzaĝon kies beleco foje ravis lin? Kiu ne sentis magnetan altiron al lokoj, kies historiaj, artaj trezoroj faris fortajn impresojn al li? Kaj ne lastvice, kiu ne volonte refreŝigus personajn interrilatojn kun homoj en kies societo la tempo flugas utile kaj agrable.

Tian nostalgion vekis en mi la invitilo al la 6-a SEU en Gyula. La scenejo de tiu aranĝaĵo estas ja ĉarma ĝardenurbo. Kvankam ĝi situas sur la Granda Ebenaĵo, tamen arboj kaj floroj akceptas la gastojn. Se vi uzas la strandkurac- kaj termalbanejojn en la arboplena parko de iama grafa kastelo, vi sentas vin jam ekster la muroj en la freŝa naturo. Se vekiĝas en vi la deziro pilgrimi al historiaj scenejoj, vi certe vizitos la mezepokan brikfortikaĵon, aŭtentikan reprezentanton de tiaspecaj maloftaj konstruaĵoj. Sed ankaŭ aliaj artobjektojn kaj vidindaĵojn proponas al vi la gastama loĝantaro de Gyula, kiu jam trovas tute kutima la ĉiujaran regulan alvenon de la SEU-anoj.

En tia kadro kaj agrabla etoso komenciĝis kun la 6-a semestro la dua kvinjara periodo de SEU.

En la parada granda salono de la Urba Magistrata Domo ornamita ekstere kaj interne per niaj verdaj standardoj, la 7-an de Julio dimanĉe kunvenis filoj de 11 nacioj por partopreni la solenan malfermon. Forflugis la lastaj akordoj de la Himnoj hungara kaj Esperanta, kiam la prezidanto de la magistrato d-ro István Vidó amplene salutis en la nomo de la urba loĝantaro la en- kaj eksterlandajn gastojn. Li esprimis sian deziron, ke la partoprenantoj de la universitato fartu hejmece, ĉar tiel ankoraŭ pli sincere, pli amike fortiĝas la penso per la lingvo internacia de la paco kaj amikeco.

Ankaŭ la reprezentanto de HEA emfazis en sia salutparolo, ke la nunjaran someran universitaton oni aranĝas sub signo de la paca kunvivado kaj frateco kondamnante la militon, kiu endanĝerigas la trankvilan kulturan evoluon. Cetere aludinte al artikolo de angla ĵurnalisto Bill Keable el Londono, aperinta en „The British Esperantist", li aprecis la ĝisnunan kvinjaran laboron de SEU, kaj substrekis per detalaj indikoj ĝian vere altkvalitan funkcion kaj asertis, ke la pasinteco de SEU estas garantiaĵo por la estonto.

La esenco de la parolo de prof. Imre Kádár (sekretario, organiza spirito kaj ĉefa motoro de SEU) harmoniis kun tiu de la antaŭaj oratoraĵoj. Nia universitato klopodas: doni konojn pri nia patrujo, pri la mondo nin ĉirkaŭanta kaj per plilarĝigo de nia spirita horizonto plialtigi la internacian komprenon de la bonvolaj homoj.

El la naŭ diverstemaj lekcioj la unuan: „Universala deklaracio de la homaj rajtoj" laŭtlegis, pro malsano de pola redaktoro Aleksi Lasinski, pola ingeniero Glajcar Zdzistan. La aŭtoro memorigis nin ke, ĝuste antaŭ 20 jaroj kunsidis en Vroclav (Breslau) la Internacia Kongreso de Intelektuloj por defendo de la paco. Ili deklaris inter aliaj: „La nacioj de la mondo ne volas la militon kaj posedas sufiĉe da fortoj por defendi la pacon kaj kulturon kontraŭ fiaj intencoj de la nova faŝismo". Iom pesimisme notis la aŭtoro ke la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj nur morale obligacias la membroŝtatojn de UNO, tamen li rekonis, ke la mondo multe ŝuldas al la organizaĵo de UNO, kiu ne unufoje malebligis la eksplodon de la tria mondmilito. Por realigi la Deklaracion en la tuta mondo, estas necese transformi la homan psikon jam de la frua infanaĝo en la lernejoj. Trafe li citis polan proverbon: „Kion la ŝelo junaĝe absorbas, per tio ĝi maljunaĝe odoras".

La enkondukan prelegadon sekvis sinsekve, dum la semajno, diversaj traktatoj. La stabo de SEU denove regalis nin abunde, varie. Ni aŭdis lekcion pri „La realigo de la Delta Plano" de s-ro Gerardo Roelofs el Nederlando. Vere estis tre interese aŭdi kaj vidi tiujn heroajn fortostreĉojn, kiujn faris malgranda popolo kontraŭ la detruanta kolero de la Norda maro, kiu kaŭzis lastfoje en 1953 katastrofon postulantan — krom granda materiala damaĝo — preskaŭ 2000 homajn vivojn. La grandioza plano celas reakiri teron forrabitan fare de la maro kaj samtempe sekurigi la landon kontraŭ la menciitaj kataklismoj.

Ĉu ekzistas vivuloj en la Universo krom la teraj? Kiamaniere oni povus ekscii la ekziston de la malproksimaj inteligentuloj? Ĉu ni povus viziti ilin? Ĉu ili jam vizitis nin? Aŭ eble ili jam delonge flugadas ĉirkaŭ nia Tero, aliel ĉu ekzistas „flugantaj subtasoj"? Ĉu eble la eksterteranoj jam en la malnovaj tempoj faris vizitojn transdoninte ilian altan kulturon, do la tera kulturo ne estas tute originala? Jen la demandoj, kiuj ĝis maksimumo strečis la kordojn de scivolemo de la aŭskultantoj. Ni ricevis respondojn en la prelegado pri „La demando de la ekstertera vivo". La aŭtoro Aurél Ponori Thewrewk v. direktoro de ob-



Boata lago apud la Fortikaĵo

servatorio „Uránia" en Budapeŝto estis longe aplaŭdata pro sia eksterordinare interesa kaj bonege komprenebla prezentado. Ni zorgis, ke la studo — almenaŭ ekstrakte — estu je dispono de la legantoj de HV.

En teknikan sferon kondukis nin d-ro István Bácskai, vicprezidanto de HEA per sia prelegado pri „La konstruata subtera fervojo en Budapest". Ni eksciis, ke la tradiciaj veturiloj jam ne kontentigas la pretendojn de la konstante kreskanta trafiko en Budapest. La nuna subkrusta fervojo — funkcianta kiel la unua en Eŭropo jam de post 1897 — ne kapablas solvi la problemon. Necesas modernaj veturiloj, sed pro manko de loko surtera, oni devas ilin trafikigi en profundo de 30—35 metroj. Alian problemon kaŭzas la fakto, ke la subkrusta tavolo ne estas ŝtoneca, sed ofte akvoza. Tio postulas specialan teknologion ĉe la tunelborado. Rezulte de longjara serioza laboro, la orient-okcidenta fervojo trafikos en 1970 ĝis la Danubo kaj liveros jare milionojn da pasaĝeroj.

Plej novan branĉon de la scienco montris al ni d-ro Dániel Muszka kaj prof. Ferenc Vajda. Ilia temo „Cibernetikaj modeloj" certe estis por multaj interesa novaĵo.

Veran ĝuon naskis por la naturamantoj la demonstraj prelegadoj „Tra la Neretna-valo" el plumo de inĝeniero Lajos Szekeres, Jugoslavio kaj „La regiono de riveroj Körös" kolektiva prisk-

ribo de prof. György Hursán kaj d-ro Bálint Szemenyei, Hungarlando.

Ne mankis ankaŭ artaj programeroj en la repertuaro. Inter ili estis la prelegado de s-ro Johano Sevdiĉ (Jugoslavio) pri la „Freskoj en Vojvodino". La muzike ilustritan prelegadon pri „La hungara popolkanto II" faris prof. Imre Kádár lerte donante daŭrigon de la pasintjara bonsukcesa I-a parto. Noblan sopiron plenumis al la artamantoj ankaŭ la balet-danĉoro de Pécs en la Fortikaĵo kaj la hungara vespero.

Resume: *faktoj parolas! Kaj la faktoj montras, ke la stabo de la somera universitato en Gyula progresas en bona direkto. SEU paŝis denove antaŭen. Tion pruvas, ke en Washington (Usono) oni metis SEU-n en la vicon de la internaciaj kulturaj aranĝaĵoj kaj rekonante ĝian signifon ankaŭ en Hungarlando SEU estis registrita kiel tutlanda somera aranĝaĵo.*

La dankema partoprenantaro aŭskultante la fermparolojn de Sándor G. Enyedi (prezidanto de SEU), Mihály Dumitrás (prezidanto de Békés-departementa Esp. Komitato) kaj Imre Kádár (sekretario de SEU) certe rajtigas ilin esti enregistritaj en la jarlibro de la nunjara SEU: eminente klasifikata.

d-ro Jozefo MÁTÉFFY

LASTA LETERO

MARJORIE BOULTON

Kara Julio, kara, Julio, tre, tre kara,
Al vi, sed ne plu por vi, mi skribas nun leteron;
en horo dankoplena, kaj tamen tre amara,
mi volas nun arkivi ian aldonan veron.

Listo de viaj verkoj haveblas ja facile;
poeton, oratoron, la mondo jam lamentis;
sidadis vi dum horoj, konsole kaj trankvile,
flanke de mia lito dum febro min turmentis.

Kiam mi vin revidas per iluzia vido,
mi vidas vin fleganta, resentas la kompaton,
aŭ ĉe la hejma fajro, ronronan en plenfido,
vidas sur via sino mian amatan katon.

Kara Julio, kara! la manoj nun memoras
abundajn manoplenojn de riĉaj grizaj haroj;
arĝentas via kapo; sed en animo oras
interparoloj viglaj sur fremdaj trotuaroj.

„Ne savu la homaron; nur servu ĝin," vi diris;
aŭ saltis de etiko al pipraj anekdotoj;
antaŭ infana belo vi vivadore miris,
mimikis pri fuŝuloj, koleris pri despotoj.

Pri viaj ĝojokrioj kaj malaprobaj grakoj
kaj nebridebla rido, memoros mi ĉiame;
memoras mi ĉiame pri viaj premaj brakoj;
kiel vi spontaneis, kiel liberis ame!

Vi vivis baraktante kun menso tre libera;
sen klerigada helpo vi estis hom' kultura;
inter fiuloj falsaj vi restis plej sincera;
en verkoj kaj en vivo brilis la koro pura.

De pergamenaj lipoj mi prenis lastajn kisojn,
kaj via bela skribo neniam plu salutos;
printempo nun denove alportos la narcisojn,
vane sur vian tombon ni vivajn florojn ŝutos.

Ho manoj karespretaj, eble nun larvoplenaj!
Ho esprimriĉa korpo putranta en la grundo!
Kiaj riĉaĵoj rozaj, tritikaj kaj jasmenaj
devus elkreski vivaj en tia cerb-fekundo!

Sed falsas la simbolo; nur larvoj nun realas,
kaj nur memoroj restas — memoroj de mortontoj.
Kadukiĝantaj cerboj serie mallojalas;
ho sangaj sunsubiroj, ho grizaj horizontoj!

Tamen vi daŭre vivas pli ol vivantoj multaj,
la verkoj nun postvivas la vivotragedion;
inter etmensaj homoj, vantaj, kruelaj, stultaj,
vi portis ian benon, disdonis vian vion.

Vi longe suferadis, vi plene mortopretis;
nun restas viaj pensoj, la aminstruo klara.
La torĉon vi redonis. La krucon vi demetis.
Restas eterna danko, Julio, tre, tre kara.

Mozaiko pri la vivo de Julio Baghy

En „ERA"

Antaŭ nelonge, ke nia kara Paĉjo forlasis nin, denove aperis lia lernolibro, bone konata de ĉiuj esperantistoj (la kvina eldono). Mi tuj aĉetis ĝin, kaj baldaŭ kiam Paĉjo vizitis la Fervojistan Klubon, mi petis lin, skribu kelkajn memorvortojn en ĝi. Li dediĉis jene: „Al iama Kokcinelo, kun ĉiama paĉja simpatio."

Al tiu ĉi dediĉo apartenas historia parto de la Esperantomovado. Nome, en la jaroj 1922—23 oni fondis grupon, sub la nomo „ERA". (Esperanto Rondo Amika). La klubo estis en la strato Eötvös n-ro 3. Inter la fondintoj troviĝis eminentaj gesamideanoj, kiuj klopodis, ke la kunvenoj estu ĉiam altnivelaj, amuzaj eĉ viglaj. Oni faris ĉiusemajne diversajn prezentadojn, sed la plej grava tasko estis la instruado de Esperanto. Oni fondis grupetojn, kiuj havis proprajn instruistojn. Plej entuziasme, plej vigle kaj bonhumore instruis nia kara Paĉjo mem.

Pri tiuj jaroj oni povus rakonti ankoraŭ gravajn, seriozajn okazaĵojn, ĉar dum la tiamaj reĝimoj troviĝis pli multaj malfacilaĵoj por la esperantistaro, ol en la nunaj tagoj. Tiam neniu helpis al la entuziasmaj gejunuloj. Ili mem devis solvi siajn materialajn kaj aliajn problemojn.

Malgraŭ tio, ke por la junularo la vivo tiam estis tre malfacila, tamen se mi memoras pri tiuj jaroj, mia animo pleniĝas de belegaj sentoj. Kiam ni kunvenis en la klubo, forlasis nin la senespero, ĉar la „Paĉja" atmosfero estis ĉiam gajiga.

Ĉarma kutimo de Paĉjo estis, ke por ĉiuj disĉiploj li donis karesnomon. Ankoraŭ vivas kelkaj samideanoj, kiuj uzas tiujn karesnomojn, memkompreneble ne sur la vizitkartoj, ne oficiale, sed en sia koro, animo, memore je la junaĝaj tempoj kaj je Paĉjo por ni ĉiam viva.

Marta NÁDASDI
la iama Kokcinelo

En intima rondo

Mi lernis Esperanton de nia kara Paĉjo. En la instruhoroj mi estis ofte en embaraso, kaj foje diris al mi Julio Baghy: Vi estos Esperantisto, kiam mi fariĝos papo en Romo. Sed mi malhelpis per ĉiuj fortoj, ke el Paĉjo fariĝu papo, do mi alproprigis kontentige Esperanton, kiun mi gardas por mia tuta vivo kiel plej gravan trezoron. Kaj alvenis la tempo, kiam en 1933 mi gvidis mian unuan kurson en la Presista Sindikato. La kurson malfermis per belaj vortoj ĝuste nia Paĉjo. — Julio Baghy dum jaroj aliĝis al la ekskursoj de la presistoj. Li tre ŝatis-amis la laboristojn, ofte li ĉirkaŭbrakis po du el ili, kaj diris: Mi fartas inter vi, kiel inter gefratoj. Precipe multe ni ekskursis al Szigetmonostor, kie Paĉjo por la memorlibro de la tiea turista domo verkis hungarlingvan poemon.

Paĉjo ofte restadis en nia malgranda loĝejo. Ĉe ni estis aranĝitaj tri- aŭ kvarfoje modestaj festenoj okaze de lia naskiĝtago. Vizitis nin foje nia alia adorata poeto Kolomano Kalocsay. Tiam nia hejmo estis vere plenplena. Multaj vortoj kaj rideto de Julio Baghy ankaŭ nun ŝvebas en la aero de nia loĝejo.

Mici JURÁK

En la presejo

Estis jaroj, kiam ĉiutage mi estis kun Julio Baghy en mia presejo. Mi kompostis la poemaron „La vagabondo kantas", la verkojn „Verdaj Donkiĥotoj", „Sur sanga tero" kaj lian lernolibron. Intertempe li rakontis pri sia longa militkaptiteco, pri siaj vojaĝoj.

Pleje kortuŝis min la romano „La verda koro". Kiam mi pretigis ĝin, ĉiu frumatene Paĉjo vizitis min, kaj interesiĝis, kiom mi kompostis ĝis tiam. Kune ni priparolis la paĝumadon kaj ni ambaŭ ridetante ĝojis, kiam ni trovis la plaĉan solvon.

La tutan romanon mi mem kompostis kaj mi eĉ tute travivis ĝin. Kaj kiam komenciĝis la presado, li staris senpacience ĉe la presmaŝino, kaj rigardis la unuan ekzempleron.

Foje longe ni paroladis pri la historio de Hungario, pri la suferoj de la hungara popolo. Paĉjo amis la homojn de ĉiu nacio, sed li estis hungaro. Tiu ĉi longa parolado donis penson al li por verki la poemon „Danuba voĉo", en kiu li rakontis la enhavon de nia parolado. Post kelkaj tagoj li deklamis — kredeble la unuan fojon por mi — la poemon.

Sándor SZALAY

Kune en la hospitalo

Aŭtune de 1963 dum semajno mi kuŝis en dupersona ĉambro kun Julio Baghy en la hospitalo László en Budapeŝto. Nia kara ĉefkuracisto estis Kolomano Kalocsay, kiu vizitante nian ĉambron, estis ĉiam serena kaj helpema. Imagu nur, kiel mi sentis min, en proksimeco de du elstaraj spiritoj de nia kulturo. Julio Baghy legis dum horoj, korespondadis diligente, kaj kiel pli intima hospitalulo, li instruis min pri la tagordo, pri la kutimoj kaj ankaŭ pri la afablaj flegistinoj. Ĉar mi suferetis ankaŭ pro artrito, foje li ŝmiradis mian dorson per la medikamento „Gerosan". Do li praktikis la homecon ne nur en poemoj. Kaj kiel dolĉe li priridis min, kiam muso (ĉu musego?) kaŝe ek-ekaperis en nia banĉambro, kaj min kaptis iuspeca timemo pro la neinvitita gasteto.

L. KÖKÉNY

En sindikata ripozejo en 1966

La 18-an de julio 1966 mi somerumis kun mia edzo dum du semajnoj en la sindikata ripozejo en Mátrafüred. En la apuda ĉambreto ripozadis Julio Baghy. Mi tiam ekkonis lin kiel homon kaj kiel — malsanulon. Ĉiutage ni triope promenis al la restoracio, situinta iom malproksime de nia ripozejo. Paĉjo ne povis multe piediri, la spirado pro la astmo estis por li ofte peza. Post la tagmanĝo li ekkuŝis. Vespere li estis pli freŝa, li okupis sian lokon antaŭ la televidaparato, kaj rigardis ĉion. Spektante futbal-matĉon li ofte kondutis kiel ĝenerale la zelotoj. Pleje li ŝatis la finalajn konkursojn de la danckantofestivalo. Precipe li laŭdis la kantadon de Kati Kovács, kaj diris, ke ŝi kantas tiel efike, ĉar travivas ĉion. Tiuj du semajnoj vere montris al mi la homon, kiu ŝatis la belaĵojn, la vivon mem, sed ne foje li aludis al tio, ke li jam nelonge restos inter ni, kvankam li volus ankoraŭ verki multe, multege.

Maria KÖKÉNY

Paĉjo verkis multe en Miskolc

Julio Baghy estis la homo, kiun neniu povas anstataŭi. Ni ĉiuj vidis lin per niaj korpaj okuloj — la grizharan, plendantan, suferantan, eĉ kapricxan, sed ĉiam bonkoran maljunulon. Sed kiu havis kapablon kaj ĉefe amon rigardi lin per animaj okuloj, tiu povis ekkoni la admirindan homon, la sagace bonhumuran poeton, kiu eĉ dum sia suferado povis ludi per la vortoj, amuzante la aliajn. Kiu povis vidi lin inter la infanoj, kiujn li rekontis, kiuj ĉirkaŭbrakis sian amatan „Oĉjo-Paĉjon", neniam povos forgesi tiun bildon. La infanoj en Szirmabesenyő ankaŭ nun ame eĉ larme rememoras pri li.

Kiel komenciĝis nia amikeco? Dum babilado li menciis sian fratineton, perditan ankoraŭ en lia frua infanaĝo. Ankaŭ mi havis fraton, kiun mi perdis dum la terura milito, kaj kiun Paĉjo bone konis, mia kara frato Jozefo Vári ja estis entuziasma samideano.

Nia Paĉjo estis vere tiu de la esperantistoj en Miskolc, kiu urbo dum la lastaj jaroj estis azilo por li, kie li ripozadis, provis sanigi sin. En ĉi tiu urbo vivis iam liaj parencoj, geavoj, gepatroj, kiuj rolis tie ĉi kiel aktoroj en la teatro, kaj ankaŭ li mem dum la infanaĝo. Li ege ŝatis en nia loĝejo la lokon en la fotelo apud la varma kahelforno. En nia klubo ni povis ĝui liajn prezentadojn, spontanajn, sed valorajn.

Post unu-du-taga ripozo en Miskolc li komencis verkadi. En Miskolc li finis la fabelojn de sia lasta mirinda verko „Ĉielarko". Estis plezure vidi lin trankvile labori — dume li manĝis preskaŭ senrimarke la manĝaĵojn de sur la apudmetita pleto, trinkis la kafon aŭ teon por akiri novan forton. Ho, kiel li povis deklami! Li elkore laŭtlegis siajn verkojn, kiujn ni surbendigis. Ĉe ni li verkis ankaŭ la poemon „Cirka ĉevalo". Foje mi menciis al li, ke vojaĝonte hejmen, ankaŭ tie iu atendos lin. Do, okazis tiel, kaj venis letero kun la poemo „Ĉiam iu nin atendas".

Mi finas miajn rememorojn per mallonga poemo, kiun li verkis en la vagonaro vojaĝinte de Miskolc hejmen al Budapeŝto. Tiu ĉi poemeto kiu estas ligita al lia restado en Miskolc, ĝis nun ne aperis, sed estu adresata al multaj aliaj geamikoj de nia kara Paĉjo.

Aserto kaj refuto

„Facile estos al vi;
vi nun vojaĝos for . . .
Turmente iĝos al mi;
mi restos plu en sol' . . . "
„Eraris vi tre, kara.
Nun plendas kora kri';
distanco, la barbara,
al vi min ĉenas pli . . ."

Márta VÁRI

La mistrafo

Kiam mi, kiel deksesjara knabo, volis komenci la lernadon de la lingvo Esperanto, ankoraŭ ne estis aĉetebla en la vendejoj lernolibro. Mi eniris en la centrejon de HEA. Jam estis ĉirkaŭ la sesa posttagmeze, en la kontoro mi trovis nur viron kaj virinon. Mi petis lin, ke li donu kelkajn konsilojn al la studado. Sed unue mi demandis lin:

— Ĉu Vi scias Esperanton?

— Jes, malmulte — li respondis modeste, kaj retenis rideton.

Tiam ekparolis la virino, demandante min:

— Ĉu vi scias, kun kiu vi parolas?

— Pardonon al mi, sed mi eĉ ideon ne havas pri tio.

La virino diris:

— Li estas JULIO BAGHY.

István VÁSÁRHELYI

Festo ĉe la naskiĝdomo

Kiel programpunkto de nia V-a Internacia Esperanto-Seminario, en la nomo de la Kulturkomisiono de la Urba Konsilantaro kaj en la nomo de la Departementa Komitato de la Hungara Esperanto-Asocio, ni inaŭguras kaj kronas la memortabulon de Julio Baghy sur lia naskiĝdomo. La memortabulon de tiu viro, kiu estis eminenta apostolo de Esperanto, klasika verkisto kaj poeto, kolono de la originala Esperanta literaturo, tutmonde konata kiel ĉies „Paĉjo".

Esperanto havas profundan tradicion en Szeged. En 1907 oni aranĝis la unuan internacian stenografian ekspozicion Esperantan, en 1912 la esperantistoj fondis la unuan grupon sub la titolo: FRATECO". Ankaŭ multaj el niaj poetoj kaj verkistoj lokaj, kiel Julio Juhász, Francisko Móra, Stefano Tömörkény, varme subtenis nian movadon. — En 1922, kiam la esperantistoj aranĝis ekspozicion, ĝin ĉeestis nia poeto Julio Juhász, kiu raportis poste jene: „Hieraŭ antaŭtagmeze mi estis en kapeleto intelekta, kie mi partoprenis homomaĝon."

Mi diris, ke Esperanto havas tradicion en Szeged, jes, fine sed ne lastavice ĝuste pro tio, ke ĉi tie, en tiu ĉi urbo, en tiu ĉi domo naskiĝis Julio Baghy.

Julio Baghy ĉiam entuziasme kaj pasie servis Esperanton, oferinte plenan forton de sia vivo por nia kara lingvo. En la militkaptitejo, en Siberio li verkis sian unuan poemaron: „Preter la vivo", en kiu li prikantas siajn personajn travivaĵojn. Julio Baghy ne vivis vane. Li donis al ni veran ĝojon kaj kuraĝon per siaj manifestadoj, liaj verkoj post longa-longa tempo, post jarcentoj, post jarmiloj resonos en la koroj, en la animoj de tiuj homoj, kiuj parolos la Internacian Lingvon.

Julio Baghy per siaj verkoj kiel ĈIELARKO kolorigas kaj transportas la vastajn distancojn inter la diversnacilingvaj popoloj, ja „ĈIELARKO" estas la titolo de lia lasta poezia verko, perlo, diamanto de la originala Esperanto-literaturo.

Kaj nun kun granda estimo, respekto kaj dankemo, kun profunda emocio mi klinas la kapon antaŭ la brila, eterne vivanta memoro de Julio Baghy, mi klinas la kapon en la nomo de la Verda Amikaro, en la nomo de la Verdaj Gefratoj, mi klinas la kapon sub la signo de la por ni ĉiam lumiganta Verda Stelo.

Viola DETTRE
(Szeged, 11. aŭg. 1968.)

URBO SZEGED SUNBRILA

DAMJAN VAHEN—SVETINOV

Saluton al vi, urbo Szeged sunbrila,
kiu akceptis nin, verdajn gefratojn,
kiel ni ĉiuj estus viaj urbanoj ...
Iliroj kaj Keltoj, Jazigoj, Sarmatoj,
Hunoj, Gepidoj jam konis vian belecon,
kaj kiam fariĝis vi hungara loĝloko,
reĝo Béla la kvara fortikaĵojn de Szeged konstruis,
ke ĝi povis kontraŭbatali fremdajn atakojn.
Vi, urbo Szeged kontraŭstaris al aŭstra premado,
fariĝis vi centro de sudlandparto de Hungarujo,
fine de la deknaŭa jarcento
inundo terura vin preskaŭ forviŝis el la terglobo,
tamen, helpe de tuta Eŭropo vi denove ekbrilis,
fariĝis amato vi ne nur de la hejmlando,
sed de la tuta mondo!
Sur bordo de blonda Tisza rivero
mi dum mia restado en Szeged tre ofte staras,
sur ĝiaj ondoj salutojn al mia patrujo mi sendas
kaj mi bedaŭregas,
ke tiel rapide mi devas adiaŭi de vi,
de Szeged, de „urbo de la papriko",
de vi, ĉarma, belega, sunbrila urbo, Szeged,
kiu por nuraj dek tagoj fariĝis Esperantujo,
en kiu ni-verdaj gefratoj
manpreme, ĉirkaŭprene, eĉ kise unu alian salutis
kun la deziro,
ke urbo Szeged ne estu urbo de Hungarujo,
ke ĝi fariĝu ĉiujare almenaŭ por dek tagoj
Esperantujo —
amikrenkontiĝejo de ni-verdaj gefratoj,
ke naskiĝurbo de nia paĉjo Julio Baghy,
nia neniam laca apostolo de Esperanto
ricevu monumenton sur via ĉefplaco,
ke vi, urbo Szeged sunbrila, de tiu ĉi jaro
vere estu nia karega Esperantujo!

(1968, Szeged)

Noto de la red. Nia kara poeto Damjan Vahen-Svetinov estis dum jardekoj bonega amiko de Julio Baghy. Ili kune vagabondis en la mondo instruante Esperanton.

La V-a Internacia Pedagoga Esperanto-seminario en Szeged

En ĉi tiu jaro estis jam la kvinan fojon aranĝita tiu ĉi grava Esperanto Seminario en la Sudhungarlanda urbo Szeged. La solena malfermo okazis la 11-an de aŭgusto antaŭtagmeze en la kulturdomo „La 7-a de Novembro". Post la malferma parolo de profesorino Viola Dettre, kaj post la salutvortoj de la Urba Magistrato, de la pedagoga sindikata grupo, de HEA ktp. sekvis popolmuziko kaj popoldanco, krome ankaŭ filmprezentado.

Posttagmeze la seminarianoj solene inaŭguris la memortabulon sur la naskiĝdomo de Julio Baghy. Ili metis du florkronojn sur la muron, la unuan en la nomo de Hungara Esperanto-Asocio, la alian en la nomo de la partoprenantoj de la Seminario. Viola Dettre diris kortuŝan memorparolon.

La 12-an, lunde matene komenciĝis la serioza laboro. Preskaŭ ducent „lernantoj" aŭskultis ĉiutage kvin Esperantajn studhorojn. Profesora komisiono klasifikis la partoprenantojn laŭ ilia lingvoscio en kursojn kaj en grupojn. Estis kursoj por komencantoj (A-kurso), por progresantoj (B-kurso) kaj akiro de instruista diplomo (C-kurso). Ĉi tiuj sekcioj estis dividitaj en naŭ grupoj. En ĉi tiu jaro la estraro organizis apartan grupon por la infanoj, kie la kursgvidantoj prenis la lecionojn en malpli rapida ritmo, ili volis la infanojn funde ekzerci en la fundamentaj elementoj de la lingvo. La aliaj A-grupoj havis la celon, prepari la gekursanojn por la baza ekzameno. La studobjektoj de la B-kurso estis: parolkapablo, gramatiko, literaturo, movada historio. En la C-kursoj oni instruis lingvistikon, literaturhistorion, stilistikon, metodologion, pedagogion — kaj ĉar ili akiris instruistan diplomon — la C-kursanoj devis prezenti ankaŭ provlecionon.

Sep tagojn daŭris la lernado en la lernoĉambroj de la gimnazio Ságvári. Oni devis lerni ne nur en la „lernejo", sed ankaŭ en la kolegio posttagmeze. Kiu volis ekzameniĝi, devis esti diligenta. Ankaŭ posttagmeze kaj vespere estis aranĝaĵoj, por ke la partoprenantoj havu eblon sin amuzi kaj

La urbodomo, antaŭ ĝi statuo

distriĝante uzi la lingvon kaj ankaŭ tiamaniere lerni ĝin. La programoj estis: diversaj prelegoj, prezentadoj de la citroensemblo de Szeged, literatura vespero de Hungara Vivo. Interesaj estis ankaŭ la prelegoj. Prof. Alfonso Pechan parolis pri Italio kun lumbildoj, prof. d-ro Tibor Szabó pri la historio de la seminario, d-ro Bálint Szemenyei pri la hungara ŝtato kaj konstitucio. Prof. d-ro István Szerdahelyi prelegis pri sia studvojaĝo en Sovetunio. Neforgesebla estis la spektado de la operprezentado „Aida", kiu estas vere la ĉefa opero en la Liberaeraj Ludoj de Szeged.

La 18-an posttagmeze la kursanoj faris la skribaŭ kaj la 19-an la parolan ekzamenon. Vespere okazis la adiaŭa balo. Ĉiuj partoprenantoj ricevis memorfolion, tielnomatan „diplomon", kaj kiuj faris ekzamenon, ricevis ankaŭ atestilon.

La seminariestro Árpád Rátkai diris, ke la cirkonstancoj de la Seminario ĉi-jare estis pli bonaj, ol en la antaŭaj jaroj. Ĉi tiu fakto estas nature la rezulto de la pli favoraj financaj kondiĉoj. La seminarianoj estis enloĝigitaj en la Petőfi-studenthejmo. Ili loĝis en kvarlitaj ĉambroj, al kiuj apartenis ankaŭ aparta ĉambro por lernado. Do la favoraj kondiĉoj por la diligenta laboro estis certigitaj. La samĉambranoj estis diversnaciaj, per tiu ĉi lokigo la organizantoj klopodis atingi, ke ili parolu Esperante, do ekzercu sin en la lingvo.

Ankaŭ la manĝaĵo estis bona, nur la poloj trovis la fiŝsupon tre forta. Tamen ili volonte konatiĝis kun tiu ĉi hungara specialaĵo.

Akiris Esperanto-instruistan diplomon aŭ atestilon pri baza lingvoscio en Szeged ne nur esperantistoj el Hungario kaj el la najbaraj landoj Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Sovetunio, sed ankaŭ el Germanio, Bulgario, Italio, eĉ unu ĉarma fraŭlino el Japanio.

La Internacia Pedagoga Seminario de Szeged efikas signife al la esperantista vivo en Eŭropo. Parte laŭ ĝia ekzemplo oni aranĝas seminariojn en Francujo, Ĉeĥoslovakio, Pollando ktp. Karakteriza estas por ĝi la serĉado de novaj vojoj. Pasintjare estis enkondukita la C-ekzameno, ĉi-jare la instruado de la literatura analizo en la B-kurso kaj la literaturhistorio en la C-kurso.

Resume ni povas diri, ke la Seminario fariĝis jam tradicio. Ĝi atingis bonajn rezultojn, sukcesojn, ĝi evoluadas de jaro al jaro. Scivoleme ni atendas ĝian pluan laboron.

Marianna KERTÉSZ

KAIN KAJ ABEL

Kain kaj Abel komence vivis en komuna groto. Kune ili iradis por ĉasi. Ili ĉasis multajn antilopojn. El ties tibioj ili faris tranĉilojn, per ĝi ili fratece dividis la viandon, purigis la ledon, ŝmiris ĝin per ostmedolo por ke ĝi fariĝu glata kaj pretigis el ĝi vestaĵojn.

Sed la sinjoro benis iliajn edzinojn kaj tiuj naskis multnombrajn familianojn, do, fine la groto fariĝis malvasta por ili ambaŭ.

Troviĝis proksime ankaŭ alia groto, en kiu vivis la glavdenta tigro kaj endanĝerigis la vivon de ili ambaŭ. Do, ili kune alŝteliĝis, bruligis fajron antaŭ la faŭko de la groto kaj kiam la tigro elsaltis, ĉiuj samtempe komencis ĝin ŝtonĵeti. Krome cent kaj cent ŝtonpintaj ĵetlancoj flugis al la besto kaj fine ili sukcesis ĝin mortigi. Poste en la malplenan groton enloĝiĝis Kain kun siaj familianoj.

Ĉi tiu sukceso instruis ilin, ke pli oportune estos kune ĉasadi ankaŭ estonte. La du familioj, kune agantaj, povis ĉirkaŭstari la aron de hiparionoj, peli ilin sur la monton, kie la timigitaj praĉevaloj unu post la alia saltadis en la abismon. Kain kaj Abel fratece dividis inter si la multan viandon. Poste ili jam povis ataki ankaŭ la mamuton kaj per la grasaĵo de la lanhava kamelo, kiu grasaĵo troviĝis en ĝia ĝibo, ili lumigis la groton. Cetere sur la muroj de la groto ili ĉizis belajn ĉasbildojn per tajlita fajroŝtono.

La vivo fariĝis ĉiutage pli bona, ili benis la nomon de Adonajo kaj la fratecan kunsenton, la pacon, al kiu ili povis danki ĉion ĉi.

Ĉitempe okazis, ke la Serpento ekenuis la solecan vivon en la senhoma Paradizo kaj ekiris por serĉi la homojn. Tiel li venis al la groto de Kain.

— Diru al mi Kain, — ĝi komencis, — ĉu vi ne timas pro Abel?

— Kial mi timus pro mia sampatrano?

— Nu, pro tio, ĉar li havas ĉiutage pli da ŝtonpintaj ĵetlancoj. La pintoj de liaj sagoj pretiĝas el la kornaroj de la cervoj kaj ili estas tiom akraj, ke ili trapikas eĉ la haŭtegon de la arbara elefanto. Eĉ vi mem jam vidis!

— Kiel do ĉasfaligi la elefanton, se lia sago ne estas akra?

— Nunu! Bone! — diris la serpento. — Mi nur menciis.

Kaj poste ĝi iris al Abel kaj tie rakontis la samon pri Kain.

Kain kaj Abel tiutage malfacile endormiĝis. Sekvonttage Kain kunvokis siajn familianojn kaj ekparolis al ili jene:

— Miaj familianoj! Nenia afero estas pli malbenita, ol la dispartiiĝo kaj malkonkordo. Inter la homoj devas regi paco kaj kunsento. Tiu, kiu endanĝerigas tiujn, riskas la vivon kaj feliĉon.

— Prave patro! — respondis la familianoj.

— Ĉar imagu nur, — li daŭrigis, — kio okazus, se ni malpaciĝus inter ni. Se ni devas uzi parton de nia laboro, por pretigi lancojn kaj sagojn kontraŭ la alia familio. Unu grupo el ni devus senĉese gardostari, por ke la alia familio ne povu nin kaŝataki. Se ni ne ĉasadus kune kun la abelanoj, sed ni disiĝus al du partioj, nur ties duonoj povus iri ĉasadi, ĉar la aliaj duonoj devus observi la malamikon. Ĉu ne, tiel ni povus ĉasi malpli multajn antilopojn?

— Ni malsatmortus. — respondis unu el la filoj.

— Kaj intertempe ekstermus nin la glavdenta tigro. — aldonis la dua.

— Nu, — daŭrigis Kain, — mi ricevis bedaŭrindajn informojn pri tio, ke la abelanoj intencas perturbi ĉi tiun kunsentan pacon. Laŭ certaj famoj ili pretigas armilojn kontraŭ ni.

— Domaĝe, — ili respondis. — Ni devas nepre subteni la pacon.

— La saman intencas ankaŭ mi, — jesis Kain. — Tiel decas al pacema familio. Ni neniokaze rompos la pacon, ni eĉ garde observos por malebligi, ke inter ni iu ajn malamikiĝu kontraŭ la abelanoj. Mi tre bedaŭrus, se la abelanoj tamen atakus nin, ĉar tiuokaze ni povus la pacon restarigi nur per armiloj, kiu jam ne estas paco. Sed kiel ajn mi cerbumas, mi ne povas eltrovi alian rimedon. Tiu, kiu volas pacon, vole-nevole devas batvenki tiun, kiu volas interbatadi. Mi estus tre malĝoja karaj miaj gefiloj.

Pro tio ĉi ili tre ĉagreniĝis same kiel ilia patro. Kelkaj proponis kunveni kun la abelanoj, aranĝi la aferon kaj atingi pacan interkonsenton. Sed aliuloj pridubis la sukceson de tiaspeca intertraktado.

— Ĉar, — ili diris, — se la abelanoj pretigas la armilojn vere kontraŭ ni, tion ili nepre neos. Ili diros, ke la armiloj pretiĝas kontraŭ la glavdenta tigro. Kaj se ni petus, ke ili ne faru tion, ili pensus, ke ĝuste tial ni petas, ĉar ni mem intencas ilin ataki, do, despli intense ili prepariĝus por la atako, eĉ se ili ĝis nun ne faris. Plej oportune estas diri nenion pri la afero, sed kaŝe pretigi pli multajn kaj pli akrajn sagojn por sekurigi la pacon de nia popolo.

Pri ĉi tio ili interkonsentis.

Poste iu el la filoj eltrovis, ke, se oni ŝmiras la pinton de la sago per la veneno de la akonito, la sovaĝbesto, trafita per ĝi rapide mortas eĉ pro la plej malgranda vundo kaj tiu estis taŭga armilo kontraŭ la glavdenta tigro.

Dum la unua momento ĝi vekis grandan ĝojon: kiom multe da felo estos kaj kiom multa oleo por la meĉoj! Sed Kain, per la sagaco de la maljunuloj tuj komprenis la situacion kaj ties konsekvencojn.

Li ordonis, ke la aferon oni severe devas sekreti. Dum la komunaj ĉasadoj oni ne rajtas uzi la venenon de la akonito por eviti, ke tion ekkonu la abelanoj. Sed en kaŝita angulo de la groto estu poto, plena de tiu ĉi veneno, por ke ili tuj povu preventi ĉiaspecajn ekagojn por rompi la pacon.

La ordonon ĉiuj akceptis aprobe, nur unu filo, Hanok aŭskultis ĝin kapskue:

— Neniel plaĉas al mi ĉi tiu afero, ĉar pli-malpli frue ĝuste el ĉi tiu fariĝos la interbatado.

Nature, la sekreto de la akonit-veneno dum mallonga tempo malkaŝiĝis. Abel foje demandis Kainon, kial ili amasigas ĉi tiun danĝeran venenon.

— Bone vi scias, — respondis Kain, — ke en ĉi tiu groto loĝis iam la glavdenta tigro. Neniu scias, kiam revenos ĝia raso.

Abel profunde ĉagreniĝis. Tamen do pravintus la serpento? Kaj tiatempe li nenion kredis al ĝi!

Li kunvokis lian familianaron kaj komunikis lian sperton. Multaj el ili proponis pretigi pli multajn sagojn por la sekureco. Aliuloj timis, ke tio vekos malbonon, ĉar eble la kainanoj miskomprenus, pensante, ke la abelanoj intencas ataki ilin. Precipe Abel mem akcentis, ke ili nepre devas subteni la bonan kontakton kun la gefiloj de sia frato kaj eviti eĉ la ŝajnon de la malboniĝo de la interrilato.

Ĉi tiun opinion ĉiuj akceptis. Ĉiuj sentis fratame al la kainanoj.

Fine ili decidis, ke por certeco, ankaŭ ili plenigas poton per la veneno de la akonito kaj pretigos pli multajn sagojn, sed la afero restu severa sekreto, ĉar la fratecan interrilaton oni nepre devas subteni kaj la tuta armiĝo estas nur, por ke transflanke oni ne povu perturbi la familian konkordon.

Kaj post mallonga tempo Abel havis pli multan armilon, ol Kain.

Kiam Kain eksciis tion ĉi, li certiĝis pri sia malnova timo. La kainanoj kunvenis por interkonsiliĝo kaj konstatis, ke la abelanoj vere klopodas rompi la pacon kaj oni devas timi pro atako. Do, pro tio ili devas ĉesigi la komunajn ĉasadojn por eviti la okazon de intermalamikado. Ekde nun la kainanoj solaj iris al ĉasado, sed nur la duono de la popolo, ĉar la alia duono gardis la groton kaj pretigis armilojn por sekurigi la pacon. Sed ili zorge atentis, ke neniu perturbu la bonan interrilaton.

Jes, tiel okazis. Nature, la predo malmultiĝis, ili distribuis ĝin inter si per pli granda pedantemo kaj al la filoj oni klarigis, ke la malpli abunda distribuo estas severa necesajo, ĉar aliokaze endanĝeriĝus la hejma fajrujo kaj la ĉiutaga antilop-viando.

Ĉi tion ĉiuj komprenis kaj aprobis, nur Hanok grumblis:

— Mi ja diris, ke iom post iom naskos la aferoj malbonon. Laŭesence same Kain, kiel Abel incitas la familianojn unu kontraŭ la alia. Ambaŭ estas lupoj en homaj haŭtoj, kiuj ne domaĝas buĉigi siajn familianojn por siaj propraj aĉaj interesoj.

Pluraj aprobis la vortojn de Hanok, kaj Kain per dolora koro vidis, ke la forto de siaj filoj malgrandiĝas kontraŭ la ekstera danĝero. Tial li komence milde atentigis Hanokon pri liaj eraroj kaj poste severe punis lin.

La amikoj de Hanok el ĉio ĉi konvinkiĝis nur, ke Kain nepre intencas forbuĉigi sian popolon, ĉar li spasme volas manenteni la potencon.

La samo okazis ĉe Abel: la duono de la familianoj ĉasis, la alia armile gardis la pacon. La malkontentulojn ili punis.

Kain kaj Abel fine konvinkiĝis, ke ili mem vane klopodas vivi en fratece bona rilato al la alia, se tiu alia senĉese pretigas nur armilojn, dume li vid al-vide atestadas sian fratecan bonintencon, por forturni la atenton pri siaj malamikaj kaŝintencoj. Ili devis per profunda ĉagreno konstati, ke la paco estas savebla nur, se ili neniigos la pacrompantan alian familion. Ili jam eĉ sopiris la eksplodon de la interbatado, ĉar jam ankaŭ interne troviĝas tiuj, kiuj malalte taksas la eksteran danĝeron kaj por tio malfortigas la familion. Tiuj vekiĝos nur tiam, kiam eĉ ili vidos la danĝeron.

Sed ambaŭ amis unu la alian kaj ili povintus interbatali nur pro ekstrema neceso. Kaj ĉi tiun necesecon ili jam avide atendis.

Fine ankaŭ tio alvenis. La abelanoj vundigis hiparionon, kiu trakuris al la kainanoj. Tiuj mortigis ĝin kaj hejmenportis, pro kio la abelanoj alvenis kaj repostulis la predon. La kainanoj, por defendi sin, pafis kelkajn sagojn al la atakantoj kaj ambaŭ familioj komencis la militon, altruditan de la alia familio.

— Nu, — diris Hanok, — Ĉu mi ne diris? Homoj, kiuj neniam pekis unu kontraŭ la alia, nun estas devigataj mortigi sin per la alia grupo kaj kial ĉio ĉi? Nur, por ke ni certigu la sangavidan regadon de niaj patroj.

Ni bone konas la rezulton de la batalo: Abel estis mortigita. La venkinta Kain priploris sian fraton, ŝutis cindron sur sian kapon kaj laŭte anoncis al ambaŭ familioj, ke la malpaco estas finita, la pacrompanto jam ne vivas, estonte ili ĉasos kune, ĉiu el la du familioj havos abundan viandon kaj mielon de sovaĝaj abeloj. La malkonkordo finiĝis, la mondo atingis la eternan pacon.

— Sed el la pasinto ni ellernis, — li daŭrigis, — ke la paco estas granda trezoro kaj ni devas ĝin gardi pli bone, ol ĝis nun. Ni ne plu rajtas disiĝi al du grupoj, kaj tiun, kiu ne povas aliĝi al la nova grotreĝimo, ni nepre punos.

— Jen! — diris Hanok, — Mi jam diris, ke ĉio okazas nur por certigi lian tiranecon. Sango, kaj sklav kateno, ĉi tio estas nia sorto. Paco ja ne povas alveni ĝis ni ne sukcesos rompi ĉi tiun sangan tiranismon.

Pri ĉi tio konsentis liaj amikoj, kiuj nun plimultiĝis, ĉar kun ili konsentis la abelanoj, kiuj sentis sin subjugitaj. Ili publike mallaŭdis la kainanojn, post kio, la kainanoj deklaris, ke la amikoj de Hanok estas pacrompantoj kaj plurajn el ili mortbatis.

Ĉi tio kolerigis la amikojn de Hanok tiel, ke ili foje ŝtelis la poton de la veneno, mortsagadis la tiranon kaj liajn adeptojn.

Hanok do, transprenis la gvidadon. Li kunvokis la popolon kaj anoncis, ke la longa kaj sanga disharmonio ĉesis kaj post tiom da suferoj ekruĝis por la mondo la krepusko de la eterna paco.

— La tiraneco estas frakasita, — li diris. — Per tio ĉesis la kaŭzo, kiu incitis homon kontraŭ homfrato. Fine la homaro alvenis havenon kaj estas savita. La mondo atingis la eternan pacon. Ni jam devas gardadi nur, ke regu nur la reciproka fratamo kaj paco. Por ni troviĝas jam nur unusola malamiko, tiu, kiu volas rompi la fratecan amon. Sed tiujn ni devas tute venki, por eviti, ke la adeptoj de la tiranismo malharmoniigu nian anaron kaj semu malpacon. Tiujn ni devas senpovigi, antaŭ ol ili povus subfosi nian fratan harmonion.

Pri ĉi tio ili konsentis, nur iu malnova amiko de Hanok skuis la kapon:

— Mi konjektas, — li diris, — ke ni esence nur ŝanĝis la tiranon, sed nenio vere modifiĝis. Ĉu ne, ĉi tiu Hanok parolas ankaŭ pri tio, ke ni devas venki iujn kaj senpovigi ilin? Ĝis nun ĉiu nia estro kredis, ke li posedas la panaceon, kiu alportos la eternan pacon. Sed ĉi tiu panaceo estis ĉiam iaspeca venko, kiun ni devas atingi super iu alia. Sed akiri venkon ni povas nur, se antaŭe ni trovas al tio malamikon. Laŭesence la malamikon ni mem kreis, por ke ni povu ĝin venki. Almenaŭ, se ni ekskrapis la ideon de la paco, sub la ekstera ŝelo, ĉiam putriĝis sangaj bataloj. La eterna paco estas naiva ĥimero.

— Kaj ĉu ne troviĝas saviĝo? — ili demandis.

— Ne. La interbatado estas en la homa naturo. Oni devus modifi la homan naturon, por ke la malamo mem ĉesu.

— Kaj kiel vi imagas la solvon?

— Nu, atentu vi: ĉu vi ne ekvidis, ke Hanok kaj liaj intimaj amikoj estas ĉiuj blondaj?

— Vere.

— Nu, ni devas sperti, ke la malamon disvastigas la blonduloj. Do, la brunuloj devas solidari, venki la blondulojn, kaj tio ĉi alportos la eternan pacon. Sed ĝis tiam ĉio estos vanta ĥimero. Ek! brunaj amikoj, ni organizu nin por elbatali la venkon de la frateco, por ke jam fine ĉesu la malbenita spirito de la malpaciĝo!

Sed en tiu tago ankoraŭ neniu konsentis.

Sándor SZATHMÁRI

Ferenc MÓRA

Tiu malbona infano Nikolao

Jes, Nikolao estis tre malbona infano, tamen ia dolĉa muziko sonas en mia animo, kiam mi skribas lian nomon. Kaj kiam mi diras, ke li estas malbona, kvazaŭ atentigus min mildrideta anĝeleto per sia blanka fingreto:

— Ho, ho, ĉu ekzistas ankaŭ malbonaj infanoj en la mondo?

Povas esti, ke la anĝeleto pravas; tamen ni ne povis imputi bonecon al Nikolao Gyengő. Sed se iu faris ian gravan friponaĵon en nia stato, ĝia majstro ĉiam estis Nikolao.



La bubo eĉ neniam neis. Firmiĝis en li, kiel raŭpo en kokono, ke li estas malbona infano. Tamen el la kokono eliĝas orflugila papilio, sed ion similan pri Nikolao neniam oni povis atendi.

Skribi, legi li ja ellernis, sed frostotremon li ricevis de ambaŭ metioj. Kial oni eltrovis tiujn? Jen, liaj amikoj: la zizeloj, sciuroj, orioloj, la paruoj kiel vigle vivadas, kvankam eĉ duonon ili ne konas de la aboco!

En la latina lernejo jam tute fiaskis lia menso. Tie li restis lasta, eĉ en la lasta benko. Kvankam estis antaŭ li bona ekzemplo: lia propra frato, Aleĉjo. Li estis eminenta, eĉ en la unua benko. Li estis plej amata en la lernejo kaj fiero de nia urbeto.

Kio li estis por sia patro, tio ne estas eldirebla. Valoris vidi, kiel brilis la okuloj de la maljuna kuracisto Gyengő, kiam li kondukis hejmen

Aleĉjon el la lernejo, prenante lian maneton. La frapado de lia hundkapa bastono, la knarado de liaj ŝuoj, lia fiera sinteno, lia ridanta vizaĝo, ĉio ĉi fanfaronis al la preterirantoj:

— Rigardu, homoj! Mia filo estas tiu ĉi bela infano, tiu ĉi bona infano, tiu ĉi saĝa infano!

Nikolao jen faris antaŭ ili ciganan transkapiĝon, jen li paŝadis malantaŭ ili, sed neniam estis videbla sur lia

vizaĝo emocio. Li opiniis tute evidenta, ke ĉiu dorlotas lian fraton. Pleje ja li dorlotis lin. Se ie li trovis ruĝan pomon, sekvinberon, aŭ li ricevis migdalon en la kuirejo: ĝian pli ruĝan duonon, la plej grandan, la plej dolĉan parton ricevis Aleĉjo.

— Jen, kian bonan koron havas tiu ĉi malbona knabo! — ridetis tiam malgaje lia patrino. Ŝi estis kompatinda, softa, malmulte parolanta, maldika; pala ŝi estis, kiel la malfrua kalistefo.

— Lasu lin! — mansvingis malbonhumore la patro. — Kiu dum sia tuta vivo ne kaŭzis al ni ion alian krom amareco, tiu havas nenian koron.

Kaj li postkriis la interbrakumantajn du infanojn:

— Aleĉjo, atentu, ke vi ne similiĝu al la granda bonkoreco de via frato!

La ŝultro de unu el la du infanoj ektremis. Kies? Ĉu pro la rido, aŭ ĉu pro la amareco? La patro mem ne sciis tion. Laŭvide ja estis similaj la du infanoj. Ambaŭ havis rektan, poplan staturon, longan oran hararon. Eĉ ilia voĉo estis simila.

Kiel ajn rapide kuris la jaroj unu post la alia, la du infanoj ne ŝanĝiĝis. Aleĉjo restis ĉiam eminenta, Nikolao la lasta. Ilia patrino ĉiam pli paliĝis, kaj ĉiam pli ŝi ploretis, kaj la patro ĉiam estiĝis pli malbonhumora kaj malgaja. Jam ne brilis tiel liaj okuloj, kiel pli frue, nebula grizeco vualis ilin.

Iun vesperon, post detabliĝo tiel li turnis sin al Aleĉjo:

Mia fileto, morgaŭ mi vojaĝos kun via patrino al Budapeŝto. Pro io malsaniĝis miaj okuloj, malbone mi vidas. Jam ankaŭ via kapeto malklariĝas antaŭ mi.

Tre mildiĝis la voĉo de la doktoro, sed li refortigis sin:

— Via patrino nur akompanos min, post kelkaj tagoj ŝi denove estos hejme.

Eble mi restos pli longe. Ĝis kiam oni resanigos miajn okulojn.

Dum tiu ĉi nokto tre dolora ploro sonis el la infanĉambro. Ĝin aŭdis ankaŭ la patro kaj patrino, ĉar neniu dormis ĉi-nokte en la Gyengő-domo.

Kiu el la knaboj ploregis? Ho, ja simile kortuŝa estas la plorego de ĉiu infano!

Alian tagon sur la teraso atendis la gepatrojn la du infanoj. Aleĉjo estis pala, Nikolao iom ektimiĝinta, kiel ĉiam, kiam li devis renkonti sian patron. La patro brakumis surkoren sian filon, la karan:

— Mia fileto, vi estas saĝa infano. Kio ajn tuŝos min, vi restos mia kara, bona filo, mia espero, mia fiero. Kaj pro tio, ke eĉ tiam mi sciu pri vi, kiam mi estos for, ĉiutage vi skribu al mi kelkajn vortojn pri tio, kiel vi fartas.

La infano ekploregis, kaj la patro turnis sin al la alia filo. Por momento li aspektis, kvazaŭ li ne volus etendi al li sian manon, sed tamen per pli varma voĉo li adiaŭis ankaŭ de li:

— Dio estu kun vi!

Nikolao paliĝis kaj iom ekŝanceliĝis. Plorego erupciis el lia koro. Eble la orioloj kaj sciuroj miris dum kelkaj tagoj pri tio, kiel silentema estas ilia amiko; neniu alia rimarkis ŝanĝon je li.

Neniu ja zorgis pri li. Ankaŭ tiam, kiam lia patrino alvenis, de la kampoj oni hejmenvokis lin.

— Via kompatinda patro havas glaŭkomon sur siaj okuloj. — Ŝi tordis siajn manojn. — La leterojn de Aleĉjo fremduloj laŭtlegos por li. Tio pleje doloras al li.

Sed ankaŭ la fremduloj ne longe legis ilin. Dum malvarma aŭtuna nokto la infano ĝis malfruo lernis sur la teraso, kaj alian tagon li jam devis resti en la lito. Li petis siajn librojn, sed ne havis forton por teni ilin; li volis skribi al sia patro, sed ne povis teni la plumon.

— Skribos mi, — diris decideme Nikolao — sub via nomo. Nia patro ekscios nenion. Li ja ne vidos la skribaĵon.

Pezaj ŝvitperloj estis sur la frunto de la infano, ĝis pretiĝis la letero. Eble pro tio, ĉar nekutima scienco ĝi estis por li. Aŭ ĉu en sia koro li sentis ion pezan, kiam li subskribis la leteron? „Vin elkore amanta, vian kareson atendanta fileto: Aleĉjo."

Kaj sendiĝis la leteroj, la paserkapaj, distaŭzitaj literoj, kaj en la Budapeŝta granda hospitalo kisis ilin kompatinda blindulo, kiu sciis, ke lian malsanon povas jam helpi neniu. Kaj sendiĝis la letero eĉ tiam, kiam la bela, la saĝa kaj bona infano jam kuŝis sur kalistefe ornamita katafalko.

„Vin elkore amanta, vian kareson tre atendanta fileto: Aleĉjo."

La patron oni portis neatendite hejmen post la tago de la enterigo. Li jam ne povis vivi sen sia filo.

Palpadante li malfermis la pordon al la teraso, kaj tuj li ekflaris la pezan odoron de la funebraj kandeloj, incenso. Kaj li aŭdis la kortuŝan ploradon el la direkto de la angulo, kie ĉirkaŭbrakumante tenas unu la alian: la patrino kaj la malbona infano.

— Kio okazis ĉi tie? — faris movon al sia koro la patro.

— Li mortis, li mortis! — falis antaŭ lin la patrino.

La patro dise malfermis siajn nevidantajn okulojn kaj spiregante demandis:

— Kiu mortis?

Nikolao subite per unu mano milde fermis la buŝon de sia patrino, per la alia li kaptis la manon de sia patro:

— Nikolao mortis, mia patro.

Falis la larmoj el la okuloj de la blindulo sur la orharan kapon de la kliniĝanta knabo.

— Ĉu Nikolao? La kompatinda Nikolao! Eble estas pli bone por li! Nu, mia dolca Aleĉjo, ne plu ploru! Estu vi mia saĝa, kara, bona filo!

Tiel li prenis sur sian bruston la malbonan infanon, tiel varmege, tiel preme, ke pri simila patra brakumo Nikolao ĝis nun eĉ ne sonĝis. Kaj li sentis, ke rompiĝos lia koro pro tiu ĉi unua patra brakumo.

Sed certe mi scias, ke tiam anĝeloj flugetadis super la teraso de la Gyengő-familio, kaj inter ili estis ankaŭ la bona filo. Per siaj blankaj manetoj ili faligis rozojn sur tiun ĉi malbonan knabon.

El la hungara: *Sándor SZALAY*

Literatura vespero en Szeged

Unu el la plej sukcesaj kaj interesaj aranĝaĵoj de la Seminario en Szeged estis la literatura vespero de Hungara Vivo. Post la malferma parolo de la ĉefredaktoro de la revuo sekvis deklamaĵoj, kantoj, rolis horeto, kies membroj estis Katalin Bartos, Susana Klózik, Nikolao Tajta, Magdalena Mracskó kaj Ágnes Daly. János Medgyesi (Szombathely) deklamis sian originalan poemon „Vesperaj bildoj — pensoj ĉe Tisza". Maria Szabó (Budapest) deklamis Baghy-poemojn. Ankaŭ Elizabeta Merényi (Mezőkovácsháza), prof. Lenke Markó (Sopron), Maria Mészáros kaj Ludoviko Fülöp (Rumanio) deklamis poemon de Baghy; li prezentis ankaŭ la poemon de Attila József en traduko de Kalocsay kaj poemon de la jugoslava poeto Nedelka Subotiĉ. S-ino Frida Greif (Leipzig) kantis germanajn popolkantojn en Esperanto. Novelon de la klasika hungara romanisto *Mór Jókai „Sinjorino kaj sinjoro" prezentis: Lenke Kun — la sinjorinon kaj L. Kökény — la sinjoron. La bonhumoran vesperon fermis kantado de „La vento foras".*

Nia bildo prezentas la estraron de la malferma kunsido de la Seminario.

Meze Viola Dettre, maldekstre de ŝi la seminariestro S. Rátkai, Sándorné Cser, A. Pechan, preż. de la Ekzamena Komitato, dekstre T. Radnóti, repr. de la urba magistrato, B. Ricsei, Emilia Radvánszky, d-ro I. Szerdahelyi, L. Borsos, repr. de la Pedagoga Sindikato, d-ro T. Szabó, Sarolta Marinovich, Anna Szántai.

István FEKETE:

JULIO

La suno estas subiranta. La rando de la ĉielo flave ardas simile al la ora polva nebulo laŭ la ĉiela fajra ĉaro, en kiu ruĝe ekflagras la purpurmantelo de la Sundio.

Ia sanga flamo laŭrampas la dorson de la arbaro. La suproj de la longaj trunkoj jam atingas la ĉielan fajron, kaj kvazaŭ mi atendas kiam ili ekflagras, kiel grandaj torĉoj, kiuj enŝovis sian kapon en la eternan kaldronegon.

Sed la granda fajro estas malproksime. Tre malproksime. Eĉ tie ĝi jam malgrandiĝadas. Ĝia brilo ankoraŭ atingas ĉi tien al la alta kaŝobservejo, sed jam ombroj etendiĝis sur la breĉojn, kiuj kaŝis sin de antaŭ la suno, kaj nun ili antaŭvenis el sub la ŝtonoj, el la nigraj kavoj de la malĵunaj arboj, el la malsekaj kuŝejoj de la ombraj riveretoj, ĉar la Nokto, la satelito de la febro kaj morto, la malgaja sinjoro jam svingbatis ie la nigran vipon.

La suno kunportas la lumon, la blankecon de la helo. La nokto portas anstataŭ ĝi la ombron, la mallumon, la nigrecon. Ambaŭ estas eternaj koloroj. Nur tiu ĉi du: la blanka kaj la nigra. La ceteraj naskiĝas el ili.

La mallumo komencas regi. Ĝiaj nigraj antenoj jam palpis ĝisfine la profundon de la arbetoj, kiam la grilo eksonas, kaj la palumboj eksilentas, kiuj ĝis nun kvere diris adiaŭon al la suno.

Merlo kolektas skarabojn en la aperturo. Facilanima nigra fraŭlo. Ĝi ŝovas sian bekon inter la herbojn, kaj nun mi jam ne miras, kial oni trovas lanugon de la merlo en la elfosita vulpotruo. Mi estas maltrankvila ankaŭ pro tio. Pli frue nizo transflugis sub mi, kaj la merlo havas nur tiun feliĉon, ke ĝi iris al la aperturo duonminuton poste.

Eĉ la vulpo ne trostreĉus sin kapti la merlon, kiu certe havas edzinon, idojn, tamen ĝi estas facilanima. Mi dezirus, se ĝi rimarkus min kaj forflugus, sed ĝi ne rigardas supren, eĉ por la tuta mondo ne, kaj mi ne povas preni miajn okulojn de sur ĝi. Mi havas zorgon pri ĝi, kaj estas mia devo atentigi ĝin, se ia danĝero okazus.

Kaj mi koleradas. Prenu la diablo tiun ĉi merlon! Kial mi zorgu pri ĝi? Ĉu mi gardu ĝin? Cetere ni ne estas bonaj amikoj. Ĝia parencaro fuŝis al mi kelkajn bonajn ĉasadojn, do mi koleras ĝin. Jes. Mi koleras. Ili kriis je mi en la plej promesaj minutoj, kaj la granda vircervo ruktade saltis for, ĉar la merlo atentigis pri la danĝero.

Ĉu ĝi estis eble ĝuste tiu ĉi merlo? Kiu povus ekkoni ĝin? Ankaŭ tiuj havis la saman flavan bekon, brilantajn, saĝajn okulojn, maldikajn piedojn, per kiuj ili iradas kelkfoje kun serioza, ŝanceliĝa skuiĝado, kiel vilaĝa juĝisto. Sed ili estis atentemaj. Embuskantaj. Malicaj. Apenaŭ mi moviĝis, ili jam alarmis, sed tiu ĉi kaŝas la kapon inter po unu malgrandan marĉon, tiel bonfide, kvazaŭ ekzistus nur merlo kaj vermeto en la mondo. Ne. Tiu ĉi ne estas la sama merlo. Tiu ĉi estas bona merlo!

Kaj mi ne povas depreni miajn okulojn pri ĝi. Mi gardas la merlon!

Polumbo malfrue veninta fulmrapide aperas antaŭ la barilo de la altkaŝejo. Ŝajnas, tiu ĉi kutimis kveradi sian vesperan kanton ĉi tie, kvazaŭ haltante en la aero, sin forŝtelante super la merlo, kiu vekigiŝ — fine — pro la preterflugo, kaj time flugis inter la arbetojn.

Facilanima bubo! Nu, se akcipitro ĝi estus estinta? ... Mi estus povinta rigardi tiun ekzekuton, eble mi pro kolero estus pafinta tien sen la plej malgranda espero de la helpo.

Vere, ankaŭ mi mem venis ĉi tien ne por kolekti florojn, ĉar tiu vircervo estos mia nur pere de sia vivo — tio ankoraŭ evidentiĝos! — sed ĝi estas alia. Tute alia ... Sed pro kio estas alia, pri tio nun mi ne pensadas. Mi timas, ke strangaj veroj evidentiĝus por la akcipitro, do mi iras al okcidento.

Mi enrigardas la lacan vizaĝon de la suno, kaj mi preĝas al sankta Huberto, ke nur nun nenio venu, ĉar violkolora nebulo sidas sur miaj okuloj, en la teleskopo de mia pafilo, kaj ne povas temi pri ordinara celado. Longe mi enrigardis la sunon, kaj nun vane mi rigardas ien ajn, nigraj teleroj saltadas antaŭ mi. Ĉio fariĝis senkolora, kaj mi apenaŭ vidas ekzemple tiun flavetan arbuston, kiu staras ĉe la rando de la aperturo, kaj kiu havas decidan formon de la kapreolo.

Kiel oni perdas la vidpovon! Kiel oni fantazias! Sed mi ne estos trompita! Ĉio estas iluzia ludo. Mi enrigardis la sunon, kaj nun ĉio moviĝas cirkaŭ mi. Ankaŭ la arbusto. Ĝi povas esti eble 160—170 paŝojn fore, kaj ĝi fleksadas eĉ la kapon, simile al la kapreolo.

Mi rigardas alidirekten. Mi fermas miajn okulojn iom plibonigi ilin, kaj nur post kelkaj sekundoj mi rigardas reen al la „arbusto", kiu jam staras tiam en la mezo de la aperturo.

— Ej, vi blinda azeno — karesnomadas min mi mem —, estu lerta, ĉar tie estas la granda vircervo!

— Nur pafu certe! — argumentis iu en mi, kaj mi grincigis miajn dentojn, ĉar nenio estis videbla en la teleskopo krom la maldika kruco kaj la bela rozkolora helo.

— Pafu, pafu — nervozigis min alia

voĉo —, ĉar vi neniam povas vidi tiun ĉi vircervon!

La vircervo tiam jam iris trans la aperturo, kaj haltis en la alia flanko, sed ĝi povis malaperi en ĉiu momento.

— Jam estas malfrue! — fortiĝis en mi la melankolio.

— Ne estas malfrue! Nun! Ankoraŭ eblas! — kaj ankoraŭfoje mi malfermis miajn okulojn. La teleskopo estis neuzebla pro la lastaj radioj de la subiranta suno kantonmentantaj ankoraŭ en ĝi, sed la arĝent-muŝo bele haltis sur la flanko de la vircervo.

Poste mi delasis la kuglon.

La vircervo malaperis post la krako. Ĉio fariĝis malluma pro la subirinta suno malantaŭ la grandaj arboj. El la direkto de la vircervo ia bruo estis aŭdebla, kvazaŭ ĝi malproksimiĝus.

Mi maltrafis!

Mi ne estus devinta pafi! Estus devinta atendi. Antaŭ mi sur la senarbejo estas la salejo, la vircervo rapidis tien. Mi sciis pri tio ankaŭ pli frue.

— Se vi sciis, kial vi pafis? — mi riproĉis min, kaj mi nur sidis en la hontinda silento, en kiu mi diris denove kaj denove por mi mem: — Vi maltrafis! — Kaj mi batis mian genuon, kvazaŭ tio estus helpinta.

Tiam mi denove aŭdis ian bruon, eĉ malgranda arbo moviĝis en tiu loko, kie la vircervo malaperis. Mi reviviĝis. Ĉu eble ĝi ne foriris? Mi aŭdis jam pri tia kazo. Aŭ ĉu ĝi grave vundiĝis, kaj mortadas? ...

Mi atentis sen movo.

La bruo ripetiĝis.

Nun jam mi estis certa, ke io okazis al la vircervo. Tiu ĉi ne estas ordinara afero. Se ĝi ne kuregas for post la pafo, maksimume aŭskultadas silente, sed ne faras bruon rimarkeblan.

Ankoraŭ mi atendas. Malfacile mi decidas min veni de sur la kaŝejo, ŝtele proksimiĝi al ĝi. Cetere mi havas botojn kontraŭ la kuloj, kaj la boto grincas.

Sed la vespero ne atendas. La ombro densiĝas. Ie jam eksonis ankaŭ la kaprimulgo. Ne eblas atendi. Mi deprenas la botojn, kaj grimpas rapide en ŝtrumpoj malsupren sur la kruta laterno.

Mi ne estus bona ŝipisto, ĉar la laterno tranĉas miajn plandojn, kaj jorante, mi batis treege mian genuon en la ŝtuparon de la laterno. Ni iru, ĉar mallumiĝas. Se la haŭto estis deširita, do deširiĝis! La vircervo ne atendas.

Kia mallaŭta estas ĉimaniere la irado! Mi sentas ĉiun herberon. Kaj eĉ la dornon! Tiam mi levas la piedon, kiel la cikonio, kaj siblas, sed nur en mi mem.

Mi jam ne estas malproksime de la vircervo. Mi jam sentas la vircervon pafita, ĉar pli frue ĝi aliris unu betulon, ĝia krono tiel sonis.

Mi rampas antaŭen. En herbaĉo, atinganta ĝis talio, inter densaj arbetoj. La bruo jam estas proksime, sed mi nenion vidas. Branĉo krakas sub mia piedo. Tiam mi ekvidas la vircervon, sed nur momenton. Ĝi aŭdis la krakon de la branĉo, kaj ĵetis sin antaŭen ĝis la plej proksima densejo. Nun jam mi scias, ke la vircervo estas la mia. Sekvu ĝin! La arbeto krakas ĉirkaŭ mi, la branĉoj tranĉas mian vangon. Ne gravas. La vircervo jam ne fuĝas.

Ankoraŭ ĝi levus sin, sed mi ne permesas suferi. Mi pafas ĝian kolon, kaj fino. Nur nun mi rigardas ĝian kornaron. Blankfina, forta, bela, regula kornaro. Maljuna fraŭlo estis ties portanto.

Ankoraŭ mi spiregas, kaj nur nun inundas min la ondo de la ĝojo.

La bela vircervo estas mia! Nun jam vere la mia!

Poste la ĝojo trankviliĝas. Mi sentas forpasi la feston, kaj mi povas foliumi la kalendarpaĝon de la ĉasist-feliĉo. Denove sekvas grizaj labortagoj. Tiu ĉi mia deziro plenumiĝas, kaj alia ankoraŭ ne vekiĝis en mi.

Mi sidas apud la vircervo, rigardante, kaj atendas ion. Eble tiujn febrajn minutojn, pro kiuj mi ĉasas, kiuj hodiaŭ estas plenumitaj, sed ne revenos, ĉar vesperiĝis, kaj la tempo forrabis de mi la etan ĝojon.

Mi tiras la vircervon al la aperturo.

Tiam la tero jam spiras vaporon, kaj la strigo ploras en la nigra lito de la tero.

Mi portas la vircervon. Vekiĝantaj etaj steloj malgaje palpebrumas post mi, eble atendante tion, kiam krios akre la maljuna vircervo, kiun ili bone konis.

Silento regas. Mi iras, kiel la krimulo. Kvazaŭ mi estus ŝtelinta la vivon de sur la arbaro.

Mi rerigardas de sur la herbejo. La arbaro silentas.

Kaj tiam ie malproksime vircervo alarmis akre, kaj subite ĉio evidentiĝis. Lampiretoj bruligis siajn malgrandajn lampojn en la malsupro de la arbustoj, kaj mi jam sciis, ke mi kunportas nur la memoron de la maljuna vircervo, ĉar la vivo — kiu estas eterna — restis tie ekstere en la arbaro.

Tradukis: Lenke KUN

L. KAFANOVA

La renkontiĝo estis neatendita!

La renkontiĝo, vere, estis neatendita. Iufoje trarigardante la katalogon de la manuskripta fako de la Publika Biblioteko „Saltykov-Ŝĉedrin" la redaktorino de la Leningrada Radio, Tatjana Kruntjajeva, subite trovis la noton: „Iosefo Haydn: „La neatendita renkontiĝo".

Tatjana Kruntjajeva petis alporti la manuskripton. Oni donis al ŝi luksan paperujon el flava marokeno, ornamita per arĝentaj angulvinjetoj kaj seruro. Sur la fermoplato estis enstampita blazono de la aŭstraj princoj Eszterházy. Atenteme malferminte la paperujon, Tatjana ekvidis paperfoliojn, kiuj estis desegnitaj per muzikaj notsignoj. Sur unu el la paperfolioj estis skribite: „La neatendita renkontiĝo". „Opero". Apude kuŝis libreto — presita en la itala lingvo, la teksto de la opero.

Kiel diris Tatjana mem, ŝi eĉ ekkriis kaj tuj invitis en la bibliotekon la profesoron de la Leningrada Muzika Altlernejo, E. D. Lebedev. Post kiam li konatiĝis kun la neordinara trovitaĵo, la duboj malaperis: tio ĉi estis la manuskripto de la partituro de la opero de Haydn „La neatendita renkontiĝo", la manuskripto de la opero, kiun la samtempuloj opiniis esti unu el la plej elstaraj verkoj de la komponisto, sed kiu dum centjara periodo estis konsiderata perdita. En unu el la muzikaj informiloj estas pri ĝi jena informo: „... eble la partituro forbrulis dum incendio aŭ ĝi mistere malaperis".

Kiel estas konate, de la 1761-a jaro Haydn servis ĉe la princoj Eszterházy, kiuj opiniis sin laŭleĝaj posedantoj de ĉiuj manuskriptoj de Haydn. Laŭ la mendo de sia mastro Nikolao Eszterházy, kiu havis la kromnomon „Brilega", Haydn verkis la operon „La nea-

tendita renkontiĝo". Ĝia unua prezentado okazis en Eszterháza en aŭgusto de 1775 „okaze de la plej ĝojiga alveno de lia moŝto ĉefduko Ferdinando kaj ĉefdukino Beatrisa d'Este".

Iom pli poste, kiam la komponisto forveturis el Eszterháza, ĉiuj liaj manuskriptoj restis tie. Ili estis konservitaj tie malzorge kaj multo el la heredaĵo de Haydn, senrevene pereis.

Sed kiamaniere tamen la partituro de opero troviĝis en Leningrado? Post longa, streĉa laboro oni sukcesis evidentigi, ke en 1856, por partopreni la kronadon de la caro Aleksandro la Dua, venis en Ruslandon la ambasadoro de la Aŭstra-Hungara Monarkio, Paŭlo Eszterházy, la nepo de tiu Nikolao la „Brilega", ĉe kiu servis Haydn. Estinte en Peterburgo, li vizitis la Publikan bibliotekon kaj ekraviĝinte pro ĝia manuskripta kolekto, promesis prezenti al la biblioteko ion el la valorajoj, kiuj estas deponitaj en liaj arkivoj. Li tenis sian vorton, sian promeson kaj post paso de du jaroj li alsendis la manuskripton de Haydn. Tamen pro iaj kaŭzoj oni ne atentis la partituron kaj ĝi kuŝis netuŝita pli ol cent jarojn . . .

Elrusigis *Petro POLIŜČUK*
(Taŝkent)

Noto de la Red. Komitato.

La interesan artikolon de la tagĵurnalo Komsomolskaja Pravda (10. VIII. 1968.) ni represigis, ĉar ĝi havas gravan novaĵon ankaŭ el vidpunkto de la hungara kulturhistorio. Vere, Jozefo Haydn (1732—1809) dum 29 jaroj estis la kortega kapelestro de la princo Eszterházy, li agadis en Kismarton, nun en Aŭstrio kaj en Eszterháza, nun Fertőd en Hungario. En pluraj lokoj de liaj komponaĵoj ekbrilas hungaraj reminiscencoj, spuroj de la soldatvarba muziko. La busto de Haydn troviĝas en la hungara ĉefurbo, proksime de la Burg-monto. La bildo de la baroka pordego de la iama kastelo Eszterházy — kie koncertis ankaŭ Haydn — estas videbla en la 2-a n-ro de HV.

La kapo, ĉapelo kaj peruko de Mór Jókai

Jókai ĉiam kunportis sian kapon

La mondfama hungara romanisto estis membro de la parlamento. Foje kiam Jókai ne ĉeestis la kunsidon, la parlamenta stenografo notis en la protokolon: (Maŭricio Jókai neas per kapbalanco.) Kiam Jókai ĉeestis la sekvan kunsidon, konsterne konstatis la strangan rimarkon. Li ekparolis jene:

— Surprize mi legis en la protokolo, ke mi balancis per mia kapo en la kunsido. Mi informas vin, estimataj deputitoj, ke lastan fojon mi ne ĉeestis la kunsidon, kaj — kiel kutime — ankaŭ tiam mi kunportis mian kapon.

La kapo kaj la hararo

En 1885 estis landa ekspozicio en la Urba Parko en Budapeŝto. Ĉeestis ankaŭ la reĝedzino Elizabeta kun akompano de la ĉefministro. Elizabeta haltis antaŭ la portreto de Jókai kaj diris:

— Neeble! Jókai ĉi tie estas tute senhara, kvankam li havas densan hararon.

Sed la politikisto klarigis la aferon jene:

— Jókai nun havas someran kapon. Li posedas ankaŭ vintran kapon, sed kiam la varmo estas granda, li ne surhavas sian hararon.

La ĉapeloj

Jókai rakontis dum gaja vespero en sia villo sur la monto de Buda.

— Ankaŭ mian ĉapelon oni ŝanĝis kelkfoje. Okazis, ke mian ĉapelon forportis grandkapa parlamentano. Mi metis sur mian kapon lian ĉapelon, sed ĝi falis ĝis miaj ŝultroj. Mi devis fine enŝovi mian bastonon, kaj tiel mi portis ĝis la veturilo la ĉapelon, duone sur mia kapo, duone sur la bastono.

En la Akademio

Jókai havis eĉ pli strangan ĉapel-aventuron en la Scienca Akademio, kie kolego forportis la ĉapelon de Jókai, kaj sian propran ne lasis tie.

— Certe la kolego havas du kapojn, ke li bezonas du ĉapelojn — diris Jókai. Sed kion mi mem faru? Mi prenis el la anguleto eluzitan ĉapelon, kiu servis kiel deponejo por la voĉdoniloj, kaj tiun ĉapelaĉon mi metis sur la kapon.

La peruko de Jókai

Lajos Pósa, majstro de infanfabeloj diris toston al Jókai. Li komencis tiel:

— Mór Jókai, la reĝo de la hungara literaturo, sur kies kapo tamen estas ne krono, sed . . .

— Paruko! — interrompis lin Jókai, kaj pro la ridego Pósa ne povis fini sian parolon.

La virinoj de Torda

Jókai dum sia vojaĝo haltis en la urbo Torda kaj en bankedo li finis sian parolon jene:

Mi vivigas el mia koro la afablajn, gastamajn sinjorinojn de Torda. Ili vivu ĝis mi fariĝos griza.

Sed tiu ĉi deziro ne efikis sufiĉe, Jókai tiam ja ne estis tute juna. Do la verkisto tuj leviĝis, prenis de sur sia kapo la parukon kaj diris:

— Mia hararo neniam griziĝos — kaj nun la plaĉo eksplodis en ridego.

(Prilaboris L. K.)

La historio de Hungario en spegulo de poŝtmarkoj

La Hungaran Konsilantarrespublikon la antant-potencoj volis neniigi, sed la Ruĝa Armeo, organizita por defendi la landon, atingis gravajn sukcesojn en la tn. norda militiro. La ĉefkomandanto de la armeo unue estis Aurél *Stromfeld* (fig. 144. — 1952), poste Jenő *Landler* (fig. 145. — 1961). La malamika superforto kaj la kontraŭrevolucio — eluzanta la internajn malfacilojn — venkis super la Konsilantarrespubliko. Sekvis senbrida teroro kontraŭ ĉiu adepto de la popola reĝimo. Oni murdis ĉ. kvin mil homojn, enkarcerigis sep dek mil homojn kaj dek miloj devis fuĝi al elmigrado. Unu el la viktimoj de la teroro estis Sándor *Latinka*, prezidanto de la direktorio en departemento Somogy (fig. 143. — 1961).

La 16-an de novembro 1919 eniris Miklós Horthy Budapeŝton kun la tn. nacia armeo. Li estis perforte elektita gubernatoro de la lando kaj restis tiu ĝis oktobro de 1944. La tn. Horthy-epokon, daŭrinta dudek kvin jarojn karakterizis senbride incita, teritoripostula, antisemita kaj ŝovinista propagando. Por reakiro de la teritorioj perditaj laŭ la packontrakto tiu reĝimo aliĝis ĉiam pli forte al la konkera politiko de la faŝismaj Germanio kaj Italio. En 1941 Hungario eniris en la militon kontraŭ Sovetunio, sekve de tio la teritorio de la lando baldaŭ iĝis scenejo de sangaj bataloj. Preskaŭ duonmilionoj da homoj kaj kvar dek procentoj de la nacia havaĵo pereis en tiu ĉi sensenca, krima milito.

Multaj ne interkonsentis kun la politiko de la Horthy-reĝimo. Multaj sopiris je demokratia, sendependa, libera Hungario, kaj por krei tiun, ili surprenis eĉ persekutadojn. Estis multegaj hungaroj, kiuj donis eĉ sian vivon por tiu ĉi celo. La martirojn de la kontraŭstara movado eternigas multaj poŝtmarkoj.

1945. Je memoro de Endre Bajcsy-Zsilinszky. (Fig. 148.). Li estis kontraŭgermana, antifaŝisma politikisto. Per armilo li kontraŭstaris, kiam oni volis lin aresti. La faŝistoj ekzekutis lin.

1945. Serio eldonita je memoro de la batalo kontraŭ la faŝismo. En la duobla medailono videbla sur la fig. 149. kun reliefa bildo de la martiroj. *Imre Sallai:* Oni arestis lin en 1932 kune kun sia kunbatalanto *Sándor Fürst*, dum la reorganizado de la neleĝa Komunista Partio. Laŭ la mortkondamno de la statariala juĝistaro ili estis ekzekutitaj.

Lajos Kabók, sindikata funkciulo, *Illés Mónus*, ĉefredaktoro de la socialdemokrata oficiala organo „Népszava". Ambaŭ estis murditaj.

Ferenc Rózsa. Li estis ĉefredaktoro de „Szabad Nép", neleĝa komunista partigazeto. En 1942 li estis arestita, kaj dum sia konfesigo murdita. — *Zoltán Schönherz*, unu el la organizantoj de la sendependecaj movadoj, batalanta membro de la neleĝa komunista partio. En 1942 li estis ekzekutita.

Anna Koltói. Oficistino de la Ferlaborista Sindikato, funkciulo de la Socialdemokrata Partio. En 1944 la faŝistoj murdis ŝin. Edzino de *Pál Knur*, funkciulino de la Socialdemokrata Partio.

György Sárközi, burĝa antifaŝisma politikisto, poeto kaj publicisto. — *Imre Nagy* kamparano-poemverkisto. Li vivis en granda mizero kaj mortis en 1942 pro malsano ricevita de la mizero.

Vilmos Tartsay, estinta staba oficiro de la Horthy-armeo. Estis preparanto de la soldata kontraŭstara movado. La faŝistoj arestis kaj ekzekutis lin kune kun la generalo *János Kiss* kaj kun la kapitano *Jenő Nagy*.

Endre Ságvári, elstara batalanto de la neleĝa komunista junlaborista movado. Li organizis demonstraciojn, estis redaktoro de la gazeto de la neleĝa Paco-partio. Li mortis en 1944 en fajrobatalo kun la ĝendarmoj.

Ottó Hoffmann, presisto de la neleĝa Komunista Partio. Lin mortigis en 1934 la politika polico de Horthy.

Portreto de *Ferenc Rózsa* (fig. 147. — 1961), okaze de Tago de la Hungara Gazetaro, kiun oni festas por rememori pri la aperigo de la neleĝa organo „Szabad Nép".

Portreto de *Máté Zalka*, generalo de la Internacia Brigado de la Hispana Libermilito. Verkisto kaj revoluciisto. Li heroe mortis en 1937 en la hispana batalfronto ĉe Huesca.

Portreto de *György Kilián* (fig. 150. — 1961), martiro de la hungara komunista junlaborista movado. La faŝistoj enkarcerigis lin pro lia politika laboro. Poste li elmigris al Sovetunio. En 1943 li ekiris al Hungario kiel partizano, kaj mortis en batalo kontraŭ la faŝistoj. György Kilián estis ankaŭ fervora esperantisto.

Kató Hámán (fig. 151. — 1960), fervoja oficistino, elstara batalantino de la komunisma laborista movado. La polico de Horthy plurfojte arestis ŝin. Ŝi mortis en 1936, sekve de la vundiĝoj turmentadoj de la fikarceristoj. Hámán Kató aktive partoprenis en la laborista Esperanto-movado, gvidis kursojn, faris multe por la akcepto de Esperanto.

István Tóth-Bucsoki (fig. 155. — 1962), organizanto de la kontraŭstara movado de la ministoj. Li mortis en 1944 sekve de konfesigo de la faŝistaj ĝendarmoj.

Ferenc Berkes (fig. 153. — 1962) martiro de la Konsilantarrespubliko. Li batalis en siaj artikoloj en „Népszava" por la socialismaj kooperativoj.

En 1945 la sovetaj trupoj forpelis la faŝismajn armeojn el Hungario. La fig. 154. (1960) prezentas la kapitanon *Ostjapenko* embuske mortigita soveta parlamentero tuj antaŭ la liberigo de Budapeŝto. La fig. 152. (1950) montras la monumenton sur la monto Gellért, simbolanta la liberigon de nia patrujo.

Miklós LETT

La naskiĝo de la nova terpomo

Jen estis, jen ne estis, tamen troviĝis terpomo, kiu interpremiĝis en ronda korbeto kun siaj kunuloj. Kie? En la kamero. Komence ĝi fartis bone, sed alvenis la aŭtuno kaj la vetero ŝanĝiĝis malvarma.

— Ho ve, mi suferas pro la malvarmo! — ĝi plendis al la kunuloj.

— Ne lamentu! — respondis la aliaj terpomoj. — Baldaŭ oni metos ja nin en la teron, kie ni estos en agrabla varmo, kaj dum la tuta vintro ni povos dormadi.



Kaj fakte okazis tiel. Post paso de kelkaj tagoj venis la dommastrino, prenis sur sian brakon la korbon kun la terpomoj, kaj portis ĝin en la ĝardenon. Per pioĉeto ŝi fosis kavetojn, kaj metis en ilin po unu terpomon, poste kovris ĉion per varma polviĝema tero.

Pasis ankaŭ la aŭtuno, alvenis la vintro. La neĝo falis en grandetaj, molaj flokoj, kaj kiel kusenego kovris la terpomo-kavetojn. Kaj la terpomoj mem dormis en siaj bedetoj, ĝis kiam la printempa sunbrilo degeligis la neĝokovron.

Post du monatoj la dommastrino denove aperis en la ĝardeno. Ŝi portis sian pioĉeton, kaj ame elfosis la kavetojn.

Al ŝi rigardadis etaj, rozkoloraj terpomo-infanoj. Ŝi metis ilin gardeme en sian korbon, poste portis ilin al la foiro por vendado.

Tiel naskiĝis la maja nova terpomo, kiun manĝas tre volonte ĉiuj infanoj, precipe, se ili ricevas al ĝi ankaŭ delikatan, freŝan, verdan salaton.

Marta NÁDASDI

Korespondi deziras

Antal *Bischof*, 252 ROSTOCK 22, Gdansker Str. 62. GDR, kor. pri E-eldonaĵoj kaj PM.

Bruno *Pio*, 16-jara studento, Via Nuova Villa — Is. 16. 80 146, NAPOLI, Italio, kor. kun samaĝulinoj el ĉiuj landoj.

Johano *Gyenis*, BUDAPEST, IX. Hámán Kató út 6. kor. kun agroekonomoj en la Eŭropaj socialismaj landoj kaj en Francujo.

Antoni *Dyki*, Abramowskiego 2 a/1, WROCZLAW 12, Pollando, kor. pri filmo, diskoj, int. BK.

Elizabeta Merényi, 16-jara gimnazianino, MEZŐKOVÁCSHÁZA, Hungario, kor. kun japana junul(in)o pri ĉiuj temoj.

21-jara med. studento Aleksandr *Ŝamardin*, Glavpoĉtamt do vostrebovanija, IVANOVO, Sovetunio, kor. pri fotoarto, vivo de studentoj, literaturo, endokrinologio ktp. (ĉefe kun Francio, Germanio, Pollando).

Richard *Tammik*, Rakvere, HULJA, Sovet-Estonio, kor. kun hungaroj kaj int. PM.

44-jara oficisto Georg *Drahovos*, HMELNICKIJ, Frunze 51, Sovet-Ukraino, kor. kun seriozaj filatelistoj pri temo: arto. Int. PM kaj BK.

15 lernantinoj, 15—18-jaraj kor, ĉefe kun italaj gelernantoj. BUDAPEST, XI. Körösi József utca 3. Tajpista kaj stenografa lernejo.

Abono de HUNGARA VIVO en eksterlando

Peranto al eksterlando: KULTURA Budapest, 62, P. O. Box 149. — Sumoj de abonprezo por unu jaro, en pluraj ĉefaj valutoj: Usonaj dolaroj = 1,50; Kanadaj dolaroj = 1,50; sterlingaj funtoj = 0—11—0; okc. germanaj markoj = 6,40; svedaj kronoj = 7,80; norvegaj kronoj = 10,70; danaj kronoj = 10,40; italaj liroj = 940,—; belgaj frankoj = 75,—; svisaj frankoj = 6,60; francaj frankoj = 7,50; nederlandaj guldenoj = 5,50.

Perantaj firmoj en la diversaj landoj:

ANGLUJO
Colle's Holdings Ltd., Denington Estate, London Road, WELLINGBOROUGH
The Danubia Book Co., 78 Shaftesbury Avenue, LONDON W. 1.

AŬSTRIO
Globus (VAZ), Höchstädtplatz 3, A—1200, WIEN I.
Rudolf Novák Gmbh., Köllnerhofgasse 4, A—1011, WIEN I.

AŬSTRALIO
Cosmos Bookshop, 133 Ackland Street, St. Kilda, Vic. A. Keesing, 168—174 Day Street, SYDNEY, N. S. W. 2000

BELGUJO
Agence Messagerie de la Presse, Rue du Persil 14—22, BRUXELLES

BULGARIO
„HEMUS", Pl. Slawejkov 11, SOFIA

ĈEĤOSLOVAKIO
P. N. S. — dovoz tisku, Vinohradska 46, PRAHA 2.
P. N. S. — dovoz tisku, Leningradska 14, BRATISLAVA

DANLANDO
Ejnar Munksgaard, Prags Boulevard 47, COPENHAGEN/S.
Hunnia Books, Norrebrogade 182. I., COPENHAGEN/N.

SUD-AMERIKO
Livraria Brody Ltda., Caixa Postal 6366, SAO PAULO, Brazilo
Livraria D. Landy, Rua 7 de Abril, Caixa Postal 7943, SAO PAULO, Brazilo.
Luis Tarcsay, Calle Iglesia Ed. Villoria Apt. 21—105, C. 24. CARACAS, Venezuela

FINNLANDO
Akateeminen, Kirjakauppa, Keskuskatu 2, HELSINKI

FRANCUJO
Agence Littéraire et Artistique Parisienne, 7 Rue Debelleyme. PARIS 3
Société Balaton 12 Rue de la Grande Bateliére, PARIS 9.

NEDERLANDO
Swets et Zeitlinger, Keizersgracht 487, AMSTERDAM C.

ISRAELO
Hadash, R. Nesz Ciona 4, TEL-AVIV
Lepac Ltd., 15 Rambam, TEL-AVIV
Gondos Sándor, Herzl 16, Bét Hakranot, HAIFA
A. Fischer, R. Strauss 3, JERUSALEM

JAPANUJO
Nauka Ltd., 30—19, Minami-Ikebakukuro 2-chome, Toshima-ku, TOKYO

JUGOSLAVIO
Forum, Vojvode Misica broj 1, NOVI-SAD
Jugoslovenska Knjiga, Terazije 27. BEOGRAD

KANADO
Délibáb Film and Record Studio, 19 Prince Street West, MONTREAL 18. Que.
Pannonia Books, 2 Spadina Road, TORONTO 4, Ont.

ĈINUJO
Watwen Shudian, P. O. B. Nr. 88. PEKING

POLLANDO
P. K. W. Z. Ruch. ul. Wronia 23, WARSZAWA

GERMANA DEMOKRATIA RESPUBLIKO
Zeitungsvertriebsamt, Fruchtstrasse 3—4, 1004, BERLIN

GERMANA FEDERACIA RESPUBLIKO
Griff Verlag, Über der Klause 7, 8 MÜNCHEN 90
Kubon und Sagner, Schliessfach 68, 8 MÜNCHEN 34.
Kunst und Wissen, Postfach 46, Wilhelmstrasse 4, 7 STUTTGART 1.
W. E. Saarbach, Follerstrasse 2, 5 KÖLN 1.

NORVEGIO
A/S Narvesens Litteratur Tjeneste P. O. Box 6140 Etterstad, OSLO

ITALIO
Avv. Andrei Lazar, Via Monte delle Gioie 24, ROMA
S. Co. Lib. Ri., Piazza 33, ROMA

RUMANIO
OSEP, Gara de Nord, BUCURESTI
OSEP, ORADEA

SVISUJO
AZED AG., Dornacherstrasse 60/62, BASEL 4200
Metropolitan Verlag, Binningerstrasse 55, ALLSCHWILLL

SVEDUJO
A. B. Nordiska Bokhandeln, Drottninggatan 7—9, STOCKHOLM 1
A. B. Sandbergs Bokhandeln, Sturegatan 8, STOCKHOLM 5.

SOVETUNIO
Sojuzpechatj. Import, Prospekt Mira 112-a MOSKVA

USA (Usono)
Center of Hungarian Litterature Inc., 1538 Second Ave., NEW YORK 10028
Corvin Travel and Gift Parcel Service, 1590 Second Ave., NEW YORK 10028
Stechert-Hafner Inc. 31. East 10th St., NEW YORK 10003
Magyar Áruház Könyv- és Lemezosztálya, 11802 Buckeye Road, CLEVELAND

VJETNAMIO
Phong Phat Hanh Bao Chi 17. Dinh Le. HANOI

KOREO
„Chul Bo" PHENJAN

Hungaroj abonu por eksterlandanoj laŭ la avizo sur la 2-a kovrilpaĝo

Statuo de Pál Vásárhelyi (eminenta akvo-inĝeniero), en Szeged



Monumento de la Konsilantarrespubliko 1919, en Szeged.